

Ĉineske

(1973-2007.10.)

e-Librigita de Elerno

Nov. 2007

Enhavo

Vortoj de Kompilinto

Busuanzi (Aŭguristo)

Omaĝe al Komencantino (Ardo)

Sukceson al Penseo (Eto)

Burĝono de Amo (Eto)

Sonoj de Vento (Eto)

Tagoj (Guozhu)

Al Kara Komencantino (Guozhu)

Dankon al Guozhu (Komencantino)

Zamenhofa Tago 2006 (Komencantino)

Sandŝtormo (Komencantino)

Sanya en Februaro (Komencantino)

La Juĝo de la Simio (Komencantino)

Valora Kuraĝigo (Komencantino)

Prognozo (Komencantino)

Mamoj de Venuso (Lily)

Mi Jam Spertis (Lily)

Deflorado de Vagulino (Lily)

Ĉe Lago (Lu Jinxin)

Odo al Umefloro (Sam trad.)

Sincera Beno (Miĉino)

Ebrieco (Niuniu)

Juan Klopodo (Sam)

Ora Silento (Sam)

Neĝa Fiero (Sam)

Bunta Printempo (Sam)

Homvivo Limigita (Sam)

Stilo de Batalanto (Sam)

Beno (Wu Hua)

Revizito al Chongqing (Yanke)

Amlaboro (Zhuang Qixiong)

Tempo (Zhuang Qixiong)

Mateno en Printempo (Zhuang Qixiong)

Caisangzi (Moruskolektanta Knabino)

En Kolza Kampo (Eto)

Marŝtormo (Komencantino)

Metroo (Komencantino)

Je Vojkruciĝo (Komencantino)
 Rigard' al la Nordo (Komencantino)
 Sincere (Komencantino)
 Trezoro en la Tero (Komencantino)
 Petrelo kaj Aglo (Li Weilun)
 Sentitole (Li Weilun)
 L' Okulparo (Lu Jixin)
 Roso (Lu Jixin)
 Petaloj kaj Pluveroj (Lu Jixin)
 Knabino (Zhuang Qixiong)

Chaitoufeng (Feniksa Harpinglo)

Ĉina Te' (Eto)
 Majtago (Eto)
 Floroj en Majo (Eto)
 Maja Sunlumo (Eto)
 Aŭtuna Elegio (Even Chen)
 Elegio (Even Chen)
 Amo (Guozhu)
 For kaj Por (Guozhu)
 Seksa Tiklado (Lily)
 Ĉe Didiĝo (Lu Jixin)
 Sopireĝemo en Aŭtuno (Lu Jixin)
 Amo (Xuexun)
 Mono (Zhuang Qixiong)
 Nomo (Zhuang Qixiong)
 Pano (Zhuang Qixiong)
 Krio (Zhuang Qixiong)

Changxiangsi (Longa sopiro)

Fatalo (Eto)
 Longhara Fraŭlino (Eto)
 Pluv' en Marto (Eto)
 Vintra Songô (Even)
 Por Morgaŭ (Even)
 Larmoj en Songô (Komencantino)
 Konatiĝo (L. Avĉjo)
 Atendo (Lily)
 Amikeco (Lu Jixin)
 Kion Ni Diras (Niuniu)
 Roja Fluado (Sero)
 Patro antaŭ ombo Weining (Zhuang Qixiong)
 E-Movado (Zhuang Qixiong)
 Beno (Zhuang Qixiong)
 Katastrofo (Zhuang Qixiong)

Chaozhongcuo (Pedanta Klerulo)

Foli' Falanta (Eto)
Lupo kaj Ŝafido (Komencantino)
Amoro kaj Frenezo (Komencantino)
Ĵure (Miĉino)

Daolianzi (Kanto de Lavantino)

Responde al Kara S-rino K (Ardo)
Velkinta Floro (Eto)
Rang-avida (Eto)
Sufoko (Eto)
Al Ardo (Eto)
Penso sub Neĝo (Eto)
Helpe al Plantidoj en Kreskado (Eto)
Teda Kunveno (Komencantino)
La Griloj (Komencantino)
Unueco (Komencantino)
Stepo (Sam)
Acidaj Vinberoj (Sam)
Ostardo Forfluganta (Sam)
Aŭtun' Lastjara (Sero)
Poeto (Zhuang Qixiong)
Sendormeco (Zhuang Qixiong)

Dianjiangchun (Ruĝigitaj Lipoj)

Nokta Kanto (Ardo)
En Aŭtuna Vento (Eto)
Vento el Okcidento (Komencantino)
La Societo de Pluto (Komencantino)
Ĉerizoruĝaj Lipoj (Lily)
Mizoto (Lily)
Rozaj Lipoj (Lily)
Tranokta Sendormeco (Sam)

Dielianhua (Papilio super Floroj)

Postsigno de Amo (Ardo)
Responde al Lily (Ardo)
Vaganta Hundo (Eto)
Sino de l' Maro (Eto)
Korŝira Pento (Lily)
Lup' el Nordo (Lily)
La Aŭtuna Vento (Niuniu)

Dingfengbo (Subigo de Ŝtormo)

Nerompita Sirenfajfado (Eto)
Temp' Silenta (Eto)
Kaptuko Ruĝa (Eto)
Juneco Forpasinta (Eto)
Parazito (Komencantino)

Fendieer (Papilio)

Buterfloro (Eto)
Trikolora Porcelano (Eto)
Longa Atendado (Komencantino)
Papilio (Miĉino)
Bunta Papilio (Sero)

Fengrusong (Vento inter Pinoj)

Adiaŭ al 2006 (Komencantino)
Azeno kaj Grilo (Komencantino)
La Trovita Hakilo (Komencantino)
Inter Du Kverelantoj (Komencantino)
Fortika Pin' (Lily)
Senforta Viro (Lily)
Amato en Songô (Lily)

Genglouzi (Kanto de Akva Horloĝo en Nokto)

Al Mia Vaganta Frato (Eto)
La Gloro de la Regolo (Komencantino)
Malsataj Infanoj (Komencantino)]
Perfida Viro (Lily)
Primavero (Miĉino)

Guizhixiang (Aroma Laŭrbranĉo)

Espero en Vintro (Eto)
Jarfina Danko al Mia Edzino (Eto)
Aroma Osmanto (Komencantino)
Azena Hufbato (Komencantino)
Dorm' en Pluvo (Lily)
Knabino de Sol-Patrino (Lily)
Drinkado (Sam trad.)

Haoshijin (Proksimiĝas Bona Afero)

Flustro de Amoro (Bonkoro)
Sunlumo en Vintro (Eto)
Fiera Anser' (Eto)
Novjara Tago (Eto)
Hurao al Chang'e N-ro 1 (Guozhu)
Revido (Komencantino)
Vento kaj Suno (Komencantino)
Inter Du Virinoj (Komencantino)
Salikfloroj (Miĉino)
Mia Aŭto (Niuniu)
Unuafoja Flugvojaĝo (Sero)

Heshengchao (Gratulo al Sankta Dinastio)

Rano kaj Bovo (Komencantino)
Drinku (Miĉino)

Hexinlang (Gratulo al Novedzo)

Ĉina Nupto (Komencantino)
 La Unua Nokto de Nupto (Lily)
 Mi Rajdis (Lily)
 Alies Novedzo (Lily)
Heyebai (Lotusfolia Taso)
 Krizantem' (Eto)
 Ĉe Pramejo (Komencantino)
 Sub l' Ombrello (Komencantino)
 Senfolia Arbo (Lily)
 Adiaŭ al Amatin' (Niuniu)
 Rano en Puto (Sam)
Huanxisha (Silk-lava Rojo)
 Jarfine (Ardo)
 Hermes kaj la Lignohakisto (Komencantino)
 Kurioza Kulto (Komencantino)
 Nokte (Maŭnan)
Jiangchengzi (Riverborda Urbo)
 Mi Volas... (Eto)
 Papilia Kiso (Komencantino)
 La Avarulo (Komencantino)
Jiangnanchun (Printempo Sude de Rivero)
 Rimgratulo (Ardo)
 Surstrate (Eto)
 Ebrieco en Amikeco (Eto)
 Rimgratulo (Guozhu)
 Vino de Vivo (Komencantino)
 La Cerbo (Komencantino)
 Kien Vi Rajdas? (Komencantino)
 Kapti Tigridojn (Sam)
Jianzi Mulanhua (Mallogigita Melodio Magnolia)
 Sapiro en Vintro (Eto)
 Jen Rhodos! (Komencantino)
 Flagranta Lamplumo (Mandio)
 Norda Vento (Niuniu)
 Nemalaperebla Rido (Niuniu)
 Ĉu pri Kiso (Shi Cengtai)
Kuxiangsi (Profunda Sapiro)
 Al S-rino Lily (Ardo)
 Deziro de Vidvino (Lily)
 Mi Mortu en Via Sin' (Lily)
 Ret-Amo Romantika (Lily)
 Al Kara Jariĉ (Miĉino)
Langtaosha (Ondo Lavas Sablojn)
 Nokta Pejzaĝo ĉe Chongqing (Eto)

Renkontiĝo (Even Chen)
 Vagonaro de Amo (Komencantino)
 Putoro kaj Kokinoj (Komencantino)
 Impreso pri Hainan (Komencantino)
 Ge' en Bano (Sceto)
 Vojhakantoj (Sero)
 Gebaniĝo (Vadanto)
 Stelo Falas (Vejdo)
 Humuro (Zhuang Qixiong)
 Virto (Zhuang Qixiong)

Linjiangxian (Feo ĉe Rivero)
 Povra Memoro (Ardo)
 Spekti Sunleviĝon (Eto)
 Leona Divido (Komencantino)
 Monedo kaj Pavoĵoj (Komencantino)
 La Maljunulo kaj la Morto (Komencantino)
 Sapiro (Lily)
 Memorinda (Miĉino)
 En Muzik' de Saksofono (Yanke)

Litingyan (Hirundo ĉe Kiosko)
 Hirundo kaj Hundo (Eto)
 Migraj Birdoj (Komencantino)
 Amo kaj Ĉagreno (Komencantino)
 Simio kaj Delfeno (Komencantino)
 Kiu Tuŝis Mian... (Lily)
 Ununokta Amorsperto (Lily)

Manjianghong (Rivero Plenruĝa)
 Omaĝamenhofa Tago (Eto)
 Malsaĝa Avo (Eto)
 Eterna Majstro (Eto)
 Ŝtona Arbaro (Lily)
 Rememoro pri Knabeco (Vejdo)
 Julio Brila (Vejdo)
 Neforgesebla Renkontiĝo (Vejdo)
 Gratulon al 50-a Jubileo de Xinjian Mezlernejo (Zhuang Qixiong)

Moyuer (Fiŝado)
 Cikonio kaj Konko (Eto)
 Lilak' Purpura (Eto)
 Hazarda Renkont' (Lily)
 Amludo (Lily)
 Tagoj sen Via Ĉeesto (Lily)
 Momenta Impulso (Lily)

Nangezi (Suda Kanto)
 Kaprico de l' Maro (komencantino)

Leono, Vulpo kaj Azeno (Komencantino)
 La Ursfelo (Komencantino)
 Vulpo kaj Masko (Komencantino)
 Aglo kaj Vulpo (Komencantino)
 Verki Veron (Nikolao Kurzens)
 Norda Neĝo (Niuniu)
 Rizgrajno (Sam)
 Falanta Folio ĉe Vespero (Yanke)
 Paseo (Zhjuang Qixiong)
 Senvorta Amo (Zhuang Qixiong)
 Mia Feliĉo (Zhuang Qixiong)

Nanxiangzi (Sudlandano)

Pluvet' Aŭtuna (Eto)
 Survoje de Vivo (Komencantino)
 Malkuraĝo (Komencantino)
 Jarfine (Sero)
 Paro da Hirundoj (Zhuang Qixiong)

Niannujiao (Ĉarma Kantistino)

Dediĉe al Ĉineska Rondo (Komencantino)
 Enamiĝinta Leono (Komencantino)
 Masaĝknabino (Lily)
 Virino Forlasita (Lily)
 Serenado sur Insulo Verda (Sero)

Pozhenzi (Kavalira Danco)

La Malsana Korvo (Komencantino)
 Bonan Vojaĝon (Komencantino)
 Muso kaj Rano (Komencantino)
 Al Batalo (Miĉino)

Pusaman (Budhista Dancisto)

Sunlum' (Eto)
 Vulpo kaj Korvo (Komencantino)
 La Juĝo de Momos (Komencantino)
 Antaŭ Nova Jarcento (Miĉino)
 Vento el Nordo (Sero)
 Vino (Zhuang Qixiong)

Putianle (Ĝojo tra la Tuta Mondo)

Vidvo kaj Vidvino (Bonkoro)

Qingpingyue (Serena Muziko)

Unua Amo (Eto)
 Elegi' al Vivo (Sam trad.)

Qingyu'an (Verdjada Taso)

Atedi Leporojn ĉe Arbo (Eto)
 Leporo kaj Testudo (Komencantino)
 Lanterna Tendo (Miĉino)

Qinyuanchun (Printempo en la Ĝardeno Qin)

Ĉina Kungfuo (Eto)
Mastroŝanĝo (Komencantino)
Amlud' en Duŝo (Lily)
Geiĝo en Suda Vintro (Lily)
Matene de Novjara Tago (Lily)
En Edeno de Virgulino (Lily)
Novjara Ben' (Vejdo)
Pino (Zhuang Qixiong)

Queqiaoxian (Feino sur Piga Ponto)

Leonfelo (Komencantino)
Jad Rakontis (Miĉino)

Renyueyuan (Rondiĝo de Luno kaj Homoj)

Al Amiko (Guozhu)
Hejmenreveno (Komencantino)
Plena Ventro (Komencantino)

Ruanlanggui (Reveno de Amato)

Flut-melodi' en Nebulo (Eto)
Rava Hor' (Guozhu adap.)
Brakumo (Lily)
Sopir' sur Altan' (Niuniu)
La Luno super Duno (Sam)
Onderoj (Zhuang Qixiong)
Ne Pavu (Zhuang Qixiong)

Rumengling (Kvazaŭsonĝe)

Korŝiro Adiaŭa (Ardo)
Terskua Kantado (Eto)
Al Kara Armand (Guozhu)
Rimgratulo (Guozhu)
Drinkanta Avo (Komencantino)
Nokta Pluvo (Sam trad.)
Stalagmito (Lily)
Vekite (Lu Jixin)
Somer-Nokte (Lu Jixin)
"Se" (Lu Jixin)
Sur Li-Rivero (Lu Jixin)

Santaici (Tri Terasoj)

Nur Unu, Sed... (Komencantino)
Gardanĝelo (Miĉino)

Shanhuazi (Monta Floro)

Ruĝa Umefloro (Guozhu)
Komputilo en Fatalaĵo (Guozhu)
Vintra Epizodo (Komencantino)
La Instruo de la Cervino (Komencantino)

La Akuŝanta Monto (Komencantino)

Pin' Surmonta (Mandio)

Kial? (Sam trad.)

Shaonianyou (Vojaĝo en Juneco)

Vilaĝ' en Neĝo (Eto)

Neĝhomo (Eto)

Mi Vin Amas Enkore (Eto)

La Tornistro (Komencantino)

La Mensogema Paŝtisto (Komencantino)

Amvojaĝo (Lily)

Sensukcesa Amoro (Lily)

Shengshengman (Lanta Sontreniĝo)

Elegio al Mia Patro (Eto)

Morna Poetino (Guozhu)

Donu al Mi Sinceran Kison, Kara (Lily)

Plendoj de Konkubino (Lily)

Impreso pri Ĝigolo (Lily)

Ni Geedziĝu, Kara (Lily)

Sopiro en Ferio (Lily)

Shengzhazi (Monta Kratago)

Pejzaĝ' Glacia (Eto)

La Hundo en la Stalo (Komencantino)

Veni Bilde (Guozhu adap.)

Espero (Zhuang Qixiong)

Gajo (Zhuang Qixiong)

Mia Amo (Zhuang Qixiong)

Novluno (Zhuang Qixiong)

Perlofonto (Zhuang Qixiong)

Rozo (Zhuang Qixiong)

Shiliuziling (Dekses-Silabo)

Trio (Eto)

Surmara Savado (Eto)

Plendoj de Arboj (Eto)

Ascend' al Luno (Eto)

Naĝ' en Maro (Eto)

Bezonata Akvo (Eto)

Sub Lunarko Kurba (Eto)

Velkinta Rozo (Eto)

Nun Neĝas (Eto)

Plag' de Polucio (Eto)

Donacu al Lu Jixin (Even Chen)

Trista Am' (Lily)

Ĝisĝua Kontenteco (Lily)

Trilogio de Litludo (Lily)

Funebre pri S-ro Gu Cunhua (Lily)
 Alies Novedzo (Lily)
 Responde al S-ro Even Chen (Lu Jixin)
 Rememore (Lu Jixin)
 Songô (Lu Jixin)
 Sentitole (Lu Jixin)
 Sentitole (Lu Jixin)
 Sentitole (Lu Jixin)
 Vino (Lu Jixin)
 Gut' da akvo (Mandio)
 Preleg' de Profesoro (Mandio)
 Amon Fordrinkis (Mao Zifu)
 Pensea Konfeso (Mao Zifu)
 Inter Domegoj (Niuniu)
 Stulta Hofiŝisto (Niuniu)
 Ĉi (S. Asta)
 Vortludo de Unusilabaj Prepozicioj (Sam)
 Solena Hor' (Sero)
 Aŭtuna Pejzaĝo (Sero)
 Jasmeno (Sero)
 Grimpado al Monto (Sero)
 Krakas Petardoj (Vejdo)
 Ĉevalo kaj Azeno (Vejdo)
 Ŝtorma Nokto (Vejdo)
 Mumur' de Pinoj (Vejdo)
 Flava Rozo (Vejdo)
 Spektado al Maro (Vejdo)
 Nostalgio (Yanke))
 Milda Kiso (Yanke)
 Meditado (Zhuang Qixiong)
 Floro en Nokto (Zhuang Qixiong)
 Amo Nobla (Zhuang Qixiong)
 Mia Edzino (Zhuang Qixiong)
Shuyidiaogetou (Preludo de Akva Melodio)
 Kanto de Aglo (Eto)
 Melodio de Aŭtuna Vento (Eto)
 Je Mia Ora Jubileo (Guozhu)
 Al Hosemo (Guozhu)
 Al Hu Guozhu (Hosemo)
 Knabino Vilaĝa (Komencantino)
 Grilo kaj Formiko (Komencantino)
 Laŭ Ĉies Plaĉo (Komencantino)
 En Uter' Patrino (Lily)
 Granda Amo (Niuniu)

Gratulon al Estimata Sinjoro Guozhu (Zhuang Qixiong)

Shuilongyin (Akva Drako)

Vulpo kaj Kapro (Komencantino)
Silueto de Mia Patrino (Komencantino)
Tordiĝo en ŝofa (Lily)
Vira Odoro (Lily)

Siyuanren (Sopiro al Fora Homo)

Eterna Sopiro (Eto)
Honfan Pasis For (Guozhu)

Sumuzhe (Virina Ĉapo)

Vivado en Polucio (Eto)
Primaver' en Vintro (Komencantino)
Mulo kaj Di-Statuo (Komencantino)
Aŭtune (Miĉino)
Unua Kiso (Sero)

Suzhongqing (Kora Sento)

Sciuro en Kaĝo (Eto)
Frida Koro (Komencantino)
Amo en Neĝo (Komencantino)
Danko (Komencantino)
Duŝo (Lily)
Mia Fil' en Foro (Sero)

Taichangyin

Migrado Suden (Eto)
Paŝtisto kaj Leono (Komencantino)
Amatina Vizaĝo (Lily)

Tasuoxing (Paŝo sur Herbo)

Jasmeno (Eto)
Flugemo (Komencantino)
La Lango kaj la Mano (Komencantino)
Sur la Sama Vojo (Niuniu)

Taoyuan Yiguren (Sopiro pri Malnova Amiko)

Floron al Vi (Eto)
Al F-ino Wu (Even)

Tianjinsha (Pura Sablo)

Tianjinsha (Ardo)
Sopireĝemo en Aŭtuno (Lu Jixin)

Tianxianzi (Fea Kanto)

Falantaj Folioj (Eto)
Revizit' al Mont' Feina (Yanke)

Tiaoxiaoling (Flirta Kanto)

Fuma Polucio (Eto)
En Fumo Malaperi (Eto)
Nacia Festo (Eto)

Avida je Promocio (Eto)
En Vintro (Even Chen)
Ĉineske (Guozhu)
Sentitole (Guozhu)
Sopiro al S-ro Dai Liming (Hosemo)
Vulpo kaj Vinbero (Komencantino)
Amperdo (Komencantino)
Vundo en Koro (Komencantino)
Polucio (Kris Long)
Persistemo de Virino (Lily)
Svinganta Pugo (Lily)
Memkonsolo (Lily)
Duonjara Bebo (Lily)
Kampa Geiĝo (Lily)
Amĝojo (Lily)
Primavero (Li Weilun)
Vagabondo (Lu Jixin)
Roj-Flanke (Lu Jixin)
Dum la Vojaĝo (Lu Jixin)
Dum la Vojaĝo (Lu Jixin)
Dum Vojaĝo (Lu Jixin)
Tempo (Lu Jixin)
Borde (Lu Jixin)
Vilaĝano Vendanta Lignkarbon (Lu Jixin)
Ĉineske (Lu Jixin)
Blankaj Buloj (Meva Maron)
Vokoj (Miĉino)
Meditado (Shi Chengtai)
Ĝojan Printempan Feston! (Veĵdo)
Ĉiam Verda (Zepto)
Idealo (Zhuang Qixiong)
Vivo (Zhuang Qixiong)
Temple (Zhuang Qixiong)
Lumbriko (Zhuang Qixiong)
Naiveco (Zhuang Qixiong)
Rimo (Zhuang Qixiong)
Montvilaĝo (Zhuang Qixiong)
Nova Sento (Zhuang Qixiong)
Sindono (Zhuang Qixiong)
Volo (Zhuang Qixiong)
Vorto (Zhuang Qixiong)
Al Mia Filo Zhuang Rui (Zhuang Qixiong)
Vintre (Zhuang Qixiong)
Ŝi (Zhuang Qixiong)

Vivo pri Esperanto (Zhuang Qixiong)
 Animo (Zhuang Qixiong)
 Umefloro (Zhuang Qixiong)
 Mondo (Zhuang Qixiong)
 Jubilo pri Esperanto (Zhuang Qixiong)

Wanghaichao (Rigardo al Martajdo)
 Rigardante Martajdon (Guozhu kaj Lujixin)
 Azena Ruzo (Komencantino)
 Ludo en Kinejo (Lily)
 Kiel Ĉarmas la Momento (Lu Jixin)
 Spektado al Martajdo (Veĵdo)
 Gratulon al eLibro “Ĉineske” (Zhuang Qixiong)

Wuyeti (Nokta Krio de Korvo)
 Funebre al Kara Jariĉ (Guozhu)
 Sentitole (Guozhu trad.)

Xiangjianhuan (Ĝojo de Intervidiĝo)
 Disiĝbedaŭro (Miĉino)
 Renkontiĝo kun Mia Filino (Niuniu)
 Jarfina Vespero (Zhuang Qixiong)
 “Feliĉan Printempan Feston!” (Zhuang Qixiong)

Xiaochongshan (Malgranda Montvico)
 Urbo Brua (Eto)
 La Ovoj (Komencantino)
 Aglo kaj Sago (Komencantino)
 Montoj en Sudo (Niuniu)
 Ora Rikolto (Yanke)

Xiaomeihua (Malgranda Umefloro)
 Admire (Guozhu)

Xiaoxiangshen (Feino de Hunan)
 Amjure (Ardo)
 Invit’ al Ĉinesko (Ardo)
 Centjara Duopo (Guozhu)
 Amdeklaro (Komencantino)

Xiechichun (Printempo ĉe Lago)
 Lageto (Eto)

Xijiangyue (Luno super Okcidenta Rivero)
 Responde al Nekonata S-rino (Ardo)
 Agrabla Vespero (Guozhu)
 Rimgratulo (Guozhu)
 Hejmsopiro (Komencantino)
 Vulpo kaj Gruo (Komencantino)
 Vespero en Qingdao (Xuexun)
 Vespero en Fuzimiao (Zhuang Qixiong)

Yanermei (Ĉarma Okulumo)

Belaj Okuloj (Komencantino)
 Ĉarma Okulumo (Miĉino)
 Vojo al Mont' Feina (Niuniu)
 Ĉarma Okulparo (Sero)
Yejinmen (Vizito al Ora Pordo)
 Lasta Preĝado (Eto)
Yexingchuan (Nokta Ŝipvojaĝo)
 Responde al S-rino K (Ardo)
 En Vagonaro (Komencantino)
 La Avida Hundo (Komencantino)
 Nokta Veturo (Miĉino)
 Hejmveo (Sam trad.)
 Luna Nokto (Yanke)
Yijiangnan (Sopir-al-Sudo)
 Guto da Paseoj (Ardo)
 Kruele Disiĝo (Ardo)
 Primaveraj Elegioj (Ardo)
 Al Lily (Ardo)
 Neĝa Vespero (Eto)
 Lanc' kaj Ŝildo (Eto)
 Stela Nokto (Eto)
 Kuir-Fumo (Eto)
 Knabeco (Eto)
 Prov' Primitiva, Prov' Kreiva (Guozhu)
 Triope Brilas (Guozhu)
 Fierinda Rekordo (Guozhu)
 En Du Monatoj (Guozhu)
 Rava Kunvojaĝo (Guozhu)
 Sekve post Mesaĝoj de Komencantino (Guozhu)
 Aplauĉo (Guozhu)
 Al la Kunsido por la Aŭtunmeza Festo, 1985 (Hajco)
 Valenteno sen Amato (Lily)
 Rememoro pri Seksatenciteco (Lily)
 Neforgeseblaj Tagoj de Studento (Mao Zifu)
 Ĉinoj Revenas (Miĉino)
 Akrostike (Miĉino)
 Soleca Knabino (Miĉino)
 Estonta Vivo (Niuniu)
 Knabino Linda (Sam)
 Ĝis Maljuna Aĝ' (Sam)
 Ŝi Alvenis (Sam)
 Boato de Vivo (Sam)
 Dimanĉe (Sam)
 Sunfloro (Sam)

Densa Nebulo (Sam)
 Kakto kaj Lacerto (Sam adap.)
 Renkontiĝo de S-anoj (Sam)
 Limigita Homvivo (Sam)
 Nokta Penso (Sam)
 Suda Pejzaĝ' (Sam)
 Edz-Sopira (Sam)
 Eta Pluvo (Vejdo)
 Valora Paŝo (Vejdo)
 Libero (Vejdo)
 Taŭro kaj KUlo (Vejdo)
 Leporoj kaj Vulpoj (Vejdo)
 Ezopo (Vejdo)
 Bona Tago (Zhuang Qixiong)
Yijianmei (Branĉo da Umefloro)
 Patrino Rivero (Eto)
 Aglo kaj Alaŭdo (Komencantino)
 Vir' Senpova (Lily)
Yiqin'e (Memoro pri Palaca Knabino)
 Pino en Neĝo (Guozhu)
 Memĝuado (Lily)
Yishaonian (Rememoro pri Juneco)
 Ĉe l' Tombo de Amiko Verda (Eto)
 Heliketo (Guozhu adap.)
 Vin Salutu (Zhuang Qixiong)
 Konfeso (Zhuang Qixiong)
Yiwangsun (Rememoro pri Princido)
 Umefloro (Miĉino)
Yongyuyue (Ĉiama Ĝojo de Renkontiĝo)
 Promenanta Geedziĝo (Eto)
 Momento Perversa (Lily)
 Ĝojo en Doloro (Lily)
 Neforgesebla Kiso (Lily)
Yugezi (Fiŝista Kanto)
 Hejmveo (Eto)
 La Spuroj (Komencantino)
 Brila Oldulo (Sam)
 Remado sur Lago (Yanke)
Yujia'ao (Fiŝista Fiero)
 Hofiŝisto Fiera (Niuniu)
Yujixing (Promeno sur Palaca Strato)
 Nokta Vojaĝo en Perla Rivero (Miĉino)
Yulinling (Tintado en Pluvo)
 Dek Sunoj (Eto)

Tintado en Pluvo (Guozhu)
 La Flatema Maro (Komencantino)
 Konfeso de Virino (Lily)
 Nuda Naĝado (Lily)

Yumeiren (Belulino Yu)
 Disiĝo (Even)
 Kiomfoje (Even)
 Ĉu Vere Senrevide? (Even)
 Al Shi Chengtai (Guozhu)
 Ĉentono (Guozhu)
 La Amo (Guozhu adap.)
 Morna Okulpar' (Komencantino)
 Inter Du Malbonoj (Komencantino)
 Svinganta Pugo (Lily)
 Nokta Penso (Lu Jixin)
 Ĉe Renkonto (Lu Jixin)
 Ĉe Tablo (Lu Jixin)
 Sola Vago (Lu Jixin)
 Ĉe Lago (Lu Jixin)
 En la Nuba Tago (Lu Jixin)
 Ĉiam Verda (Lu Jixin)
 Sentitole (Lu Jixin)
 Renkonte al Nova Jarmilo (Miĉino)
 Fraŭlino en Soleco (Niuniu)
 Mezaŭtuna Nokto (Zhuang Qixiong)
 Pluvo en Vintro (Zhuang Qixiong)
 Printempo (Zhuang Qixiong)
 Soleco (Zhuang Qixiong)
 Spegulo (Zhuang Qixiong)
 Suno en Vintro (Zhuang Qixiong)
 Gratulon al 77-a Naskiĝtago de Mag. Edwin de Kock (Zhuang Qixiong)
 Mia Tombskribo (Zhuang Qixiong)

Zhegutian (Perdrika Ĉielo)
 La Potenca Najbaro (Komencantino)
 La Oreloj de la Leporo (Komencantino)
 La Plej Granda Kulpulo (Komencantino)

Zhuyingtaijin (Kanto pri Zhu Yingtai)
 Soifo (Lily)
 Frigida Virino (Lily)
 Knabino en Bikino (Lily)
 Nokta Fraŭlino (Lily)
 Ekkomren' en Pluvo (Sam trad.)

Zhuzhici (Bambuoj)
 Ranoj Volas Reĝon (Komencantino)

Memore (Miĉino)

Zuihuajian (Ebrío inter Floroj)

Sensacia Venko (Guozhu)

Ebria en Florsino (Lily)

Mamsuĉado (Lily)

Am' al Foro (Lily)

Amĵuro (Zhuang Qixiong)

Zuihuayin (Ebrío sub Ombro de Floroj)

Sopirado (Sero trad.)

Konfeso (Shi Chengtai)

Mesaĝo de la Novjaro (Shi Chengtai)

Sorto (Zhuang Qixiong)

Kombinita Ĉeno de Ĉineskoj

Adamo kaj Eva (Lily)

Bov-Paŝtisto kaj Feino (Veĵdo)

Disfloru Cent Floroj (Zhuang Qixiong)

Kanto de Ĉinio (Zhuang Qixiong)

Vortoj de Kompilinto

Ĉi tiu libro entenas la ĉineskajn poemojn, kiujn mi povas trovi el diversaj fontoj, inkluzive de Penseo, Elerno-elibroj, retejoj ktp. Entute mi kolektis 31 aŭtorojn, kiuj verkis, per 94 specoj de ĉineskaj skemoj, 621 titolojn kun 1470 ĉineskaj poemoj. Mi pensas, ke ĉi tiuj poemoj jam povas prezenti al la legantaro la panoramon de disvolviĝo de ĉineskaj poemoj. Kaj samtempe ĉi tiuj poemoj povas per si mem pruvas, ke ĉineskoj estas taŭgaj por esprimi diversajn pensojn, delikatajn kaj malsimplajn. Kiel formo de poemoj, ĉinesko havigas al si ĉiujn pravigojn akiri lokon en Esperanta Poezio.

34 jaroj jam forpasis, ekde kiam s-ro Hu Guozhu elbakis la unuan ĉineskon en Esperanto. Dum la tempdaŭro, troviĝas multaj elstaraj pioniraj verkintojn de la ĉineskaj poemoj, kiaj Guozhu, Lu Jixin, Mao Zifu, Sceto, kaj pli poste Vejdo (Komencantino), Lily, Eto, Ardo, Zhuang Qixiong, kiuj vere kreis la kulturon de ĉineskoj en Esperanto.

La intenco de la kompilinto kuŝas en tio, ke pli multaj junaj s-anoj, sekvante tiujn modelojn, antaŭenpuŝu kaj pliriĉigu verkadon kaj disvolviĝon de ĉineskoj en Esperanto.

Vejdo

Busuanzi (Aŭguristo)

ĉina fiksforma poemo konsistanta el du strofoj same el versoj de 55, 75 silaboj kun duona rimo.

Ardo

Omaĝe al komencantino

Per ĉineskaro
kun fajra sino
reverkis fablojn saĝajn
komencantino.

lirikaj versoj
de belulino,
kiujn ni gxuas danke
Hur' al feino!

Eto

Sukceson al Penseo

Dura Penseo
post fortaj penoj
senĉese daŭre marŝas
kiel ferĉenoj

kontraŭ tempesto
for de katenoj
ĝis plejalta montpinto
sen ajnaj splenoj

Burĝono de Amo

rigardo ŝia
profundas kiel lag'
kvieta kaj trankvila
en senmova ag'

mi nur perceptas:
korinklin' en svag'
honteme tremas puŝe

kun akvflua vag'

Sonoj de Vento

**la vento siblas
tra la arbaro
susuras inter herboj
preter murbaro**

**akute hurlas
super ondmaro
obtuze muĝas
sen ajn ŝparo**

Guozhu

Tagoj

**Pasintajn tagojn
mi ne katenas.
Ili jam forlasis min,
ne plu revenas.**

**Kaj nunaj tagoj
ankaŭ ĝenas,
taŭzante mian koron,
multe ĉagrenas.**

Al Kara Komencantino

**En marto vi ek
al maratono.
Instigas mi vin rete
per mesaĝ-dono.**

**Ĉiam vin sekvas
por bona kono.
Je brava celatingo,
vin laŭru krono!**

Komencantino

Dankon al Guozhu

al kara Guozhu
dankon mi donas
ĉineskojn ekzemplas vi
alvoko sonas
danke al Guozhu
ĉineskojn konas
mi mare de poemoj
min daŭre spronas

Zamenhofa Tago 2006

portreto Ava
hel-verda flago
solena datreven' de
Zamenhof-Tago
Ni sang-ĵuras por
estonta ago
Esperanto ne estas
ŝajna imago

Sandŝtormo

sandŝtorm' leviĝas
el norda dezert'
kovras sunon kaj teron
sen ajna avert'

revenĝ' natura
ĥaosa koncert'
ĉu homar' ĝin konkeros
per la mana lert'

Sanya* en Februaro

ĉiel' lazura
marakvo blua
sur longa plaĝo bruna
amaso brua

ondpelo ŝaŭma
akvaro skua

**veloj glate navedas
laŭ bord' sinua.**

*Sanya: ĉina apudmara urbo troviĝanta en tropika zono

La Juĝo de la Simio

1.

**Akuzis vulpon
lupo pri ŝtelo,
sed tiu sian kulpon
negis per pelo.**

**Simion ili
kun klara celo
petis por fari juĝon
pri la kverelo.**

2.

**Simi' deklaris
“Ĉar konas bone
sendube mi vin ambaŭ,
volas juĝdone**

**mi do verdiktu:
vi lup' persone
repostulas senrajte
ion redone,**

3.

**tamen senperde.
Preskaŭ fripone
vi vulp' akuzon negas
ŝtelkulpon ŝtone,**

**sed mi kredas, ke
vi senpardone
ŝtelis ion tutcerte
kaj senrezone!”**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Valora Kuraĝigo

Responde al Guozhu kaj Ardo

“Hura!” eksonis
el Guozhu, Ardo.
Ne nur por mia peno,
ankaŭ por arto

poema ĉina,
por nia gardo
de ĉin-kulturo
kun miljara hardo.

Sincere dankas
mi jen al Guozhu
pro ties kuraĝigo.
Por fina konstru’

de ĉineska dom’,
ni peno des plu
por E-movado nia
kun verda lumflu’.

Prognozo

1.

En lito kuŝis
grave inerte
malsanulo, konsolis
oni: “Vi certe

saniĝos baldaŭ.”
Diris averte
tamen la kuracisto
kaj pli aserte:

2.

“Vin ne plu trompu!
Ve, ĝis mateno
vi ne vivos, domaĝe!”
Li sen reveno

foriris poste.

**El kriza ĝeno
baldaŭe tiu iĝis
sana en pleno.**

3.

**Kaj post monato,
iris malforte
kaj vangpale li straten,
sed ĝojoporte.**

**Jen, venis al li
tute senvorte
la kuracist' kaj miris
treege forte.**

4.

**Nekredeble li
la kapon skuis:
“Ej! Ĉu vi de l' Submondo
revene fluis?**

**Kio do tie?”
Al li instruis
la paciento: “Pacon,
silenton ĝuis**

5.

**mi tiuloke.
Jen en abundo
la asfodeloj kreskas,
kaj al korvundo**

**balzamon donas
per akv-inundo
Lethe-rivero, sed, ho,
en ĝen-profundo**

6.

**ĉagrenas vere
vee Plutono,
ke pro bona kuracad',
bark' de Ĥarono**

malplene pasas

tra Aĥerono.
Kolere nun li volas
por malpardonon

7.

kontroli liston
de kuracistoj.
Ne tamen timu! Jam nun,
kun ĵurinsisto

mi, nu, konfirmas:
vi sur nomlisto
ne plu inkludas kiel
la kuracisto.”

(adaptita el *Eropa Saĝo* de Kalocsay)

Lily

Mamoj de Venuso

masive rondaj
bele elstaraj
du karnaj dunetoj por
beboj nektaraj

plaĉaj al viroj
amorofaraj
allege al diboĉoj
bore senbaraj

Mi Jam Spertis

en lumo febla
mia ĝigolo
ĉeorele murmuris
“ĉu nova bolo?”

mi tre scivolis
“ĉu pli da folo?”
li do surrampis sur min
kun kac' malmolo

li ŝovis kapon
inter femurojn
miajn kaj dispuŝis miajn
neĝblankajn krurojn

li serĉis buŝe
amorplezurojn
perlange lekis vole
nigrajn velurojn

sublipoj miaj
jen jam sukplenis
dum lia lang' soifa
volupti penis

al mia pordo
la lango venis
petola kaj avida
eke festenis

li lekis, kisis
ĝoje fervore
buŝinon molan mian
same amvore

aĥ, kia juko
ĝis ĝu-angore
trakorpe kuris fulme
nervo-stupore

ĉe buŝo mia
rigidis kaco
lia malpacienca
jam en malpaco

li spire veis
“hej, erinaco
mia, ĝin buŝe prenu
kun ina graco!”

mi ĝin favoris
per buŝa preno
mordetis akve ŝmace
sen ajna ĝeno

**mi ĝin buŝpremis
en firma teno
senmove ĝis korŝira
ĝua festeno**

**mi glitis lante
de ĝia glano
ĝis la radiko kvazaŭ
per buŝa bano**

**aŭdiĝis tuje
ĝema vulkano
jen kaj jen rapideme
pro am-elano**

**mi plirapidis
buŝ-ludon glite
mi sentis lian tordon
treman enlite**

**mi ankaŭ spasmis
korpe subite
kolapse kaj laceme
kontent-merite**

**en gorĝ' eksentis
malsekan varmon
ejakulitan forte
mi ĉuran svarmon**

**ni ambaŭ falis
en sonĝan ĉarmon
langvoris lace supraj
en masan karnon**

**li rulis de sur
mi malrapide
kontente kaj feliĉe
kaj pozis side**

**“ĉu tion ŝati?”
“ba! ba! senbride
konstante, sed ĉu plian?”**

mi ĉuis ride.

Deflorado de Vagulino

mizere vagis
de strat' al strato
ŝi adoleskantino
en malsan-stato

gepatroj ŝiaj
kun unu frato
droniĝis en diluvo
pro sorta bato

senhelpe sola
kun peza koro
forlasis la vilaĝon
ŝi al la foro

ŝi almozpetis
en malhonoro
sub moka pririgardo
sen ajn pudoro

noktiĝis foje
sur tero frida
ŝi dormis duonnuda
kun korp' rigida

sendube tio
per ĝuo vida
invitis amorantojn
kun pens' insida

ŝi aŭdis songe
"cervido mia
obeu, ne kriaĉu
jen lud' pasia"

ŝi svage sentis
sur korpo sia
palpadon de manego
ŝajne mania

**ĝi jen deŝiris
kun granda forto
kalsonon mincan ŝian
— la virgan pordon**

**ŝi jam panikis
ege ĝis morto
instinkte ŝi rezistis
per korpa tordo**

**ŝi trovis tiam
sin sub la premo
de korpa pez', aŭdiĝis
kruda blafemo**

**manego glitis
kun eta tremo
malsupren ĝis la truo
ŝi jen kun ĝemo**

**malfermis siajn
okuloparon
ekkriis laŭte ŝi por
rezisti l' faron**

**sed vane, ŝi jam
ekhavis flaron
de vira spir' anhela
kaj lian staron**

**de la bubaĉo
per sia buŝo
li dronis ŝian krion
fine, en kuŝo**

**servprete mola
ŝi sub movfuŝo
akceptis bapton sanktan
de sekxa tuŝo**

**tre timigite
en duonsveno
ŝi sentis sube ion**

bori kun peno

**jen ekdoloro
je la alveno
de dura stang' ŝin pikis
kvaz' vesp-veneno**

**okazis forta
piŝtad' senbara
neniam ŝi gustumis
dum viv' amara**

**ekstazon tian
en sento klara
ŝi obeemis jen al
diboĉo rara**

**piŝtado daŭris
en la vagino
jam nun alvenis ili
al ĝu-kulmino**

**ĝemkriis ĝoje
ŝi en fascino
nun forgesante jam pri
sia destino**

**matene trovis
stakon da mono
ŝi ĉe la kap' metitan
al la bezono**

**la doloreto
far la fripono
ankoraŭ ardis ĝene
sub la kalsono**

Lu Jixin

ĈE LAGO

**Ĉe susura arb'
staras ruĝ-atend',
sub gracila okulhar'**

brilas or-atent'.

**El remila pluk'
ŝvebas am-moment'.
Post boato, laŭ sektor'
flosas sentiment'.**

Lu You (1125-1209)

Odo al Umefloro

**ĉe rompita pont'
trista kun ĉagren'
vi solecas en krepusk'
des pli en pluv-ĝen'**

**sen strebem' al pomp'
malgraŭ envi-ĉen'
eĉ vi fale kotigās
samas l' arom-plen'**

esperantigis **Sam**

Miĉino (1938 -)

Sincera Beno

**Vi okdekjara
modele penas
por nia Esperanto
glore dojenas.**

**Okaze kiam
Jubile' venas
al kara Censinio
ni kore benas.**

Niuniu

Ebrieco

**en amikeco
longe ebria
mi restas en societ'
la harmonia**

se mi vekigas
sincer' nenia
ekzistas plu en mondo
la apatia

Sam

Juna Klopodo

klopo du amik'
en freŝa juno
penu, penu, amiko
en flora nuno

alie tristos
en aĝ-aŭtuno
vi lamentos senfine
sub sorta puno

Ora Silento

en aŭskultado
ora silento
naskas zorgan juĝadon
kun dec-prudento

antaŭ disputo
indiferento
ŝajna donas impreson
de pens-talento

Neĝa Fiero

blankaj neĝeroj
dancas en ĝojo
kovras montojn kaj domojn
arbojn ĉe vojo

ĉion ŝi volas
lavi per roĵo
blanka pure kaj zorge
en unu fojo

Bunta Printempo

**disfloranta flor'
kiu pavas sola
tute ne signifas ke
printempas bola**

**nur diversaj floroj
kun peno vola
buntan printempon portas
al mond' popola**

Homvivo Limigita

**homviv' mallonga
haste forglita
neniel daŭras foren
sed limigita**

**lernad' kaj klero
pigrul-spita
neniam venas meme
sed invitita**

Stilo de Batalanto

funebre pri s-ro Gu Cunhua

**vi, batalanto
firma, sindona
por nia Esperanto
homar-bezona**

**senlace semas
plugas sensona
kaj obstine persistas
per forto sprona**

Wu Hua

Beno

**Kara Penseo,
— nur tri koloroj,**

**modeste vi ridetas
inter cent floroj.**

**Gloroj alvenos
post pen-laboroj.
Printempo vin karesu!
per mil favoroj!**

Yanke

Revizito al Chongqing

**sunlumo strabas
inter alt-domoj
navedas veturiloj
hastemas homoj**

**arkaĵas pontoj
kun raraj nomoj
en aero disŝvebas
hŭogŭo*-aromoj**

* unu el ŝatataj frandaĵoj de chongqing-anoj.

Zhuang Qixiong

Amlaboro

**Surstrate lampoj
— brilaj koloroj.
Ŝi laŭvoĉe kolportas
kun freŝaj floroj.
Mon-kesto plenos
post am-laboroj.
Al malriĉaj infanoj
kun cent favoroj!**

Tempo

**Mi, pro men-amo,
sin ne katenas.
Ja ĝis ĉiuj oreloj
bon-famo venas.
Feliĉa tempo**

neniam ĝenas.
Kun granda idealo,
ne plu ĉagrenas.

Mateno en Printempo

Sun' milde vekis
el songo teron;
Ĝi alportis kun or-lum'
belan esperon!

Agraba ventet'
portis leteron
de hejm'; flor', bird'; Nia land'
pli da prosperon!

Caisangzi (Moruskolektanta Knabino)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de 74, 4, 7 silaboj, laŭ rimaranĝo de xa, a, a. (x=senrima)

Eto

En Kolza Kampo

**pensfluo vole vagas
inter floroj —
etaj koroj
kun flavaj rememoroj**

**ĉu mia karulino
kun doloroj
kaj rakoroj
vivadas en ĝojhoroj**

Komencantino

Marŝtormo

**En la maro ruliĝas
sub ventblovo
onda movo
freneza kiel bovo
marbirdoj fuĝas disen
per mirpovo
en ventŝovo
tempesto jam en kovo.**

Metroo

**longa vagonar' kuras
sub la tero
ne mistero
sed trafika prospero**

**granda distanc' transiĝas
en libero
la konkero**

homa je bariero

Je Vojkruciĝo

ĉe la kruciĝ' de vojo
ne hezitu
bone pretu
direkton ne profetu

se vi firmas en decid'
kaj kvietu
kaj forĵetu
konfuzajon, impetu

Rigard' al la Nordo

sur monto mi rigardas
al la nordo
kun neĝmordo
ĉi' en blanka konkordo

tie lokas mia hejm'
ligna pordo
kota korto
plukadas sur korkordo

Sincere

1.

Renkontis lupon vulpo
maljunaĝa
malkuraĝa
kun kapo nemalsaĝa.

Li petis pri indulg' al
lup' sovaĝa
per flatplaĉa
voĉo triste adaĝa.

2.

Lupo diris, "bone, se
tri sincerajn
frazojn verajn,
mi ne en pecojn erajn

**vin disŝiros.” Li uzis
jen esperajn
malsincerajn
vortojn klare senperajn**

3.

**por ekparoli prete:
“Vi, unue,
kial ĝue
venis damne senbrue?**

**Ĉar vi venis tien ĉi,
kial, due,
vi ne plue
blinde alvenis skue?”**

4.

**La vulp’ daŭrigis prete:
“Fine, trie,
por ke plie
mi vin vidu nenie,**

**tro longa vivo via,
do, ne ĉie
daŭru plie
kaj fine krevu fie!”**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Trezoro en la Tero

1.

**Kampulo antaŭ morto
vokis al li
en agoni’
siajn filojn pigrajn tri,**

**testamentis: “Trezoron
kun lumradi’
kaŝis jam mi
en kamp’de la famili’.**

2.

**Ĝin serĉu kun fervor' post
mia forir'."'
Je lasta spir'
lia, filoj por akir'**

**de trezoro fosadis
teron per tir'
de plugo-ir'
por trovi laŭ patra dir'.**

3.

**Trezoron ili ĉie
jen senpove
ĝin gajnis trove,
sed la tero plugŝove**

**rikolton riĉan donis
kaj denove
ili prove
laboris esperkove.**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Li Weilun (1936—)

Petrelo kaj Aglo

**Ŝtormas, muĝas mar-ondoj.
Brilas stelo
en malhelo,
Ho, ĝi estas petrelo!**

**Aglo ŝvebas tra nuboj.
Ĉu kaĝbela
ĝia cello?
Al ĝi plaĉas ĉielo!**

Sentitole

**Furiozas neĝvento.
Sola floro,
umefloro.
Flugas ĝia odoro.**

En ĝardeno printempa
inda gloro,
ne memgloro.
Ĝi nur ridas en koro.

Lu Jixin

L' Okulparo

Ridetas l' okulparo
kiel suno
kaj ol suno,
kun vivoplena juno.

Ĝi ankaŭ brilos nokte
kiel luno
kaj ol luno,
sur ondoplaŭda duno?

Roso

Rosa gut' sur azele',
sur monta vang',
dum venta tang',
brilas kiel freŝa sang'.

Rosa gut' sur lotus-flor'
sur laga vang',
dum onda tang',
puras kiel larma blank'.

Petaloj kaj Pluveroj

La flirtantaj petaloj
kaj liberas,
kaj teneras,
kiel song' leĝeras.

La senfinaj pluveroj
kaj ribelas,
kaj fabelas,
kiel spleno rondelas.

Zhuang Qixiong

Knabino

**Dolĉ-vortoj de knabino
kiel suno
kaj ol suno
varmas pro oportuno.
Ŝiaj brilaj okuloj
kiel luno
kaj ol luno
radiras en aŭtuno.**

Chaitoufeng (Fenika Harpinglo)

ĉina fiksforma poemo konsistanta el du strofoj po ok versoj de 3,3,7; 3,3, 44, 3 silaboj, kun rimaranĝo de a,a,a;b,b,x,b,b,BB. kaj la lasta verso de strofo devas esti tri samaj silaboj, (x=senrima)

Eto

Ĉina Te'

arome
fantome
sorĉita homo,dome
kun obe'
trink-trofe'
ĝu-apoge'
ĉina ide'
te' te' te'

ĉiome
san-pome
freŝiga likvo krome
gust-ĝue
nenie
spirita fe'
unika kre'
tre tre tre

Majtago

maja tag'
laborflag'
zamenhof vokas al ag'
persone
sindone
al esperant'
kvazaŭ ŝtone
he, he, he

maja tag'
sen ajn blag'
marŝu al celo sen vag'
varmkora
fervora

ĝis sukceso
plenkolora
ha, ha, ha

Floroj en Majo

ridetaĵ
benpetaj
buntaj floroj koketaĵ
kun favor'
kaj fervor'
flugu vagpens'
kiel buntflor'
sor, sor, sor

amatin'
kun kapklin'
ĉitempe forlasas min
trista kor'
kun dolor'
serĉas ĉien
por rememor'
for, for, for

Maja Sunlumo

haŭtpika
amika
sunlum' en maj' muzika
vivaĵa
bel-maja
sento ŝajnas
himalaja
ja, ja, ja

vangleka
pensveka
sunbril' en maj' senpeka
kun kompren'
kaj bonven'
mi min lulas
en pensa plen'
jen, jen, jen

Even Chen

Aŭtuna Elegio

Armand Su,
portis gru'
vin al Elize' sen bru'.
Nia kor'
en dolor'...
Triste pluvos,
sen vorto plor'.
Bol', bol', bol'!

Armand Su,
Grand-statu'—
la giganta kontribu'!
Kiom glor'—
kiel or'!
Vi eternas.
Nemian for!
Vol', vol', vol'!

1990-11-09 Guangzhou

Elegio

Armand ne
kantos re
kiel nia korife'
Portis gru'
vin sen bru'
senrevene
al ĉielblu'
Ĉu? ĉu ? ĉu !

Armand re
kantos tre
inspire de elize'.
Kontribu'
sen tabu'
daŭros via
monda influ'
plu ? plu ? Plu !

Amo

**Dolça am',
juna flam'
lulis nin feliça gam'.
Ni ja tre
dubis ke
kiuj folis
pli ol ni ge?
Ne, ne, ne!**

**Kurta am'
pasis jam.
Estingiĝis juna flam'.
Min ja tre
ĝenis ke
ĉio igis
morta pase'.
Ve, ve, ve!**

For kaj Por

**Trivial
karnavar
dekadenca liberal
vanta hor
fi-amor
mon-avid
animstupor
for, for, for!**

**Bonmoral
ideal
por afer' nobla lojal
pura kor
penlabor
sindonema
serv' al popol
por, por, por!**

Lily

Seksa Tiklado

dezira
aspira
al kuniĝo altira
ŝi kaj li
li kaj ŝi
kune ludis
kun energi'
kri', kri', kri'

enira
eltira
en vojaĝ' ĝem-delira
mi kaj vi
vi kaj mi
plena je ĝoj'
longa ebri'
ni, ni, ni

Lu Jixin (1953 -)

Ĉe Disiĝo

Nuba klin'.
Velka pin'.
Frosta vent' disigos nin.
La pase',
sam-ide',
vigla figur',
iĝos pere'?'
Ne, ne, ne!

Trema sin'.
Larm' sen fin'.
Kion kovas la destin'?'
Ĉesu ve'!
Jen ni ge',
ĝis la revid'
per nia kre'!

Re, re, re!

Sopirĝemo en Aŭtuno

**Sorĉa mond'.
Vana songĝ'.
Pezas en mi vea hont;.
Sur viv-dun'
velkis jun'.
Jam tempion
lekas aŭtun',
nun, nun, nun.**

**Kruta mont'.
Bola ond'.
Vadas jen mi vagabond',
tra tajfun'
kaj tra zum'
mi serĉadas:
kie fortun'?'
Fum', fum', fum'.**

Xuexun

Amo

**Pasa am'
pala flam',
vekis min debila gam'.
Mi ja tre
scias ke
muro staras
inter nig e
Ne, ne, ne.**

**For a am',
iras jam,
ĝenis vin pala flam'.
Ni ja tre
konis ke
ne revenos
brula pase'.
Ve, ve, ve.**

Zhuang Qixiong (1962-)

Mono

**Krima mon',
misa don'.
Hontis li mensa burĝon'.
Kiu tre
kredis ke
devig' eduk'
vivas vere?
Ne, ne, ne!**

**Kara mon'
per admon'
vekos geknabojn el bon'!
Ĉu vi ne
volonte
feliĉas pro
ĉiam obe'?'
Ve, ve, ve!**

2006.3.5

Nomo

**Bona nom',
glora grom'.
Ebria flirtas arom'.
Ĉu nepre
brilas fe'
kun ĵaluzo
ĉe apoge'?'
Ne, ne, ne!**

**Fia nom',
kora hom'
pentas pri sia fantom'.
Kiu ne
scias ke
viva akvo
fluas ĉie?
Ve, ve, ve!**

Pano

Saĝa pan',
ne per man',
donas vin per uragan'.
Ĉu certe
falos de
ĉiel' oro
kiel trofe'?
Ne, ne, ne!

Ama pan',
kora ban'.
Interĵuris en kaban'.
Kiu ne
volas ke
dolĉa amo
vivos longe?
Ve, ve, ve?

Krio

Pika voĉ'
kun diboĉ'
sonis kiel senriproĉ'.
Ni ja tre
kredis ke
oficistoj
vivis ŝpare?
Ne, ne, ne!

Muta buŝ',
surda tuŝ'.
Verŝis larmojn kiel duŝ'.
Vi kri' de
frost-vent' ĉe
oficejoj
aŭdis bone?
Ve, ve, ve!

Changxiangsi (Longa Sopiĉo)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po kvarversoj de 3, 3, 7, 5 silaboj kun kontinua rimo.

Eto

Fatalo

via fid'
kaj konfid'
kuraĝigas por decid'
de ama avid'

en ĝojrid'
sen divid'
l' amo iras kun rapid'
al fina perfid'

Longhara Fraŭlino

najbara
longhara
ŝi 'stas kun amo kara
idol' nektara

sol-stara
amara
mi kun larmad' malŝpara
sen kuniĝ' para

Pluv' en Marto

gutbate
silkdirate
pluvetas delicate
longe ĝissate

laŭdate
flu-glate
memoro paŝas kate
miksiŝ dilate

Even

Vintra Songô

**Vi venas,
Mi venas.
Ni turne ĉirkaŭ prenas.
Kaj lage remas.**

**Vi svenas.
Mi ĝemas.
Min songô daŭre trenas.
Kiu komprenas?**

Por Morgaŭ

**mia ven',
via ven',
por nek solen' nek festen'.
Ni agu sen ĝen'.**

**Via ben',
mia ben',
ĉinesk' de l' ĉina haven'
velu al mon-scen'.**

Komencantino

Larmoj en Songô

**sincere
espere
kun amĵur' ĉerivere
per promes' vere**

**kolere
sufere
pro rompiĝ' maltolere
nur efemere**

L. Aĉjo

Konatiĝo

**Mi mutas.
Vi mutas.
La kapoj ambaŭ krutas
Rigardojn ŝutas.**

**Pluv' gutas.
Dir' gutas.
Kaj kiam koroj flutas,
Nin ardo glutas.**

Lily

Atendo

**suspiro
deliro
turmentas min sopiro
kun kora ŝiro
inspiro
aspiro
konkeras min akiro
alia viro**

Lu Jixin

Amikeco

**Per am-kis',
sub am-kis',
ebeniĝu kora plis'.
Svenu ĝen-latis'!**

**Arde bis!
Arte bis!
kor' ĉe koron ni sendis
iru tra makis'!**

Niuniu

Kion Ni Diras

**diras vi:
poezi'
kiel flirta papili'
sen ajn ambici'**

**diras li:
fantazi'
kiel poema seri'
kun granda magi'**

**diras ŝi:
religi'
kiel mensa iluzi'
sen lima lini'**

**diras mi:
ba! vi tri
laŭ arbitra asoci'
ĉio 'stas neni'**

Sero

Roja Fluado

**susure
murmure
ĝi rapidas plezure
kaj bonaŭgure**

**velure
nature
ĝi etfluas klar-pure
glat-veture**

Zhuang Qixiong

Patro antaŭ Tombo Weining

**Ama kor',
larma kor',**

al filino pro dolor'.
Kun sopira flor'!

Ora hor',
plora hor',
nur kiel ĉiela glor'.
Ĉu Dia favor'?

E-movado

Mi puŝu.
Vi puŝu.
E-movado akuŝu.
Neniam fuŝu!

Li guŝu.
Ŝi guŝu.
Ide' nobla ne duŝu.
Mia kor' tuŝu!

Beno

Via pen',
mia pen',
por nek katen', nek ĉagren'.
Al ni kara ben'.

Mia pren',
via pren',
pli agrabla ol ruben'.
Brilu en solen'!

Katastrofo

Pluv' gutas.
Larm' gutas.
Domojn inundo glutas.
Ni ĉiuj mutas.

Kor' lutas.
Am' lutas.
Nov-domoj absolutas.
Vin ni salutas!

Chaozhongcuo (Pedanta Klerulo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun kvar kaj kvin versoj respektive de 7,5,66,/444,66 silaboj, laŭ rimarangô de a,ax,a/xxa,xa (x=senrima)

Eto

Foli' Falanta

**drivadas jen en vento
kun flirta sento
falanta folio
jen dekstren jen maldekstren
ekster ajn atento**

**mia penso
ankaŭ falas
en silento
suben senrevene
ĝis morta momento**

Komencantino

Lupo kaj Ŝafido

1.

**al sama la rivero
pro soifpelo
lupo kaj ŝafido
trinkas en libero**

**ili staris
lup' pli supre
kun fiero
pli malsupre l' ŝafid'
en panik-sufero**

2.

**por regalo avida
je karn' ŝafida
lup' elpensis ruzon
de la plan' insida**

li pretekston

**plektis prete
“vi perfida
besto, kial akvo
mia klare-vida**

3.

**jen malpuriĝas de vi
per ŝlim’ kaj defi’?”
“kiel, oh, mi povus?
fluo venas al mi**

**de la river-
supro via.”
kun tima kri’
la ŝafid’ respondis
kiel trema foli’**

4.

**preteksto venis nova
“per sakro-pova
lang’ vi min insultis
en aŭtun’ ventblova.”**

**“mi ankoraŭ
ne naskiĝis
multemova
en la pufa ventro
de l’ patrino kova”**

5.

**“diablon!” kriis lupo
“vere sen dubo
min insultis patro
via per fek-rubo!”**

**senkulpulon
li tuj kaptis
sen ajn ludo
ĝin formanĝis glute
kun sia best-trupo**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Amoro kaj Frenezo

1.

**Kverelis kun Amoro
de seksadoro
Frenezo sovaĝe.
Tiu kun malgloro**

**donis fortan
vizaĝfrapon,
ke doloro
Amoron blindigis
tuj ĉe tiu horo.**

2.

**Patrino Venus vere
brulis kolere
en animo sia.
Ŝi tuj netolere**

**ĉiujn diojn
jen alvokis
kaj prefere
postulis la punon
de krimo espere.**

3.

**La tribunal' kunsidis
kaj mem prezidis
la diin' Nemezo,
kaj fine decidis**

**la verdikton:
"Lin Frenezo
jam insidis
blindigi, de nun lin
devu sklave gvidi."**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Miĉino(1938-)

Ĵure

**Ni fosu kun verda kor'
kaj kredo, fervor'
La mond' aliĝos,
la tempo pasos for.**

**Sed ni restos
fidela al
li ĝis lasthor'
kaj vivos eterne
pri l' Majstro la memor'.**

Daolianzi (Kanto de Lavantino)

ĉina fikforma poemo el 5 versoj de 33,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo xa, a, xa (x=senrima)

Ardo

Responde al Kara S-rino K

kun danko
elkora
mi benas vin bonkora
jam mi forviŝis splenojn
pro via zorg' fervora

Eto

Velkinta Floro

velkmortas
vi floro
en aŭtuna angoro
ne pro perdita amo
sed por reviva horo.

Rang-Avida

je ŝtupar'
de rango
homoj kun avid-lango
konkuras kaj vetkuras
singardu pri fal-tango

Sufoko

sufoko
pro sento
kun senĉesa turmento
daŭras senfine ho ve
ĝis la tomba momento

Al Ardo

kara Ard'
sen splen'
ne spertis ĝenon en ĉen'
se mi ardas kiel vi
viv' mia plenas je ben'

(Ardo versis:

Kun korŝira longa splen'
certe ne en suveren'
vi sin ŝarĝis per korprem'
kiu donus al vi benon?)

Penso sub Neĝo

— Omaĝe al Espernto

sub neĝo
glacia
eltenas pens' defia
ju pli peza la prefort'
ĝi des pli energia

Helpo al Plantidoj en Kreskado

(ĉina antikva fablo)

kampulo
plenplena
je kor-zorgo memĝena
jen malpacienciĝis
pri kreskado temp-trena

de rizaj
plantidoj
al lia kap' decido
iris por helpi ilin
kreskadi en rapido

surkampe
eltire
altigis unuspire
li rizplantidojn tute

desire kaj aspire

**enhejme
vespere
deklaris li fiere,
“tuttage okupite
mi helpis plantojn vere**

**kreskadi
pli alte
surkampe mi senhalte
laboris pene ĝis lac’
sed mi ĝojas ekzalte”**

**sekvtage
tre frue
li trovis plantojn ĉue
senvivaj en la tero
jam ne kreskadi plue**

Komencantino

Teda Kunveno

**paroloj
senĉesaj
temoj malinteresaj
ĉu kontentaj rezultoj?
Al celoj malsukcesaj!**

La Griloj

**antaŭe
laŭdire
antaŭ Muzoj alire
naskiĝis en la mondo
vivis homoj senmire**

**kaj griloj
je alven’
de Muzoj aperis jen
unuaj kantoj por ĝoj’
kaj plezuro sen ajn ĝen’**

**gril-homoj
ekdronis
en sindona partopren'
en trila ĉirp-kantado
forĝesis pri manĝ-trink-pren'**

**neniam
ili plu
zorgis pri sia viv-ĝu'
tagnokte nure kantis
kun rava muzika bru'**

**neniom
atentis
ili lante prezentis
al si mortan mizeron
kvankam kante talentis**

**senhelpe
destine
ili mortos finfine
kiel homoj, sed grilan
korpon portos difine**

**la Muzoj
donacon
donis por kovri lacon
ke kantadu dumvive
ili por trovi plaĉon**

**ke ili
post morto
alportos kun raporto
“kiu Muzojn tre kultas
kaj honoras laŭ forto?”**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Unueco

**Infanoj
de kampul'
kverelis ĉiam en brul'.**

**Pacigi ne sukcesis
li per riproĉ' kaj postul'.**

**Elpensis
li fine
ion por ilumine
admoni ilin bone.
Per mildaj vortoj li ne**

**persvadis
sincere,
sed faskon li senpere
el vergoj ligis kaj li
ĝin donis senkolere**

**al ili.
Admone
li diris, "Rompu bone
ĝin jen per via mano!"
Infanoj laŭpropone**

**laŭvice
ĝin provis,
sed vane rompi povis.
La vergojn li malligis
kaj popece disŝovis.**

**Li petis
konsile,
ke ili rompu ŝire.
Nature tion faris
ili vere facile.**

**Li diris
kun aprec'
"Se en malpaca maldec',
vi samas ja fragile.
Forto estas unuec'."**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Sam

Stepo

prependas
ĉielo
super sovaĝpelmelo
aperas bovoj, ŝafoj
en herboj dum ventpelo

Acidaj Vinberoj

vinberoj
alt-pendas
vulpon pike turmentas
ĝi ating-saltas vane
“acidaj!” ĝi lamentas.

Ostardo Forfluganta

forflugas
ostardo
el mia fiksrigardo
al varma regiono
por travintra memgardo

Sero

Aŭtun' Lastjara

en friska
zefiro
aŭdiĝis vesuspiro
el junaj geamantoj
ebriaj je sopiro

Zhuang Qixiong

Poeto

**Pro pura
talento,
poetoj kun lamento
plendu per gloraj verkoj
pri patriota sento!**

Sendormeco

**En korto
de silent',
senĉese blovas frid-vent'.
Ne povas dormi dum nokt',
nur pro sonorila pent'?**

Dianjiangchun (Ruĝigitaj Lipoj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj respektive de 47,4,5 / 45,34,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a / xa,xa,a (x=senrima)

Ardo

nokta kanto

**La frosta lun'
griziĝas en nokt-profund'
el mensofund'
bolas am-inund'**

**Ekster fenestr'
vekrias la hund'
ĉu tiu
migra hirund'
Plorus en korvund'?**

Eto

En Aŭtuna Vento

**staras sola
mi en aŭtuna ventflu'
por freŝa ĝu'
sen taga enu'**

**for ŝi iras
ne revenos plu
preĝas mi
je ĉielblu'
ne por rendevu'**

Komencantino

Vento el Okcidento

**forte blovas
vento el okcidento**

**en momento
de arb-lamento**

**la folioj
kun ŝira sento
faladas
en silento
pro vent-turmento**

La Societo de Pluto

1.

**Diiĝinte
Herakl' ĉielen fore
flugis sore
kaj venis glorie**

**al festen' de
dioj ĉi-hore.
laŭ l' devo
ne ignore
li devas kore**

2.

**ĉiun dion
saluti respekt-plene,
sed li ĝene
evitis pene**

**Dion Pluton
saluti bene.
Zeŭs miris
nekomprene
“Kial festene**

3.

**ne saluti
dion de riĉo tera?”
Ton' severa
sonis el vera**

**hero': “Ĉar mi
en band' danĝera
lin vidis**

**oftapera
en tero sfera.”**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Lily

Ĉerizoruĝaj Lipoj

**karne dikaj
ĉerizoruĝaj lipoj
seksallogas
al duraj ŝtupoj**

**aperta buŝo
por hardaj pipoj
invitas
kun tulipoj
al ĝu-disipoj**

Miozoto

**miozoto
neniam forgesu min
pro korinklin’
al alia in’**

**ne pro sekso
mi jam kun obstin’
ŝanĝiĝis
nur laŭ destin’
de amliga fin’**

Rozaj Lipoj

**ŝiaj lipoj
rozetaĵ kaj altiraĵ
al aspiraĵ
koroj viraj**

**avidaj je
ravoĵ eniraĵ**

**kun ĝemkri'
ĝojoj ŝiraj
vokoj senspiraj**

Sam

Tranokta Sendormeco

**kun okuloj
ovraj dum nokta horo
en doloro
kaj kora ploro**

**mi sopiras
al ŝi en foro
sendorme
ho ve floro
mia — trezoro**

Dielianhua (Papilio super Floroj)

ĉina fiksforma verso el du strofoj po 5 versoj de 7,45,7,7 silaboj, laŭ rimarango a,x,a,a,a
(x=senrima)

Ardo

Postsigno de amo

**En fruprintemp' ekscita
Mi vojaĝis
Sudlandon fridan.
mi vidis ŝin avida,
okazis l'amo konfida.**

**Tre svelta kaj sorĉita
La fraŭlino,
Anĝelo rida,
Ho,kial vi jam glita ,
Nur vundo turmentita .**

Responde al Lily

**malsata lupo norde
ne deziras
farigxi lordo
sed volas frapi pordon
por satigi sin morde.**

**ne liton tre komfortan
por ekstazi
voluptajn vortojn
nur krudas per perforto
engluti nur la torton**

Eto

Vaganta Hundo

**vaganta tra homamas'
vagabonde
pro mastra forlas'
ŝteliras en embaras'**

vee mi kiel fatras'

pensas pri inta vivgras'
sole triste
mi kun korfrakas'
sed al hejmŝirma kiras'
aspiras kiel homras'

Sino de l' Maro

ja vastas sino mara
tolerema
kaj senkompara
en akcepto senbara
de akvoflu' malklara

ĉu l' koro ordinara
povas esti
tiel bonfara
por ĉio tre erara
de la amiko kara

Lily

Korŝira Pento

ekvekiĝis pro pento
mi dolore
en trista sento
mian amaton konis
mi en misa renkonto

li ŝajnis en prudento
bonkonduta
kiel bel-gento
ve! la insida tento
min lasis en lamento

Lup' el Nordo

vi, vera lup' el nordo
voluptema
enlita lordo
leke ĉe mia pordo
jam en plena akordo

ekscitiga lipmordo
gvidas min al
amora bordo
en ekstaza korptordo
tute el la korkordo

Niuniu

En Aŭtuna Vento

en vent' aŭtuna frida
dentgrincante
kun korp' rigida
mi forfuĝis sengvida
spite al vent' insida

ĉu ŝi kun kor' decida
min forlasis?
per ag' tepida
ŝi traktis min malfida
kvazaŭ aŭtun' perfida

Dingfengbo (Subigo de Ŝtormo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 5 kaj 6 versoj respektive de 7,7;7,2;7; / 7,2;7;7,2,7 silaboj,
laŭ rimaranĝo aabba / cdeed

Eto

Nerompita Sirenfajfado

Okaze de la 67-a datreveno de Granda Masakro en Nanjing

fajfas siren' akute
silentas l' urb' salute
al viktimoj ĝemplore
ĥore
pro krim' feroce brute

tridekcent mil martiroj
spiroj
iliaj ĉesis jen jam
animoj alten soru
gloru
en memoro por ĉiam

Temp' Silenta

temp' silentas pri folo
juna kun petolo
ankaŭ sintenas tute
mute
pri mezaĝa sort-rola

ĝi same pri maljuna
aŭtuna
malforta olda aĝo
senparolas sen ĝeno
peno
doni pruvon per saĝo

Kaptuko Ruĝa

**en homamas' movplena
en flu' bicikla ĉena
kial en tia loko
moko
min igis tre ĉagrena**

**jen flagras ruĝa tuko
juko
ektuŝis mian koron
ŝi staris ĉe la vojo
ĝojo
vringis mian memoron**

Juneco Forpasinta

**retiri povas ne plu
mi la voston de jun-flu'
ĝoja fola senĝena
bena
temp' forpasis en detru'**

**seniĝis ardo ama
flama
fervoro al laboro
ankaŭ imago bela
ŝvela
ambici' al honoro**

Komencantino

Parazito

1.

**Iksodoj aron post ar'
alkroĉiĝis tra la jar'
firme al vulp' sangsuĉe
buĉe.
Ĝin l' erinac' per bonfar'**

**volis helpi sincere
vere.**

**“Do lasu, ŝparu l’ penon.
Bezonas tiuj jame,
same
kiel antaŭe, plenon**

2.

**ne ĉerpi da sangfluo
mia, ĉar kun satĝuo
jam ili ŝvelas plene
drene.
Se mi per forta skuo**

**forpelus ilin tute
spute,
aliaj sangavide
malsataj are venus
prenus
la tutan sangon ride.”**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Fendieer (Papilio)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 8 versoj de 10,34,334,36 silaboj, laŭ rimaranĝo xa, xa,xxa,xa (x= senrima)

Eto

Buterfloro

**kiel vagabondo en ventpelo
migradas
kun ombrelo
leĝere
flirtante
el ĉielo
fal-haltas
ĉe flua rivero**

**en sovaĝo mi kun hejma celo
serĉadas
en kruelo
de natur'
senlima
malgraŭ gelo
loĝejon
ekvivas en ŝtelo**

Trikolora Porcelano

**ekde antikva Tang-dinastio
naskiĝis
la metio
elfari
per koto
kun magio
trezoron
de la tradicio**

**diversaj figuroj el genio
kreitaj
jen en trio
de farboj**

**buntiĝas
kun radio
simbolas
kreon de Ĉinio**

Komencantino

Longa Atendado

**Sur alta monto staras soforo.
Rigardas
mi al foro
por vidi
amaton
de la koro
reveni
kun brula fervoro.**

**Ĉuis panjo per demandesploro:
kion vi
en pudoro
rigardas?
“Sopiras
en ĉi-horo
mi ame
al l’ arba disfloro.”**

adaptita el Sichuan popolkanto

Miĉino

Papilio

**Post pluv' la floro fariĝis rara,
en ĝarden'
februara.
Pliiĝas
soleco
buduara.
Demandas
ĉi kun pens' amara:**

**"Kial flugas, papilio kara,
nun trans la
mur' senbara?"**

**Dubinde,
ĉu kaŝas
sin ĉijara
printemp' nur
en hejmo najbara?"**

Sero

Bunta Papilio

**bunta papili' de flor' al floro
flirtadas
kun ĝojkoro
leĝere
frivole
por esploro
okula
sen ajna laboro**

**la flugilojn ĝi por vanta gloro
etendas
kun adoro
al ŝajna
florpompo
ne favoro
al ĝi, fi!
tenu ĝin de foro**

Fengrusong (Vento inter Pinoj)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun 7 kaj 6 versoj respektive de 7,5,734,66 / 7,5,77,66 silaboj,
laŭ rimaranĝo a,a,xxa,xa / a,a,xa,xa (x = senrima)

Komencantino

Adiaŭ al 2006

**adiaŭ, jar' vundplena
dolora, splena
mi perdis ardan amon
kun sento
abomena
sen penta bedaŭro
tamen malsevena**

**kie 'stas l' amo bona
vere senĝena
mi soifas pri suko
la dolĉa ĝojotrena
adiaŭ, jar' dorna
la jaro ĉagrena**

Azeno kaj Grilo

**azeno en trankvilo
kanton de grilo
tre ŝatas kaj pretas por
imiti
per la trilo
kaj demandas al li
“ĉu via konsilo?”**

**“kion manĝi, ho grilo
por la voĉbrilo?”
respondo estas “roso”
por voĉo en similo
li nur manĝas roson
mortas de manĝ-stilo**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de K. Kalocsay)

La Trovita Hakilo

1.

Kune vagis homoj du.
Trovis la unu
hakilon sur la vojo.
L' alia
kun ĝoja ĝu'
kriis, "Ho, hakilon
ni kune trovis, ĉu?"

Li diris kun voĉa bru',
"Ej, amiko, nu,
ne diru: *ni* trovis, sed
mi trovis." Pro koler-flu'
li ŝovis kunulon
for de lia alglu'.

2.

Venis perdint' rapide
diris decide:
"Ni batos tiun, kiun
forprenis
jen malfide
la hakilon. Diru!"
Trovinto timide

veis, "Ni tuj rigide
vid-al-vide
al pereoj!" Respondis
la alia mokride:
"Ej! Diru, pereos
vi! Mi ne perfide!"

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Inter Du Kverelantoj

Azenon ŝtelis kaŝe
el dom' vilaĝe
sukcese du friponoj.
Pri l' besto
jen malsaĝe
ili ekkverelis,

post disputo, kraĉe

blasfemis alvizaĝe,
eĉ batis draŝe.
Dum ti' fripon' la tria
alvenis eĉ kuraĝe,
kondukis azenon
al foro laŭplaĉe.

(adaptitael *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Lily

Fortika Pin'

al mi plaĉas dika pin'
pro amor-inklin'
vervoplene,fortike
erekta
kiel fer-spin'
en amĝua groto
ĝis ĝojĝema kulmin'

ĝin adoras ĉiu in'
kun pia kapklin'
ve, ne ĉiuj pinarboj
same duraj kun obstin'
kolapsas aŭ falas
laŭ natura destin'

Senforta Viro

jam en brula momento
lia serpento
rigida elstariĝas
tru' mia
kun kontento
malseke sukiĝas
volem' en fermento

lia karna prezento
tuŝas kun sento
mian subon ekscite

eniriĝ' en silento
sed ĝi tuj moliĝas
ba, ba! Impotento

Amato en Songô

I.

en songô nudlibere
nokte somere
amaton mi renkontis
hazarde
li sincere
min brakumis, kisis
karezis konkere

mi sentis kacon vere
solida fere
eniri min penetre
piŝti senbariere
mia piĉ' malsekis
jam ĝuis espere

II.

ni ambaŭ tordis brue
firme alglue
mi laŭte krie ĝemis
senĉese
lito skue
knaris furioze
vibris kontinue

aĥ, bridis sin ne plue
li kriis ĝue
senbare ejakulis
nun mi vekiĝis ĉue
mia suko lirlis
riverete flue

Genglouzi (Kanto de Akva Horloĝo en Nokto)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de 33,6,33,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a;xbb; / xcc;xdd (x=senrima)

Eto

Al Mia Vaganta Frato

frat' mia
por mono
eĉ por miliono
foriris
en solo
sen ajn konsolo

fremdlande
por pano
memoru pri sano
pli frue
sen ĝeno
por hejm-reveno

Komencantino

La Gloro de la Regolo

1.

La aglo
al ĉiel'
sin pafas kiel cel'
aŭdace.
La regol'
kun vantglora vol'

sin kaŝas
sekrete
en plumojn senpete
la aglajn.
En aer'
sen ajna dangêr'

2.

la aglo

stabile
flugpendis trankvile.
Ĉihore
de alte
descendas salte

la regol'
krias jam,
“Donu al mi akklam’,
la reĝbird’!
Alten plej
mi ja flugas, hej!”

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Malsataj Infanoj

rondetaj
okuloj
kun sang-koaguloj
min tuŝas
ĝis larmo
kaj korpa varmo

malriĉo
malsato
ilin per vipbato
torturas
memoru
kaj bonfavoru

Lily

Perfida Viro

vi viro
perfida
kun koro insida
lasis min
korŝira
kun van’ sopira

min trompis

**amoro
kun mia defloro
al diabl'
aĉulo
kun seksa brulo**

Miĉino

Primavero

**Finiĝas
la pado
en nuba blokado.
Jen kaj jen
ekfaloj
de rozpetaloj.**

**Samkiel
rivero
longas primavero.
Meditas
poeto
en kabineto.**

Guizhixiang (Aroma Laŭbranĉo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 11 versoj de 4,54,64,734,444 / 7,54,64,734,444 silaboj,
laŭ rimarangô a,xa,xa,xxa,xxa (x=senrima)

Eto

Espero en Vintro

**vintro morda
superregas
sur tero norda
ĉiujn vivestaĵojn
per neĝ' forta
el centfloroj nur ume'
elstara
ŝoso-porta
etendiĝas
kontraŭ tranĉe
frostoj torda**

**per aromo komforta
ĝi sendas freŝon
al l' akorda
rondo familia
kaj bonsorta
sen bedaŭra
ĝemo kaj sen
viv' aborta**

Jarfina Danko al Mia Edzino

**kara mia
por tuta jaro
la alia
penadis por rondo
familia
sen plendado malĝoja
nur varme
kun kor' pia
bongusta mang'
bona zorgo
vang' radia**

**vi kun sent' emocia
donas subtenon
sen dub'ia
al mia lingv' kara
kun racia
kompren' kaj konfidemo
per verket'
poezia
mi esprimu
dankon al vi
kara mia**

Komencantino

Aroma Osmanto

**osmantfloro
kun delikata
bonodoro
sin vestas en flave
ora koloro
en zefiro aŭtuna
vi skuas
en rid-gloro
allogante
abelaron
por laboro**

**gepar' vin per adoro
ŝatas pasie
kun fervoro
ĝuas vian aromon
ĝis sat-angoro
ĉasas unu alian
ĉirkaŭ vi
en malforo
kun arĝentaj
rid-serioj
en sonoro**

Azena Hufbato

Jen enlite

kuŝis leono
turmentite
de malsan' kaj oldo.
Pervizite
apro venis por venĝi
pro lia
krimo kvite,
lin vundtranĉis.
Venis taŭro
senhezite

kornpikis laŭmerite
sur lin vundegon.
Senevite
azeno alvenis
ĉionspite
hufbatis lian frunton.
Leono
diris cite
“Mi preferus
mortaĉi ol
vivi frite.”

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalosay)

Lily

Dorm' en Pluvo

en pluveto
mi dormas dolĉe
kun sekreto
de geiĝ' en sonĝo
ama reto
min ĉiam kaptas firme
solide
en kvieto
sen hezito
sen laceco
sen ĉesiĝo
ni ludas je ripeto

geiĝe pet' post peto
longa kareso

lipmordeto
korpaj turniĝadoj
vort-koketo
ĝis enira esploro
entra
kac-ĵeto
bone, bone
revene al
dorm-dieto

Knabino de Sol-Patrino

panj' kruela
enŝlosas min en
spaco ĉela
for de amiko
la miela
ĉu mi severe kulpas
en faro
tagohela
varma kiso
brakumado
ĝu' ĉiela

nur ludo bagatela
mi sentas iom
min amcela
tamen vi persvadis
neribela
ĉu mi nun povus montri
min tiom
nefidela
ĉio estas
nur burĝono
ama bela

Tao Yuanming (365-427)

Drinkado

En hom-mondo,
sed sen la bruo
de hom-rondo

**kaj knarad' de ĉaroj,
mi en monto
trankvile vivas pace.
Do ĉui?
La respondo
estas: koro
en kvieto —
jen la fonto
de trankvileca fondo.
Ĉe l' eosta heĝ',
per tranĉ-tondo,
plukas faskon mi da
lekantfrondo
kun suda mont' en vido.
Vespere
kun volonto
birdoj flugas
al nesto por
am-renkonto**

trad. **Sam**

Haoshijin (Proksimiĝas Bona Afero)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 4 versoj de 56,65 / 75,65 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa / xa,xa (x = senrima)

Bonkoro (Gu Cunhua)

Flustro de Amoro

Ĉio en ignor'
Eĉ batado de l' kor'
Pupiloj en fikso
Kia fola hor'
Ondadu vi sampano
La flus' ekas for
Ho vi parulino
Mi ne estu sol'

Eto

Sunlumo en Vintro

varmo en frido
penetras en koron
mortigas enuon
vekas fervoron

sango en ĝoja bolo
spronas laboron
forpelas ĉagrenon
viglas humoron

Fiera Anser'

kun kol' al ĉiel'
la fiera anser'
gake gake kantas
gaje en river'

ĝi remas en verda akv'
en plena liber'
jen blanka figuro
en glaŭka mister'

Novjara Tago

**samideanoj
avancu sen halto
je komenc' de jaro
por nova salto**

**pretigas vin memfide
sen ajn ekzalto
klopodu elane
al cela**

Guozhu

Hurao al Chang'e N-ro 1

(2007-10-24)

**Grava evento
en ora aŭtuno ---
Lanĉas vojaĝo de
Chang'e al luno!
Realiĝas miljara
rev' en fortuno.
Komenciĝas nova
paĝ' ekde nun.**

Komencantino

Revido

**ĉe stacidomo
vi alvenas kun flor'
vi brakumas min kun
raŭka voĉ' en plor'**

**ĉu pro sopir' aŭ plendo
aŭ ŝirita kor'
ne plu apartiĝu
por la bonhumor'**

Vento kaj Suno

1.

Suno kaj vento
kun decido vetis,
kiu fortas eĉ pli,
kaj celon metis

al senvestig' de homo.
L' unua pretis
vento: sian spiron
ĝi jen kunĵetis.

2.

Ĝi blovis forte
laŭ la tuta povo
senvestigi homon,
sed ju pli l' blovo

freneza, des pli kroĉis
per firma movo
li la vestojn volve
per plejd-enŝovo.

3.

Rezigni vento
devis kontraŭvole
pro la malsukceso.
Suno venis ole.

Eklumis ĝi trankvile
disverŝis mole
helon dekomence
kaj jen frivole

4.

laŭgrade ardis
ĝia varma helo.
Homo senvestiĝis
ekde mantelo

ĝis la ĉemizo ene.
Pro ard-kruelo
li eĉ plonĝis akven

por varmeg-pelo.

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Inter Du Virinoj

1.

**Mezaĝan viron
tre matura damo
jen delogis kaj li
falas en amo**

**samtempe kun fraŭlino.
Zorgon de samo
du virinoj montris
pro flata flamo.**

2.

**La harojn ili
al li flegis pene
kaj la viro sentis
sin juna plene.**

**La dam' eltirs brunajn
harojn senĝene
kaj l' fraŭlino grizajn
harojn malbene**

3.

**al olda knabo.
Dank' al flego hara,
la mezaĝa vir' sin
sentis amara,**

**ĉar pro eltir' de haroj,
la kapo kara
jam fariĝis kalva
de ag' fuŝfara.**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Miĉino

Salikfloroj

Pompa printempo.
Sur ĝardena pado.
flugas kun zefiro
jen miriado

da flirtaj salikfloroj
kaj per kisado
nin atakis, venkis
la kis-invado.

Niuniu

Mia Aŭto

sonĝas mi pri aŭt'
kiel ĉiu homo
ne por min priglorigi
per vanta nomo

ĉiam mi fantazias
en aĉa domo
l' aŭto pendas kiel
aera pomo

Sero

Unuafoja Flugvojaĝo

korptreme ŝvite
per fluga vojaĝo
kun saltbatanta kor'
sen ajn kuraĝo

ĉio en danĝero granda
kial en kaĝo
mi min donas vole
sen viv-domaĝo

Heshengchao (Gratulo al Sankta Dinastio)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj de 4 kaj 5 versoj respektive el 7,5,75 / 44,5,75 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa / xa,a,xa (x=senrima)

Komencantino

Rano kaj Bovo

1.

**La rano ĉe kamprando
bovon de granda
korpa vidis, enviis
ĝin kun glorkanto.**

**Ĝi la haŭton
antaŭ bando
rana sur lando
ĉelaga blovis plene
ĝis ran-giganto.**

2.

**“Ĉu mi dikas impone
pli?” ĝi altsone
deklaris. Ranidoj “ne”
diris admone.**

**Ĝi sin streĉis
pli, aldone
ĉuis, “Fripone!
Jen kiu nun pli grandas?
Ne gapu ŝtone!”**

3.

**“Ne pli granda ol bovo?”
Per tuta povo
ĝi strebe fortostreĉis
al plena blovo.**

**Ĝia korpo
kun premŝovo
de vana provo
grandiĝis pli kaj pli ĝis
ekkreva movo.**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Miĉino

Drinku

**Bedaŭras pri hararo
spgul' en halo
matene nigra, sed nun
sub neĝvualo.**

**Do, ne lasu
ke l' pokalo
sub lunkristalo
restu nur duonplena
en karnavalo!**

Hexinlang (Gratulo al Novedzo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj respektive de 5,344,76,7,78,33 /
7,344,76,34,78,33 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xxa,xa,a,xa,xa / a,xxa,xa,xa,xa,xa (x=senrima)

Komencantino

Ĉina Nupto

**ruĝa koloro
simbolas
feliĉegon
laŭ la moro
ĉina nupt' ruĝ-farbita
— nacia trezoro
novedzin' kiel floro
novedzo bonaspekta
debutiĝos en honoro
feliĉe
en gloro**

**en nuptofesta horo
amikoj
kaj parencoj
el lok-foro
prezenti mon-donacojn
kun benad' en ĥoro
orgi' en
bonhumoro
ĝis plena ebriiĝo
ĝis kontenteco en koro
ĝis taga
aŭroro**

Lily

La Unua Nokto de Nupto

**kun batanta kor'
vi grimpas
en la liton
por ĝua bor'
hasteme senprudente**

turnas ĝin per esplor'
ba, mia stulta sinjor'
sen incita ludado
ankoraŭ mi restas en hor'
sentsenta
al amor'

vi ne scias pri ĝu-hor'
bedaŭre
ejakulas
kun malhonor'
mi gvidas vin al bola
ludado kun fervor'
via kac'
re en labor'
en suka tru' petolas
mi prekaŭ mortas de deflor'
feliĉa
en dolor'

Mi Rajdis

en geiĝa ĝu'
li pozis
min rajdi sur
lin per instru'
li eniris min tuje
jen kun gargara bru'
lin mia valvo kaptis
lubrikite per suka flu'
ektreme
la bambu'

rigide etendis plu
ĝemkrie
el ni ambaŭ
en la tru'
bruladas lia kaco
ekspasmas en sku'
"movu, beb'!"
je la situ'
sida mi movis supren
malsupren sen ajna tabu'
ververa

ge-kongru'

Alies Novedzo

**en mia sino
enlite
ĵuris vi ke
laŭ destino
ni baldaŭ geedziĝu
tiam en vagino
vi estis kun obstino
mi sciis, ke vi trompas
min per falsa aminklino
ki' estos
ĉe fino?**

**verŝajnas, ke putino
mi estas
por amludo
en bikino
finfine mi jam trovis
ke vi en fascino
ebrias
pri virino
kokete kaj frivola
vi nun trovas vin en nova
amora
uzino**

Heyebei (Lotusfolia Taso)

ĉina fiksforma poemo el 6 versoj de 6,2;3;7,2;3 silabj, laŭ rimarango aabccb

Eto

Krizantem'

la blanka krizantem'
kun tremo en vent'
kvazaŭ simpla poem'
sen ĝem'
sen lament'

Komencantino

Ĉe Pramejo

rivero senbare
klare
forfluas
inter ondada skvamo
pramo
tang-skuas

Sub l' Ombrelo

pluve sub l' ombrelo
belo
knabina
gluas al knaba flamo
amo
senfina

Lily

Senfolia Arbo

kiel nuda virin'
en sin'
senviva

**sub voluptema turment'
de vent'
lasciva**

Niuniu

Adiaŭ al Amatin'

**adiaŭ, vi longhara
kara
amatin'
mia stelo espera
vera
korinklin'**

Sam

Rano en Puto

**sidas pute rano
nano
sen vido
nur ĉiela lumfasko
nasko
de fido**

Huanxisha (Silk-lava Rojo)

ĉina fikforma poemo el du strofoj po 3 versoj kun 7 silaboj, laŭ riaranĝo a,a,a / xa,a (x= senrima)

Ardo

Jarfine

Alternis la sezonoj
jam pasis jar' sen tono
mi vivas sen la kronon

Novjaro baldaŭ venos
mi volos fari bonon
sed ĉasos ne redonon

Komencantino

Hermes kaj la Lignohakisto

1.

Hakisto ĉe rivero
la hakilon el fero
faligis akven. Kvero

de rimors' lin konfuzis.
Staris kun malespero
li, preĝis kun sincero.

2.

Hermes dum preteriro
vidis lin kun korŝiro.
“Kial vi kun suspiro?”

Sciiginte pri tio,
orhakilon kun brilo
li portis per eltiro

3.

el kv'. “Ĉu estas via?”
“Ho, ne! Ne estas mia!”
Respond' honestis lia

**El la rivero Hermes,
sen sento apatia,
jen per fojo alia**

4.

**portis arĝenthakilon.
“Ricevu vian ilon!”
“Ne. Trovas malsimilon**

**grandan mi nur kun mia!”
Hermes laŭdis humilon
liajn kaj kor-trankvilon**

5.

**antaŭ riĉec’ favora.
Li sen intenc’ esplora
fine kun laŭdo kora**

**portis lian hakilon.
Jesis per voĉ’ sonora
dankis al di’ honora.**

6.

**Hermes pro l’ honesto,
kontraŭ lia protesto
lin donacis per resto**

**de du hakiloj brilaj.
Surdorse kun il-kesto
reiris al hejmnesto**

7.

**treege li ĝojplene.
Sekvan tagon matene
rakontis li senĝene**

**l’ aferon al kunuloj.
Unu el ili ene
forte brulis tamene**

8.

per monvora avido.

**Li iris en rapido
al river' kun insido.**

**Hakilon li forĵetis
en riveron sen vido
kaj ĝemis en acido.**

9.

**Nu, Hermes ĝuste tiam
preterire vidis jam
la hakiston en ĝem-dram'.**

**“Kial vi kun suspiro?”
Tiu kun dezira flam'
respondis kun avidam'.**

10.

**Sciĝinte pri l' afer',
do Hermes el la river'
portis al la seka ter'**

**orhakilon kaj ĉuis,
“Via? Laŭ via esper'?”
“Ho, jes. Jen ĝin je sufer'**

11.

**atendis mi ĉagrene,”
la homo diris ĉene.
Hermes tiam komprene**

**travidis la homaĉon,
forportis ĉion plene.
Tiu veis revene.**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Kurioza Kulto

1.

**Buston de Hermes tenis
metiist' kaj ĝin benis
per preĝoj, ĉiam penis**

seniĝi je malriĉo,
sed ĝi lin ĉiam ĉenis.
Pro kapric' li ekprenis

2.

la buston kaj kolere
frapis senkonsidere
teren. Rompiĝis ere

la kapo, kaj orpecoj
elŝutiĝis apere.
Li ilin ĝoj-ofere

3.

kolektis en rapido.
“Ho Hermes, kia vido!
Vere stranga decido!”

li kriis, “Vi ignoras
kulton, sed je perfido
vi min dankas kun fido.”

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Maŭnan

Nokte

Nova lun' sur firmament',
reve mi jam sur krescent'
vagas tra la stel-torent'

Ĉu vi dolĉe dormas nun?
Mi do remas en silent'
vian songon post moment'.

Jiangchengzi (Riverborda Urbo)

ĉina fikforma poemo el du strofoj po 8 versoj de 7,3,3,45,733 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,a,xa,xxa
(x = senrima)

Eto

Mi Volas...

**mi ja volas kun prefer’
por liber’
kaj esper’
forfuĝi de
la vulgara ter’
sole kaŝita de l’ mond’
izole
en kastel’**

**mi volas en efemer’
de sufer’
kaj danĝer’
malproksimi
por verda afer’
esperanta estonta
marŝanta
al prosper’**

Komencantino

Papilia Kiso

**mi papilian kison
deziras
akiras
mia amat’
ĉu mi deliras
en sonĝo? via kis’ min
altiras
inspiras**

**vi foren por nombrilo
foriras
mi miras
mia amat’**

ke eĉ vi ŝiras
mian koron senscie
ho ve mi
suspires

La Avarulo

1.

Vendis ĉion l' avara
monŝpara
splithara
homo, kaj li
ŝanĝis per kara
la mono ricevita
por or-bulo
senpara

en grandec'. Bizara
senkompara
amara
konservado
de oro vara
estis ĝin enterigi
en loko
najbara.

2.

Konstante li reiris
admiris
li miris
pri ĝi ĝoje.
Tiam babilis
oni pri la sekreto
kaj iu
akiris

ĝin ŝtele kaj formigris.
Harŝiris
plorŝmiris
pro kolero
peze suspiris
l' avarulo tuttage
ĉagrene
deliris.

3.

**Iu diris favore
fervore
konsole:
“Ĉesu tristi!
Enfosu sole
ĉi ŝtonon kaj rigardu
ĝin vere
valore**

**kiel or-bulon kore
adore
memore.
Ĝi ja ne plu
servas memvole
nek tre utilas al vi.
Kial do
trezore?”**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Jiangnanchun (Printempo Sude de Rivero)

ĉina fikforma poemo el 6 versoj de 3,3;5,5;7,7 silaboj, kun para rimo

Ardo

Rimgratulo

—Al s-rino Komencantino

Penige

kaj flame

vi ĉineskigas

la fablojn fame.

Impone mi aplaŭdas,

gratulas vin ĉiame!

Eto

Surstrate

surstrate

nud-krure

povra vaganto

tamen plezure

malrapide senlace

stratumas senveture.

Ebrieco en Amikeco

monata

renkonto

inter kolegoj

amikeca ponto

helpas al interkompren'

al vasta horizonto

Guozhu

Rimgratulo

Pretigis

sukcese
Komencantino
fablojn senĉese.
La tridek ses ĉineskoj
imponas nin imprese!

Komencantino

Vino de Vivo

naiva
knabino
iĝis matura
pro viva vino
logita de l' mond', ŝia
kreskadas korinklino

La Cerbo

Leono
langvore
kuŝis malsane
la vulp' favore
lin flegis ĉe la lito
tagnokte ĉedeĵore.

La reĝo
de besto
diris: "Murdis min
malsat' molesto
ĉar mi ne havas forton
ĉasi por pred-aresto.

Nur vi min
el amar'
povas elsavi.
Funde de l' arbar'
tre bela cervo vivas
kun tre delicata flar'.

Tutcerte
vi ruzul'
rimedon havas

per saĝa kalkul'
allogi cervon kiel
bonan predon laŭ postul'."

Kun plano
insida
vulpo vizitis
per kur' rapida
la cervon. Genuflekse
kun mieno flat-rida,

li diris:
"Alportas
mi bonan novon:
reĝ' preskaŭ mortas,
daŭriganton elektis.
Aŭdu, kiu bonsortas."

"Ne taŭgas
la panter'
pro troa impet'
nek, venas prefer'
al stulta apro nek al
ventkapa kapr' kun fier'.

Ĉu tigro?
Kruela
kaj tro vantega."
Per lang' miela
li daŭrigis: "La urs' ne
indas pro pigr' modela."

"Jen, cervo
plej bona
reĝo fariĝos
kun korp' impona,
timigaj kornoj, longa
vivdaŭr' kaj voĉ' belsona."

"Finfine,
kiel reĝ'
vi elektitis
laŭ arbara leĝ'.
Min ne forgesu, kiam

vi jam sidos sur tronseg'!"

**"Adiaŭ,
glora cerv'!
Leon' atendas
nun por mia serv'.
Kiel lia konsilant'
mi penlaboras kun verv'."**

**"Ankaŭ mi
servpreta
estos konsilant'
via diskreta.
Nu, ĉu vi bonvolus lin
viziti konsilpeta?"**

**La mensog'
altira
lin tute trompis.
Jam altspirita
li ekiris al la grot'
leona mister-spira.**

**La leon'
avide
jam atendis lin
sed trorapide
iome lin atakis
kaj maltrafis perfide.**

**Per ungoj
orelon
de cerv' li kaptis
kaj vidis celon
eskapi kun la vundo
en arbaran ŝirmŝelon.**

**"Ej, ej, ej!"
deprime
vulp' nur gestadis.
Eĉ de proksime
la bona pred' forfuĝis
sin kaŝis panik-time.**

Leon' pro
ĉagreno
grumblis plende pri
ventra malpleno.
Li ree petis vulpon
por ruz' de predo-preno.

La vulpo
kun cerbo
plej ruza monde
voĉis kun certo
malgranda: "Malfacile!
Do, mi provu per lerto."

Intrigon
denove
li planis kaŝe.
li serĉis trove
post longa voj' la cervon
por fari pacon prove.

Cerv' kriis
ĉe renkont':
"Ĉu vi kuraĝe
alvenis kun hont'
farinte al mi krimon?
Fi al via bel-rakont'!"

"Stultulo
alia
fariĝu reĝo!"
Vulpo, kun pia
mien', respondis por lin
trompi kun cerb'senscia:

"Vi certe
poltronan
koron eĉ havas
kaj vian bonan
amikon kalumnias.
Pripensu l' seĝon tronan!"

"Paciĝu
trankvile!"

**Li, mortanta patro,
volis konsile
paroli flustre kaj vin
peti aliri file.”**

**“Li volas
instrui
kiel la regnon
gardi, konstrui,
sed vi fortiriĝis kaj
l’ orel’ forŝiriĝis tuj.”**

**“La reĝo
pro tio
tre indignis, ke
vi ne kun pio
lin fidas, kaj decidis
ke lupo — la skabio —**

**estiĝu
la nova
reĝo de l’ regno.
Tiu plag-kova
lup’ alportos malbonon
al ni per krim’ ĝen-ŝova.”**

**“Pri via
eraro
vi povu fliki
ĝin kun bonfaro
per alia vizito
al reĝ’ kun pek-deklaro.”**

**“Mi ĵuras
je l’ ĉiel’
ke mi mem amas
vin ja kun fidel’.
Ankaŭ reĝo vin ŝatas
sen ajna malbona cel’.”**

**“Se farus
tion vi,
li reĝigus vin
ja kun emoci’.**

al vi li ne malbonas,
sed favoras kun pasi'."

La cervon
l' alloga
trompo moligas
per dir' mensoga.
Li ekiris laŭ parol'
de la vulpo aroga.

Ĉe l' faŭko
de la kav'
okazis veaj'...
De leon' sen sav'
voritis cerv' ankoraŭ
en la reĝiĝa ravo

Dum manĝad'
de l' leon'
vulpo rigardis
kun saliv-fordon'
kaj flaradis avide
en maĉa glutada son'.

Jen la cerb'!
Li ŝtele
ĝin manĝis tute,
jen sin iele
kontentigante buŝe
por lia pen' miele.

La leon'
kun nervo
ekscita serĉis
cerbon de l' cervo.
"Kie ĝi estas, kie?"
Li eĉ kriis kun vervo.

Respondis
sen konfuz'
klarige vulpo,
renoma majstro de ruz':
"Ho reĝo, via serĉo
estas vana sen obtuz'."

**“La stultul’
havas ne
cerbon enkape,
ĉar senpense tre
li envenis dufoje
en ĉi groton kun obe’!”**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Kien Vi Rajdas?

**Sovaĝis
ĉevalo,
kaj rajdanto ĝin
povis al stalo
ne konduki sukcese.
Ĝi galopis en malo**

**freneze,
li ne plu
ĝin povis bridi
je kurega ĝu’.
Vidante tion, iu
ekkriis per voĉa bru’:**

**“Al kie
rapide
vi rajdas tiel?”
Kien senbride
la besto kuras vole?”
Ne oni kredas fide:**

**Ĉevalo
ja kuras
kun ampasio
aŭ ĝi plezuras
je profitĉas’, arogo.
Deziro ĝia nuras.**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Sam

Kapti Tigridojn

**la homo
kun bravo
akiros idojn
en tigra kavo
dum ne malkuraĝulo
povus kun tia have**

Jianzi Mulanhua (Mallogigita Melodio Magnolia)

Ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 4 versoj de 4,7;4,7 silaboj kun para rimo.

Eto

Sopiro en Vintro

**en malvarmo
pensoj venas en svarmo
al somero
al legoma prospero**

**al marplaĝo
al ĝojplena dorsnaĝo
al la sudo
al ŝvita tors' en nudo**

Komencantino

Jen Rhodos!

1.

**Jen atleto
pigris en lud-ripeto.
lin primokis
oni kaj lin provokis.**

**Formigris li
alien pro ironi'.
Post reveno,
li blagadis en ĉeno.**

2.

**“Ĉie gloron
akiris mi adoron!”
Li fiere
diris, “En Rhodos vere**

**alton tian
mi transsaltis kun elan',
ke venkantoj**

Olimpiaj per kantoj

3.

prilaŭdis min.
Kaj ĝojis jen ĝis kulmin'
l' urbo tuta
kriis per voĉ' akuta.

Se ĉeestus
vi, tion vi atestus."
Tuj subite
kriis iu invite,

4.

"Nia hero'
ne plu babilaĉas tro.
Ne atesti
ni bezonas, sed festi

la solenon
ĉi tie. Jen plenpenon!
Nu, jen Rhodos
saltu por hura-kaos'!"

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Mandio

Flagranta Lamplumo

el malproksim'
mi kun elkora estim'
al la lamplum'
rigardas sen palpebrum'

ĉiutage
l' oldulo ne senage
penlaboras
kultivas kaj esploras

Niuniu

Norda Vento

norda vento
kun frostiga turmento
blovas forte
centflorojn vundas morte

sen kompato
sen softa delikato
bru-muziko
kun ĝisosta tranĉ-piko

Nemalaperebla Rido

—funebre al Ma Ji, ĉina amuziga majstro

brila stelo
falas kun glora helo
rid' vekita
de li restas merita
figur' lia
en nia rond' nacia
por eterne
en la memor' interne

Shi Chengtai

Ĉu pri kiso

Telefono!
ĉiam de l' vira sono.
Jen skrupuloj
de mi en la okuloj:

"Rendevuo
atendas vin? Vakuo
al mi lasas..."
"Ne!" via kis' amasas.

Kuxiangsi (Profunda Sapiro)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 8 versoj de 7,33,8,33,33 silaboj, laŭ rimarango a,xa, a,xa,xa (x=senrima)

Ardo

AL S-rino Lily

kiel dezir' ŝlosita
soifo
koita
al amo jam perfida
pasio
ekscita
eksplodus
subite
seksĝuo ensorcĉita
volupto
surlita
senvesti sin nudita
post distro
senbrida
soleco
pakita

Lily

Deziro de Vidvino

longe en viv' ŝlosita
ne viro
vizita
kun seksa deziro spita
nur pago
incita
momento
profita

kunĝuo aspirita
soife
enlita
por fortika kaco glita
en borad'

plenŝvita
ververe
koita

Mi Mortu en Via Sin'

amrad' ĉe jara fin'
eksploĉaj
boraĵ kvin
donis ĝu' en mia vagin'
vole mi
sen abstin'
mortu en
via sin'

ebria en volupt-vin'
soifa
korinklin'
al rava orgasma kulmin'
mortu mi
kun destin'
mava en
via sin'

Ret-Amo Romantika

mi ardas per sentflamo
de bela
ret-amo
sen reala amor-dramo
nek kun ajn
balzamo
de sekso
cunamo

sed ne mankas sent-lamo
tutkorpa
je samo
kiel ge panoramo
jukema
inflamo
bruladas
ĉe mammo

Miĉino (1938-)

Al Kara Jariĉ

kiu benetiktane mempage
pilgrimis al la Jarcenta jubilea UK
(1987-07-26)

**Al homo eminenta
misio turmenta —
Pilgrimado monumenta,
penado silenta,
penado talenta !**

**Vojaĝ' transkontinenta,
sukceso kontenta !
Por jubileo jarcenta,
rekordo legenda,
heroo legenda !**

Langtaosha (Ondo Lavas Sablojn)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 5,4,7,74 silaboj laŭ rimaranĝo a,a,a,xa
(x = senrima)

Eto

Nokta Pejzaĝo ĉe Chongqing

**nokta vualo
nigra balo
lampoj en lum-regalo
kiel steloj ĉielaj
ar' kaj aro**

**lamp-festivalo
en kristalo
leviĝas de montvalo
supren brilaj makuloj
en spiralo**

Even Chen (1963-)

Renkontiĝo

**Ni gaj-tostas por
renkonta hor'.
Ĝarden' replenas de flor'.
Ĉio antaŭa freŝas
en nia kor'.**

**Haste disos for
ni kun dolor'.
Morgaŭ pli punciĝos flor'.
Sed ĉu min akompanos
senfina sol' ?**

Komencantino

Vagonaro de Amo

**ama vagonar'
kun sona knar'
galopas preter kampar'**

senĉese, senrevene
sen ajna bar’

ĝi ne haltas ĉar
la gea par’
pro geedziĝa amar’
eskapos envojaĝe
sen pena ŝpar’

Putoro kaj Kokinoj

1.

Aŭdis putoro
kun ĝojkoro,
ke dronas en doloro
de malsano kokinoj.
Je ĝust-horo

kiel doktoro
la sinjoro
por kuraca laboro
prenas ilojn iri al
kok-sektoro.

2.

Antaŭ la pordo
de la korto,
li frapis ĝin per forto
demandis kokinojn pri
viv-komforto.

Kokina hordo
en akordo
voĉa el unu kordo
repondis: “For! Deiru
ni el morto!”

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Impreso pri Hainan

**ondada lulo
sen nebulo
svarmas hom-akumulo
sidas, staras sur plaĝo
de insulo
mara spegulo
sen makulo
libere en lazuro
gaja ludo, amuzo
sen regulo**

Sceto (1939-)

Ge' en Bano

**Amor-elano !
Ge' en bano;
en pasi-oceano.
Kiel anasoj buntaj
--Ek! en dramo !**

**Erot-vulkano:
vanga flamo;
sieĝata jadkano,
murmure envag-ino...
Fe-nirvano !**

Sero

Vojhakantoj

**ni pioniroj
fortaj viroj
antaŭen sen ajn giroj
ĉiame hakas vojojn
por glat-iroj**

**per fort-tiroj
kun aspiroj**

ni penas je sopiroj
al verda cel-atingo
sen suspiroj

Vadanto (1953-)

Gebaniĝo

Silkan robon for !
Venu, trezor' !
Ajksopare rojen sor' !
Varme plaŭdu al persik'
amora bol' !

Tro incitas ho l'
pavanta flor' !
du-petala sur akv-mol'.
Kiel rava ! al pistil'
la ŝpruc' en fol'.

Vejdo

Stelo Falas

funebre pri s-ro Gu Cunhua, Ĉina Elstara Esperantisto

de nigra ĉiel'
glitfalas stel'
kun vosto de pala hel'
malaperas senspure
sub nuba pel'

kun firma fidel'
sen ajn ŝancel'
vi brilos kiel juvel'
ĉiam en nia memor'
kiel model'

Zhuang Qixiong

Humuro

Ni ŝercu por bon'
kaj lecion'!

**Humur'—plej grava admon'.
Vivan esperon novos
ama burĝon'.**

**Ne hontu pro mon'
kaj fanfaron'!
Humur'—plej efika spron'.
Grandan ideon freŝos
ama sindon'.**

virto

**Li kantetas por
gaja humor'.
Edzin' felicias de flor'.
Sento senlima kuŝas
en lia kor'.**

**Ne lasu lin for
pro freŝa flor'!
Ĉu vi kredas, virt' sen or'
pli bona ol senhonor'?
Plej granda hor'!**

Linjiangxian (Feo ĉe Rivero)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 66,7,55 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,xa
(x=senrime)

Ardo

Povra Memoro

**Mi ŝajne jam forgesas
en ekstaza balo
la ensorĉitan paron
ĉu paseo
portas amaron?**

**la tempo pasis fluge
la povraj petaloj
subfalas en montvalo
najtingalo
kantas amare**

Eto

Spekti Sunleviĝon

**el densa nubaro
ĉe la horizonto
eosta kun ŝajn-honto
iome saltas
ruĝbrila rondo**

**pli alten ĝi grimpas
ol la verda monto
al bluvolba renkonto
ĵetinte lumon
al tuta mondo**

Komencantino

Leona Divido

**1.
vulpo, lup' kaj kato
kune kun leono**

**sin federis por bezono
de konsumado
en ĉas-sezono**

**grandan cervon predis
ili en kanjono
divide kun rezono
leon' predikis
pri la propono**

2.

**“por egale ĝui
ĉar mi 'stas leono
unue por kvarono
mi vere rajtas
la dua dono**

**venas al fortul'mi
ŝuldas tria ono
al leona impono
la resto, ve, al
via dispono.”**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Monedo kaj Pavoj

1.

**La monedo pavis
vante kaj malglore
fanfaronis fervore.
Ĝi eĉ kunulojn
vidis ignore.**

**Ĝi kolektis plumojn
faligitajn fore
de pavoj tre favore
kaj plektis ilin
en siajn flore.**

2.

**Ĝi orgojle paŝis
inter pava rondo,**

**kvazaŭ birdreĝ' en mondo.
En pavoj skuis
indigna ondo.**

**Ili tiris el ĝi
pavplumojn por tondo
de tiu vagabondo,
pelis ĝin for el
vid-horizonto.**

3.

**Deprime revenis
ĝi kun korp' malplena
de plumoj ĉe matena
horo al loko
la malbonvena.**

**Kunuloj forpelis
ĝin per moko ĝena.
Povrulo vantoprena
sin direktis al
fino malbena.**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

La Maljunulo kaj la Morto

1.

**Lignon kolektadis
foje homo aĝa,
malforta, falt-vizaĝa,
kaj ŝarĝo-porta,
al dom' vilaĝa**

**reiris kun peno.
Pro ir' vojaĝa
longa kaj fort-damaĝa,
li neniel en
ĉi kamp' sovaĝa**

2.

**plu eltenis penon.
Metis al la tero**

**li ŝarĝon de sufero,
kaj vokis Morton.
Kun konsidero,**

**venis Morto. “Kial
vi vin kun espero
turnas al mi en vero?”
“Levu ŝarĝon de mi
jen en mizero.”**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Lily

Sopiro

**ĉu vi ja memoras?
karnavala balo
kantad' de najtingalo
freneza ludo
sata regalo
nun ĉio forpasis
belo en vualo
kaŝiĝis en ĝangalo
ne idealo
nure fatalo.**

Miĉino (1938 -)

Memorinda

**Neniam mi forgesis
pri l' rava festeno –
memorinda kunveno
ĉe arka ponto
en Sud-ĝardeno.**

**Forfluis la lunlumo
en akvo-sereno.
Sub ombra florkurteno
ni flutis ame
ĝis frumateno.**

Yanke

En Muzik' de Saksofono

**dolĉe melodia
kortuŝiga sono
fluas el saksofono
sopir' min tiras
al la sezono**

**tiam ni nin ligis
en ama drono
sed nun jam pasis ĉio
kiel muzika
pasinta tono**

Litingyan (Hirundo ĉe Kiosko)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de 6,6,76,56 silaboj, laŭ rimarango a,a,xa, xa (x = senrima)

Eto

Hirundo kaj Hundo

post la kverela rund'
ĉirpas triste hirund'
forpelata kruele
de flavkolora hund'
ili malpacas
pri herbtigoj kaj grund'

por nest' ŝi volas jen
teron en malabund'
por regno li tiranas
kun kontenta profund'
fine nature
ŝi forfuĝas kun vund'

Komencantino

Migraj Birdoj

forflugas al sudo
birdoj pro gel-trudo
por serĉi varman lokon
sen vetera krudo
portempe for de
sia ripozbudo

nun pro mia prudo
mi kiel testudo
ne povas movi paŝojn
for de fi-aludo
mi ŝatas birdojn
en libera nudo

Amo kaj Ĉagreno

**amo kaj ĉagreno
ligiĝas per ĉeno
kiam akordas paro
estiĝas kompreno
inter geuloj
sen ajn mensa spleno**

**en ama edeno
de feliĉa pleno
okazas ofte malpac'
kun morta veneno
ĝis korŝiriĝo
sen ama reveno**

Simio kaj Delfeno

1.

**Vivis hom' kun simi'
ofte ludis kun ĝi
ĝoje, eĉ kunportis por
marvetur' dum feri'.
Jen venis tempest'.
Homo kun energi'**

**naĝis, dum la defi'
provis la beston pli.
Ĝin la delfeno trovis
en danĝera medi',
kaj ĝin prenis por hom'.
Por savi el helpkri'**

2.

**ĝin bone, la delfen'
ĝin surportis sen ĝen'
dorsen al sekura bord'.
Kiam, nu, al haven'
Pireo ili
alvenis sen bonven',**

**ĉuis kun scivolplen'
la delfeno tamen,
“Ĉu Athenano?” “Jes, jes!”
respondis kun kompren'**

blage la simi'
kaj daŭrigis kun jen',

3.

“Eĉ el digna bona
famili' multmona.”
“Ĉu Pireon vi konas
laŭ la nom' impona?”
“Pireo? Certe!
La amik' sindona,

kara kaj patrona,
milda kaj pardona
al mi li ĉiam estas.”
Pro blag' fanfarona
la delfen' ĝin tuj
subakvigis drona.

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Lily

Kiu Tuŝis Mian...

en sonĝo kaptis min
orgasmo ĝis kulmin'
vira kac' en mia tru'
turniĝis kiel ŝpin'
ni ambaŭ strange
geis sen korinklin'

rigida lia pin'
foj-refoje sen fin'
boradis violente
kun insista obstin'
mi obeemis
laŭ ekstaza destin'

Ununokta Amorsperto

I.

Mi ĉe flughaveno
stare kun ĉagreno
atendis amikinon

mian por alveno,
piedojn frapis
kun pensa malpleno.

Okula promeno
kaj homplena sceno
ja min maltrankviligis.
Kia in-azeno!
Esperon perdis
preskaŭ mi ĝis sveno.

II.

Ekkonsciis tuj mi
rigardon kun radi'.
Fortika alta viro
kun plena energi'
fikse rigardis
kvazaŭ en fantazi'.

Ŝajne sciis li pri
mia situaci'.
Signifoplene signis
al mi alveni li.
"Fraŭlin', ĉu vole
foriru kune ni?"

III.

Ĉe enir' de hotel'
lupe li kun kruel'
forĵetis min en liton.
Malgraŭ mia ribel'
peze premis min
kun kisada sigel'.

Li lekis ĉe l' orel'
spasme per korp-ŝancel'.
Mi jam kolapsis morte
dum la korpa duel'.
Nun mi konkludis,
ke li agas kun cel'.

IV.

Li nudigis per ŝir'

**min kun peza elspir'.
Mi atendis senforte
nun l' atencon de l' vir'.
Lin senvestigis
li per hasta fuŝ-tir'.**

**Je mia granda mir',
belaspekta vampir'
li montris sin antaŭ mi.
Tiam mi kun sopir'
male eĉ volis
mi lin en seks-akir'.**

V.

**Jam nun mi sukplena
por geĝu' festena
pretis sen malobeem'.
Jen la kac' promena
ekfrotis tra mamoj
kaj pubo senĝena.**

**Sen fortstreĉo pena,
kac' je hor' envena
ŝoviĝis en vaginon.
Kuris sento svena
tra mia spino
je piŝtado bena.**

VI.

**Korpe konvulsie
mi tordis ebrie
sub la fremda fortikul'.
Li agis manie
kaj sekve haltis
kiel agonie.**

**Mi sentis konscie
ejakulon plie
varmegan en vagino.
Matene magie
li jam senspure
foriĝis glacie.**

Manjiangong (Rivero Plenruĝa)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 11 versoj de 434,344,77,353 kaj 33,33,54,77,353 silaboj respektive, laŭ rimaranĝo xxa,xxa,xa,xxa/ xa,xa,xa,xa,xxa (x=senrima)

Eto

Omaĝe al Zamenhofa Tago

**malfacile
forpasis
jam jarcento
plena je
brava, spita
prominento
plenkreskas nia lingvo
ja per via talento
surbaze
de Fundamenta
idento**

**ĉe festa
momento
en sankta
silento
ni adeptoĵ firmaj
kun konsento
omaĝas benojn belajn
vide al firmamento
respekte
al vi, kun pia
am-sento**

Malsaĝa Avo

(ĉina legendo)

**I
antaŭ longe
du montoj
staris en bar?
al la voj?**

de homoj ĉar
ili devis grimjadi
transen kun peniga far'
decidon
faris Malsaĝ-Av'
en val'

deloki
per fos-fal'
la montojn
kun idar'
tuj sekvan tagon
fosa prepar'
finitis, kaj ekis do
entrepreno sen erar'
laŭplane
malgraŭ sang-ŝvita
malavar'

II

tag' post tago
kun alta
ambicio
per hojoj
ŝpatoj, lia
familio
okupiĝis pri l' fosad'
kun granda energio
saĝuloj
deadmonis kun
racio

daŭre kun
defio
laboris
la dio
potenca gigant'
pri misio
de ilia montforig'
sciis kun emocio
la montojn
delokigis per
magio

Eterna Majstro

memore pri forpaso de Zamenhof je naŭdek jaroj

ni silente
staras por
karmemora
Zamenhof
kreinto de
lingvo glora
en nia vizio li
verkas en pen' labora
asidue
por nia lingvo
honora

li staras
varmkora
sur podi'
valora
de urb' Buljono
de ni fora
laŭtvoĉe paroladas
Ho, eterne verdkora
vi majstro
vivadu kun ni
adora

Lily

Ŝtona Arbaro*

Ŝtona Arbar'
spektakla
ĉina trezor'
tagnokte
en rigide
stara deĵor'
spite al pluv' kaj vento
brava en natur-rigor'
neniom

**ĝenas nek sufer’
nek dolor’**

**kolone
kac-idol’
solide
viv-simbol’
kunĝua ligo
de kor-ĉe-kor’
obeliske al ĉiel’
ĉiam kun levita kol’
ĉina vir’
memoru bone
en bor-hor’**

*Ŝtona Arbaro: unu el ĉinaj vidindaĵoj en Yunnan provinco, fama pro sia arbaro de stalagmitoj.

Vejdo

Rememoro pri Knabeco

Omaĝe al Infana Tago 2007

**tagoj jaroj
forpasis
rememoro
nur svaga
restas ene.
juna koro
ne konis kaj ĉagrenon
kaj ĝenon. Nur fervoro
por ludo
por petolado
ignoro**

**al lac’ kaj
doloro
fariĝis
motoro
kreiva nuna
nokta horo
adventurplena formis
min spitant’ al hororo
plej gravis**

**senscia mia
esploro**

Julio Brila

Okaze de 120-jariĝo de Esperanto

**sunsezona
julio
kalendara
helbrila
kaj samtempe
memor-kara
l' Internacia Lingvo
estas cent-dudek-jara
kun forto
de vivdaŭrigo
senpara**

**ne haltu
senfara
al celo
lumklara
laŭ voj' zigzaga
obstaklara
marŝu, samideanoj,
strebu, kun pen' prepara
por mondo
trans lingva baro
amara**

Neforgesebla Renkontiĝo

Okaze de 2007 ESS* en Chongqing

**Ĉiujare
ĉi tie
en somero
okazas
renkontiĝo
de l' espero.
Parolas esperante
amikoj kun sincero**

**pri spertoj
kaj verd-rakont' kun
fiero.**

**Ja fluas
rivero
de vortoj
kun vero,
sen hipokrito.
En aero
etos' intima regas
sen ioma mistero.
"Saluton!"
venas el kora
prefero.**

** ESS: mallongigo de Esperantista Somera Semajno, kiu okazas en Chongqing somere ĉiujare.*

Zhuang Qixiong

Gratulon al 50-Jubileo de Xinjian Mezlernejo

**Por jubile',
gajkuniĝas
herooj kun honor'.
Ĉie ridas
studentoj en plor'.
Nur ŝanĝiĝoj de viv'
restas pasea memor'.
Vi scias:
Grandmeritoj
nektaras pro or'?**

**Ador'
al hejmland'
estimas S-ron
de bonodor'.
Fruktoj brilas post
kultiva hor'.
Elitoj kunvenas
por amikeca favor'.
Man' en man'
ni muziku
laŭ tempa trezor'!**

Moyuer (Fiŝado)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 12 versoj de 346,76,3,37,4,545/36,6,76,3,37,4,545 silaboj,
laŭ rimarangô xxa,xa,a,xa,a,xxa / xa,a,xa,a,xa,a,xxa (x=senrima)

Eto

Cikonio kaj Konko

sur bordo
de l' rivero
je eko de juni'
konko sin malfermigas
por ĝu' de sunradi'
cikoni'
subite
alplonĝas kvaz' per ski'
por predpremi'
li volas beki
ŝian molon
spite al raci'

tujtuje
fermiĝas firme ŝi
tenas bekon de li
"se tiele vi mortos,"
li deklaras per kri'
"tragedi'
okazos"
ŝi respondis, "vi skabi'
kun kordevi'
ankaŭ mortaĉos"
longa kverel'
kondukas al fi'

Lilak' Purpura

Purpura
lilakfloro
pompe en prospero
disfloras je juli' sen
koketa apero,
fiero.
Aromo

via jen en aero,
super tero
altiras homojn
per freŝiga
senta mistero.

Lilako —
nom' de amlibero,
amika sincero.
Al ni junuloj donas
doton da espero,
prefero
al kuno
vi kiel fe' en vero.
L' atmosfero
lilaka volvu
nin ĝis nia
viva vespero!

Lily

Hazarda Renkont'

butike
venis juna
ul' en fortika tip'
kun volupta okulpar'
-- vere serv-preta ŝip'
la tulip'
--fraŭlino
kun ruĝa seksveka lip'
sen ajn princip'
hazarda renkont'
ligis ilin
per bor-anticip'

en lito
lia solida ŝtip'
serĉis por ina zip'
ĉe vagina kanalo
haŭta vip'
freneze
por geiĝa emancip'
ha maskla rip'
kirlas senĉese

**en la poto
kun diboĉ-disip'**

Amludo

**geparaj
amludantoj
por ama laboro
kveras birde en brakoj
kun batanta koro
odoro
balzama
venkas ilin en ĥoro
man-esploro
spasma trakorpen
komencas jen
l' ekscita horo**

**tutnude
agitis fervoro
en soif-angoro
malmolas birdo, softas
kav' en bonhumoro
trezoro
volupta
emergas en disfloro
kun ĝojploro
birdo en kavo
ĝemkriado
ĝis kulmin-foro**

Tagoj sen Via Ĉeesto

**foriro
unujara
vere per molesto
min turmentas ĉiame
sole en la nesto
foresto
longlonga
via 'stas fidel-testo
al am-besto
sed mi ne tenas
ĵuron plu pro**

amor-aresto

**frat' via
per seksa infesto
el ŝlosita kesto
min tiris por volupto
surde al protesto
kun gesto
incita
al diboĉa incesto
ho! ĝu-festo
pardonon, kara
mi brulas pro
bora tempesto**

Momenta Impulso

**najbare
al mi sidis
belaspekta fraŭlin'
vestita per mini-jup'
en Boeing-flugmaŝin'
al Pekin'
subite
ĝi flugis kun korpa klin'
kia destin'
ŝi timigite
jen per brako
ĉirkaŭprenis min**

**alglue
ŝia supla mampint'
tremis ĉe mia sin'
jen ravo fulme rampis
kuris tra mia spin'
mia pin'
abrupte
ekerektis en fascin'
kun fort-sangvin'
mi do imagis:
se mi estus
en ŝia vagin'**

Nangezi (Suda Kanto)

ĉina fiksforna poemo el 4 versoj de 55,7,9 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a (x=senrima)

Komencantino

Kaprico de l' Maro

I

trankvile blua
plaŭdanta maro
flustre al la homaro
kvazaŭe intima najbaro

II

neatendite
venis koŝmaro
ĝi muĝis kun barbaro
ĉion voras sen ajn bonfaro

Leono, Vulpo kaj Azeno

Leono, vulpo
kune kun azen'
por ataka entrepren'
nun ĉasis en arbara teren'

ili rikoltis
en riĉa plenplen'
do leon' kun ridmien'
prete por ĉasaĵa dividpren'

donis ordonon
"dividu juste,
azeno! ĉu bonguste
aŭ senguste, dividu ĝuste!"

tiu dividis
tuj en partojn tri
ĉiujn ĉasaĵojn kun pi'
"elektu!" pete proponis li

leon' eksplodis
per granda koler'
per-unge ĝin je ofer'

distranĉis kaj manĝis sen toler’

**leon’ sin turnis
por redivido
al vulpo kun konfido
“dividu!” ordonis kun rido**

**vulp’ preskaŭ lokis
ĉion en grandan
amason pred-viandan
por flati leonon komandan**

**“jen ĝusta disdon’
kial vi, kara,
tiele senerara?”
“jen laŭ l’ azena sort’ amara!”**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

La Ursfelo

**Du ĉaskompanoj
dum drinkad’ de vin’
fanfaronis pri fascin’
de la ĉasad’ kun lerta inklin’ .**

**Ĉe apud-tablo
miris pri l’ merit’
la homo kun appetit’
vetada kaj petis per invit’**

**al ĉas’ de ursfel’.
“Ĉasistoj gloraj,
kontraŭ penoj valoraj
jen pagiĝos dudek kvin oraj**

**moneroj certe.”
Kun kuraĝa vol’
akceptis sen ajn parol’
ili por ĉasad-kapabla ol’ .**

**En la arbaro,
ja vidis ili
urson kaj ŝokis kun kri’.
Giganta kun forta energi’**

**ĝi tuj alkuras
por sturma atak'.
Unu el ili per trak'
rifuĝa grimpis arbon kun sak'.**

**Alia tardis,
kaj kuŝis sur ter',
ŝajnigante kun sufer'
morton spite al faŭka sever'.**

**Urso alvenis
snufe flaris lin
ĉe buŝo, vizaĝo, sin'
nazo kaj oreloj je la fin'.**

**Laŭdire urso
ne manĝas mortan
homon. Ĝi la fisortan
forlasis kaj predis vivfortan.**

**Lia akompan'
en l' arbvualo
descendis per saltfalo
ĝojŝercis pri povra rivalo,**

**“Kion la urso
diris ĉe l' orel'
via jen kiel anĝel'?”
La respondo sonis sen kverel',**

**“Ĝi flustri al mi:
ne je la ursfel'
drinku ĝis mortiga cel'
de la urso finos sen ŝancel'.”**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Vulpo kaj Masko

**Surkampe maskon
la vulpo trovis.
Ĝin ja ne koni povis,**

por pririgardi turnis, ŝovis.

Li do rikanis
en ton' acerba:
"Bela kap', sed sencerba,
nur kuŝas sur la tero herba."

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Aglo kaj Vulpo

Agl' federis sin
kaj vulp' amike.
Por ke ĉi lig' fortike
pli firmiĝu, kaj komunike

pli oportunu,
loĝiĝis ili
proksime por babili
ĉiame kaj intekonsili.

La aglo neston
surarbe plektis;
arbuston vulp' elektis
subarbe, per branĉoj protektis.

Sed foje iris
la vulp' el nesto
al kamp' por pred-aresto,
pro manĝaj-mank', kun malhonesto,

aglo alflugis,
vulpidojn prenis
kaj aglidoj festenis
per vulpaĵo. Nu, vulp' revenis,

la okazaĵon.
tragikan trovis.
Ĝi sakri aglon provis,
sed aglo orgojle tordmovis

korpon kaj diris:
"Via kolero

**neniam de la tero
atingos alte en arb-sfero**

**jen mian neston.”
Vulp’ kun lamento
diris: “Al firmamento
mi povas ne en evidento**

**flugi laŭvole.
Kun kolerbrulo,
mi nur per esper-lulo
atendas, kiel al fortulo**

**malfortaj faras.
Toleras mi nun.”
Aglon tamen pun’
trafis pro perfida mallig’ kun**

**vulp’ en federo.
Foje altaro
stariĝis en najbaro
surkampe, en ofer-preparo,**

**kaprido brulis.
L’ aglo de alto
alĵetis ĝin sen halto,
ĝin kaptis, portis per flugsalto**

**al ĝia nesto.
Sed vent’ impetis,
karna ardaĵ’ kroketis
en nesto kaj fajron almetis.**

**La nest’ ekflamis,
ekbrulis arde,
falas kiel petarde
kun aglidoj teren sengarde.**

**Alkuris vulp’ tuj,
manĝis kun ĝuo
ilin je l’ rigard-gluo
de l’ aglo en dolora fluo.**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Nikolao Kurzens (1910-1959)

Veki Veron

**Mi volas vek
Veron informi
ne nur senvole dormi
Estu la viv' ne per
sed por mi.**

Niuniu

Norda Neĝo

**ĉio ŝlosita
de blanka neĝo
etenda al monteĝo
palaj dunoj mute en preĝo**

Sam

Rizgrajno

**en kamp' elkreskas
ĉiu rizgrajno
— ne facilfara ajno
sed per ŝvita laboro gajno**

Yanke

Falanta Folio ĉe Vespero

**en vesperlumo
drivas folio
fale en agonio
jam sen patos' aŭ energio**

Zhuang Qixiong

Paseo

**Pase' kiel fum'
restas en koro.**

**Pri glor',ĝoj' kaj doloro
ankoraŭ ĉe freĉa memoro.**

Senvorta Amo

**Labori pene;
vivi komforte.
Kun ide' granda forte,
al la celo ama senvorte!**

Mia Feliĉo

**Mi volas kuŝi,
profunde dormi,
la ĉagrenon deformi.
Frue venu feliĉo por mi!**

Nanxiangzi (Sudlandano)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 5,7,7,2,7 silaboj, laŭ rimarango a,a,xa,a
(x=senrima)

Eto

Pluvet' Aŭtuna

aŭtuna pluvet'
kvazaŭ de akvgutoj ĵet'
ŝpruciĝas sur la teron
je pet'
de sunbakita subtret'

denove ripet'
de frisk monda komplet'
vualas la mondon per
tutpret'
de aŭtuntema koket'

Komencantino

Survoje de Vivo

sur voj' ebena
sed ofte dornoplena
ni marŝas kun klopodo
pena
kontraŭ obstaklo ĝena

sento ĉagrena
kondukas al venena
glitiga retroiro
ĉena
al startpunkto devena

Malkuraĝo

1.

Pro tediĝo de
vivŝarĝo, stranga ide'
al kapo de leporoj:
"Ni ne
plu vivos kaj por pere'

**droniĝos tuj ĉe
marĉejo, ĉar nenie
vivos pli malkuraĝa,
ho ve,
ras' en la natura kre'."**

2.

**Do al marĉ' ili
iris kune sen raci'.
Sed tie plonĝis rana
naci'
por fuĝi time eĉ pli.**

**"Do reiru ni,"
admonis kun klara sci'
leporo, "Pli poltrona
soci'
vivas en nia medi'."**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Sero

Jarfine

**pensoj en pelmel'
kia lernada nivel'
kiel statas situaci'
la cel'
jam gutis tra cerb-funel'**

**ridetanta hel'
kun pli granda forto-pel'
avancu por pli alta
model'
sed ne ĉiela kastel'**

Zhuang Qixiong

Paro da Hirundoj

**Kun herboj,
por amfar',
flirtas la hirunda par'.
Pro dolĉaj vortoj, nest' varmas,
sun' ĉarmas,
vilaĝknabinoj svarmas.**

* ĉi tiu peco estas varianto de ĉinesko Nanxiangzi, kiu konsistas el unu strofo el 6 ersoj de 33, 7; 8, 3, 7 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,bbb (x= senrima)

Niannujiao (Ĉarma Kantistino)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 11 versoj de 436,436,445,46 / 654,436,454,46 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa,xxa,xxa,xa (x = senrima)

Komencantino

Dediĉe al Ĉineska Rondo

en aŭtuno
orflava
rikolta sezono
en Elerno
helverda
ĉinesk-regiono
etpoemoj
etaj krioj
el jun-burĝono
anticipe
ĝis riĉa fruktdono

furioza vento
ne povas skui
kun bru-sono
vian bazon
stabile
staras kiel ŝtono
vi, kresku, kresku
silenteme
sen fanfarono
iam onte
por monda dispono

Enamiĝinta Leono

1.

La leono
ekamis
knabinon en foro,
kaj sin svatis
ĉe l' patro.
Kun sincera koro
Li kompleze
la best-reĝon

**5a sen ajn ignoro
akceptis kaj
diris en ĉi horo:**

**“Estus granda gajno
havi vin kare
kun honoro.
Via nuptpet’
estas ja
por mi granda gloro
kaj por filin’
humila mia.
Kun adoro
mi tre dankas
pro via favoro.”**

2.

**“Mi timas, ke
filino
mia kun fajna sent’
teruriĝos
de viaj
ungoj kaj akra dent’,
kaj eĉ svenos
ĉe intima
brakuma moment’.
mi sincere
petas, ke je kontent’**

**ŝia, venu poste
svastiĝi ree,
se am-atent’
via al ŝi
inklinas.
Revenu kun prezent’
de ĝentila
kondukt-manier’.”
Sen argument’
la leono
foriris kun konsent’.**

3.

**Li survoje
cerbumis**

**kiel agi cele.
Post reveno
al hejmo,
agis li akcele,
siajn ungojn
fortondis kaj
dentojn kruele
eltiris kaj
sin kombis pli bele.**

**Rerapidis haste
al bopatra dom'
li tre ŝtele.
Sed lin tie
batadis
lign-stangoj martele
ĝis li kuŝis
duonmorta kaj
li anhele
sub batpluvo
eskapis ŝancele.**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Lily

Masaĝknabino

**laboranta
dumnokte
por vivtena akir'
mi masaĝas
seks-veke
por la vira aspir'
ili nudaj
voluptemaj
kun amordezir'
postuladas
por diboĉa sopir'**

**nevole obeas
mi kacon tenas
por buŝa tir'
kaj flutado
freneze**

kun brue ŝmaca spir'
ĝis erekta
kaco eruptas
per spermo-ir'
tagojn trenas
mi tiel kun suspir'

Virino Forlasita

finfine li
forlasis
min sen ajna kompat'
jam de jaroj
suferis
mi de spirita bat'
ankaŭ korpe
de turmento
laŭ malbona fat'
forĵetita
kvazaŭ vaganta kat'

sed mi ne forgesas
litludon kun li
en rava ŝat'
lia piŝtad'
perfektis
por mia seks-malsat'
ekstaza ĝu'
ardigis min en
in-delikat'
mi soifas
eĉ nun je brula dat'

Sero

Serenado sur Insulo Verda

En lunnokto
lumplena
Verda Insul' en sku'
pace kuŝas
boate.

**Ŝi ja en kora tru'
mia flosas
de temp' al temp'
kvaz' sur akva flu'.
Kanto mia
post dumtaga enu'**

**ovru la kurtenon
de ŝia koro.
Ĉe rendevu'
sur kvieta
l' insulo
ni ĝojas rave, ĉu?
Kial, kial
vi ankoraŭ vin
en ambigu'
tenas firme
muta je eta bru'**

Pozhenzi (Kavalira Danco)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj el 66,77,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

Komencantino

La Malsana Korvo

1.

**Korv' malsanis iam.
Malesperis lia
patrino, faligante
dikajn larmojn. Id' ŝia
kun rid' radia**

**diris al ŝi jene:
“Kara panjo mia,
ne larmojn plu faligu.
Jen ĉe altaro dia,
kun sento pia,**

2.

**preĝu por resaniĝ’.”
“Ho ve, kara filo,
kiu dio voluntus
aŭskulti kun trankvilo
al aĉ-babilo**

**nia por helpdono?
Ĉu vi je foj-milo
jam ŝtelis la viandon
de l' altar' de di-brilo.
kun malhumilo?”**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Bonan Vojaĝon

gratulon al sukcesa pafado de lunsonda satelito

**kun flamanta vosto
la lunsatelit' sor
sin pafis vertikale**

jen por scienca esplor’
ĉu la ĉina glor’?

gratulon, gratulon
en ĉi solena hor’
al niaj sciencistoj
pro ties pena labor’
kaj frukta valor’

Muso kaj Rano

1.

Muso amikiĝis
sincere al rano,
invitis kaj regalis
ĝin per figo, banano
mielo, pano

(ĝi loĝis en dom’ de
riĉa ĝentlemano).
Festenis ili ĝoje
kaj dum drink’ de ĉampano,
pri sia plano

2.

gastiganta, rano
diris varmakore:
“Nu, venu al mi gastis,
mi regalos favore
vin bonhumore.

Por ke vi ne timu,
mi nin provizore
kunligos per la ŝnuro.”
Ĉe l’ marĉo ĝi ĉi-hore
ligis fervore

3.

ties krur’ al sia.
Ĝi plongis subite,
la mus’ tiriĝis kun ĝi
en marĉon alligite
suben falglite.

**Ĝi sufokiĝinte
veadis ekscite:
“Mi mortos! Sendankul’, vi,
min igos senmerite
morti sensprite.**

4.

**Por venĝi mi havos
nenian forton plu.”
Dum en akv’ ĝi baraktis
vidis niz’ en aerflu’,
alflugis sen sku’**

**kaj ĝin kaptis firme.
Ran’ per ŝnura alglu’
kun muso alte pendis.
Servis por niza mangĝ-ĝu’
para kontribu’.**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Miĉino

Al Batalo

**Rigardu: ekbrulas
alarma signalo.
Pretigu nian glavon
kaj rajdu sur ĉevalo,
ek al batalo!**

**Niajn malamikojn
punu mortfatalo.
Triumfe ni jubile
tostu en bakanalo
per grandpokalo.**

Pusaman (Budhista Dancisto)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimo

Eto

Sunlum'

**la suno de horizont'
grimpas brile super mont'
ĉio en lumbril'
je sana april'**

**freŝiga reviv'
nova perspektiv'
al kreska prefer'
al onta esper'**

Komencantino

Vulpo kaj Korvo

1.

**Forŝtelis korv' fromaĝon
por havi bonan manĝon
sur alta branĉo
en venta danco.**

**Vulpo malsata
kun ruzo flata
ĝin rigardis jam
diris per laŭd-gam':**

2.

**“Ho, korvo! Kiel brila
plumaro via vila!
Vizaĝo via
ĉiame pia!**

**Via figuro
vera plezuro
por vida ĝuo
per senta skuo!**

3.

**Kantvoĉo via klara
jen estas senkompara!”
La korvo vanta
sen ago lanta**

**grakis muzike.
Bum! Falis brike
el bek' fromaĝo
kiel omaĝo.**

4.

**Jen vulp' per artifiko
ĝin batis kun efiko.
Kun frand' enbuŝe
vulpo sinpuŝe**

**kuris senspure.
Flatado nure
eble konkeras,
dum saĝ' suferas.**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

La Juĝo de Momos

1.

**Pratempe Zeŭs, Athena
kaj Promothe' vigl-plena
kreis homrondon
kaj nature-mondon.**

**Interalie
Zeŭs jam magie
laboris pene
pri l'taŭro plene.**

2.

**Prometheo pri l' homo
Athena pri la domo.
Do, ili petis
de Momos meti**

prijuĝon juste.
Fakte, malĝuste
komentojn faris
li kaj splitharis

3.

el de sia envio
per jena opinio:
“Zeŭs la taŭron jam
kun fuŝa ornam’

elfaris, ĝiaj
okuloj piaj
alkrociĝas ne
al la pintoj de

4.

la kornoj, tiel ke li
ne povas klare nun pli
kien ĝi pikis.”
Ankaŭ kritikis

li: “Prometheo
fuŝis en kreo
de homo. La kor’
de lia trezor’

5.

sin loki devas elen,
sed ne kaŝe Brustĉelen,
ĉar oni vidas
ja ne, ĉu sidas

en ĝi mis’ aŭ bon’.”
En riproĉa ton’,
li alparolis
kaj ŝajn-konsolis:

6.

“Ho ve! Fuŝis Athena
pri la domo bona
ankaŭ sendube,
ĉar radojn sube

**almuntis ŝi ne
ke, longe fine
najbar' tro tedas
kaj eĉ ne cedas**

7.

**al kuna loĝado plu,
li povas sen malkonstru'
nur ŝovi mane.”
Zeŭs ja vulkane**

**indignis vere,
lin puŝis fere
de Olimpo kun
tondromuĝo nun.**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Miĉino

Antaŭ Nova Jarcento

**Antaŭ l' nova jarcento,
je celebra momento.
Vi, korifee
kaj jubilee,**

**laŭdis per kanto
pri Esperanto---
Lingv' nia kara,
june centjara.**

Sero

Vento el Nordo

**vento el nordo frida
blovas al sud' tepida
per frosta fluo
sen ĝoja ĝuo**

ĉu estas ĉarmo?

**jes, homa svarmo
en vesto dika
eĉ okulpika**

Zhuang Qixiong

Vino

**Varia hom',senta vin',
super veĝoja destin'.
Kun tas',al restviv,
nur libroj sen driv'.**

**Jucec' ne plu re-
turnis ebrie.
Eosten ventas,
vinberoj pentas.**

Putianle (Ĝojo tra la Tuta Mondo)

ĉina fiksforma poemo el 11 versoj de 33,44,44,77,555 silaboj, laŭ rimarangô aa,bb,cc,dd,eee
(kelkfoje kun variantoj)

Bonkoro (Gu Cunhua)

Vidvo kaj Vidvino

Li en ŝi
Ŝi en li
Lang' en buŝo
Ĉi' en tuŝo
Am' kun ben'
Viv' en Eden'
Renkonto ja en solo
Amsorto ĉirkaŭ kolo
Venu espero
For la sufero
Di'—sen kolero

19-12-2006 Chongqing

Qingpingyue (Serena Muziko)

ĉina fiksforna poemo el du strofoj po 4 versoj de 4,5,7,7; / 6,6,66, laŭ rimaranĝo aaaabbbx (x = senrima)

Eto

Unua Amo

**papilio
kun emocio
falas sur kamelio
pro ama nostalgio**

**inta korinklino
ne al ŝia sino
neniel, neniam
pro viva destino**

Xi Murong

Elegi' al Vivo

**dumvive mi
ne kun emoci'
vin plu vidas, ĉar la
renkontot' ne estas vi**

**ne aperu vi plu
en mia memorĝu'
sed tiuj ŝanĝiĝoj
vivaj kaj tempflu'**

tradukis **Sam**

Qingyu'an (Verdjada Taso)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 7 versoj de 7, 33, 7, 445 silaboj laŭ rimarangō a, xa, a, xxa
(x = senrima)

Eto

Atendi Leporojn ĉe Arbo

(ĉina antikva fablo)

1.

antikv-tempe kampulo
plugis sub
betulo
tutkorpe kun ŝvit-rulo
li senĉese
grumble plendis
pri sufer-lulo

nu kvazaŭ tra nebulo
li vidis
kun brulo
en kor' grizon en bulo
sin frapis al
l' arbo forte
— lepora kuro!

2.

kun derompita kolo
tuj mortis
leporo
kun nebatanta koro
je ĝojego
li ĝin levis
por vid-esploro

ha, ĉiela favoro!
je tiu
ĉi horo
li gajnis dum laboro
senpenigan
ĉasaĵon de
kelka valoro

3.

li tuj ideon kovis
l' atendo
eĉ povis
lin riĉi, se ne movis
li eĉ sian
solan fingron
kaj li ja trovis

duan pli... kaj li provis
sed vane
ne ŝovis
sin lepor' plu, forblovis
la imago
dum la kampoj
ne plu verd-novis

Komencantino

Leporo kaj Testudo

1.

Moke lepor' fiere
testudon
senpere
nomadis ĝin apere
turpa, lama,
move pigra.
Tiu severe

rebatis lin kolere:
“Aroge
ververe
vi vantas! Mi prefere
volus kuri
vete kun vi.
Kvankam, cetere,

2.

la kuristo konata
vi estas,
beata
mi estas en traktata

vetkurado.
Ne al mi vin
montru kompata.”

Ridis lepor’ glorŝata:
“Ni provu?”
Gefrata
konkurso sur malglata
montvojeto
ja okazos
je laŭreata

3.

titol’ de bon-kuranto.
Testudo
de lanto
jesis kun eleganto
al propono.
Ĉiuj bestoj,
eĉ elefanto

sidis kiel spektantoj.
Kuro ekis,
la ganto
ĵetiĝis. Granda kvanto
da manklakoj
brue sonis.
Inspira ĉanto

4.

ekscitis tra best-rondo.
La vojo
ĝis monto
zigzagis al la fronto.
La testudo
sciis certe
el la pensfonto,

ke li perdos kun honto
per kruroj
sen forto.
Ekiris kun volonto
ĝi tuj strebe
al la celo

ĉe horizonto.

5.

Leporo firme fidis
je kruroj,
rapidis
dekomence kaj bridis
sian kuron
iom poste,
ĉar ĝi jam vidis

la celon, kaj eksidis,
eĉ dormis.
Subitis
vekiĝo, “hop!” kurglitis
ĝi al celo,
sed testudo
tie jam ridis.

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Miĉino

Lanterna tento

En nokta firmamento
miraĝa
prezento
de l' orienta vento.
Ĝi faligis
blove pluvojn
da steltorento.

Dancas ora serpento
tra fajraĵa arĝento
ekstaza violento.
Senkompara
festivala
lanterna tento.

Qinyuanchun (Printempo en la Ĝardeno Qin)

ĉina fiksforna poemo el du strofoj po 13 versoj de 444,5444,447,354 / 6,35,5444,447,354 silaboj,
laŭ rimarangô xxa,xxxa,xxa,xxa / a,xa,xxxa,xxa,xxa (x=senrima)

Eto

Ĉina Kungfu

**dum jarmiloj
famkonata
ĉina kungfu'
kiel armilojn
ĉinoj uzis
por fortika
korpa konstru'
pugnojn, glavajn
spadojn, klabojn
en ekzerca asidu'
boksado
impresas bone
en evolu'**

**el armila menu'
ligna klab'
en supra situ'
kaj akirebla
kaj uzebla
plej facile
en mov-instru'
por defendi
kontraŭ mava
vivoseniga detru'
efikas
ĉina militart'
sen ambigu'**

Komencantino

Mastroŝanĝo

**sur herbejo
jen azenon
paŝtas kampul'
li aŭdas trupon
malamikan**

proksimiĝi
krias la ul'
"ni rapide
kuru, kuru!
ili kaptos nin per ŝnur'!"
obstine
la best' rifuzas
per pigra krur'

lante iras kun lul'
respondas
kun straba okul'
"ĉu vi kredas, ke
ili metos
du selojn sur
min por vetur'?"
"certe ne, ne!"
"ej, mia Mastr',
tute ne bona gratul'
por mi sub
kies ŝarg' eĉ kun
bela kalkul'!"

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Lily

Amlud' en Duŝo

duŝa pluvo
ŝprucas dense
sub akva flu'
ni ambaŭ nudaj
frotas korpe
karesete
kun karnoglu'
mia mano
glitas suben
al lia kaca situ'
leĝere
ekscitas firme
per vibra sku'

jam sonas eta bru'

de korptord'
li jame ne plu
sin regas stare
mammordetad'
serĉ-lekado
ĝis mia tru'
sanga bolo
kaca boro
en stara pozo ni du
piŝtadas
malsupren supren
kia amĝu'

Geiĝo en Suda Vintro

frosta ĉambro
frida lito
suda gelo
sub dika ŝtofo
ĉi' en sombro
lipmordeto
ŝmacaj kisoj
en pelmelo
dur' kaj softo
preta al ĝu-fabelo
fajrbrule
efervesk-bole
pro seks-pelo

amora anĝelo
leĝere
trenas al celo
facile glitas
kac' en truon
verva piŝtad'
sen ribelo
ĝema krio
anhelado
ĝis ebri' kun akcelo
ĉu vintre?
tutcerte l' arda
ge-koktelo

Matene de Novjara Tago

matene de
novjara tag'
mi langvora
vekiĝis tarde
ankoraŭ en
freŝa memor'
de ag' ĥora
vir' fortika
kun dura kac'
nokte per peno bora
en truo
min ekstazis en
ĝu' angora

ekis lek' esplora
ĝemkrio
voĉo sinjora
mamsuĉad' sekvas
tikla sento
brula volo
dezir' kora
torsgluado
rigida kac'
tru' sukplena
piŝtado penlabora
fulmtondre
novjara festo
horo ora

En Edeno de Virgulino

mi langvore
kuŝas teda
en l' edeno
silkan korpon mi
mole palpas
pinĉ-karesas
kun kor-ĝeno
tikle, tikle

**mi ne scias
kie venas ĉagreno
mi volas
eksplodi ĝue
sen sinteno**

**la man' en promeno
falglitas
suben sen peno
mi soifeme
tuŝas softan
fendon karan
kun ĝu-veno
ho ekscita
trem' trakuras
korpon kiel fadeno
kulmine
orgasm' eruptas
sen kateno**

Vejdo

Novjara Ben'

**nova jaro
freŝa starto
plua progres'
por nia afer'
vigla forto
streĉa peno
sen ajn forges'
propagando
praktikado
vokas al plia neces'
antaŭen
ni kune marŝu
nenia ĉes'**

**konduto sen eksces'
modesto
elstara impres'
nenia altrud'
pacience**

klarakape
kora konfes'
diligente
fideleme
pripenseme en promes'
bondezir'
al niaj s-anoj
por fin-sukces'

Zhuang Qixiong

Pino

En verda vest',
kun nobleco,
kap' al ĉiel';
Per neĝfolioj,
krucaj branĉoj,
al forta kor',
fortika ŝel';
En nutra sun',
pin' ne putas,
kiel nevelka ombrel';
Kun cipres',
bambu' kaj ume'
fratas pro pel'!

Sub okva, verma ŝtel',
pin' verdas,
en neĝprujna gel'.
Nur mi deklamas
ekster miel'.
Ĉiuj jaroj
Restas model'.
Fajna kvalit',
nobla moral',
ombras homojn kun ĉapel'.
Ni lernu
de ĝi—granda vol',
heroa cel'!

Queqiaoxian (Feino sur Piga Ponto)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po ses versoj de 446, 734 silaboj, laŭ rimarangô xxa, xxa / xxa, xxa (x=senrima)

Komencantino

Leonfelo

1.

**Loĝantoj de
urbo Kyme
neniam de fore
leonon vidis foje
okule
nek explore.**

**Ia besto
sur la strato
aperis horore
en leona harfasko
blekante
laŭtsonore.**

2.

**Ĉiuj homoj
fuĝis disen
por vivsava celo.
Sed fremdul' konata pri
leono
de kruelo,**

**draŝis forte
la bestaĉon,
kaj post la forpelo,
klarigis: "Nur azeno
estas kun
leonfelo!"**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Miĉino

Jad Rakontis

**En pluvtago
Jad rakontis
al ni anekdoton,
ke ĈEE intencis
inviti
faman skoton**

**elĉinigi
la romanon
(por spici ekzoton?)
"Songô en Buduaro",
forgesi
patrioton!**

Renyueyuan (Rondiĝo de Luno kaj Homoj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 5 kaj 6 versoj respektive de 75,444 / 444,444 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xxa /xxa,xxa (x= senrima)

Guozhu

Al Amiko

1.

**Eterne memorinda
nova vivpaĝo!
Jubileo
de kvindeka
ora aĝo**

**en amika
Japanio
dum verdhaĝo!
Mi atendas
ke vi versu
pri l' vojaĝo.**

2.

**Revenas vi jam de la
vojaĝ' amika.
Freŝe restas
la impresoj
ekzotika.**

**Mi ĝojas ke
vin favoras
ŝanc' unika---
rekompenco
de multjara
viv' stoika.**

(1989)

Komencantino

Hejmenreveno

**jarfine mi pensas pri
hejmenreveno
trajno norden**

**la homplena
ne edeno**

**por vagulo
kiel kato
sen ĉagreno
kiam laca
re al nesto
post promeno**

Plena Ventro

1.

**En kampo kava kverko
staris en solo.
Vulp'elflaris
frandaĵojn en
manĝskatolo**

**kaŝita de
paŝtisto pro
hejma foro
en arbkavo.
Ĝi sin ŝtelis
kun frivolo**

2.

**enen por satmanĝado.
Manĝis, manĝis ĝi
ĝis plenventro.
Ĝi eĉ ne plu
kun energi'**

**sin elŝovis
el la kavo.
Kun ironi'
vulp' alia
diris ride:
"Ho, povra vi**

3.

**estas! Se vi eliros,
agu rapide!**

**Du rimedoj
por vi estas:
Restu side**

**ĝis malsatiĝ'
aŭ l' paŝtisto
venos fride
vin dishakos,
ve, popece
maltimide.”**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Ruanlanggui (Reveno de Amato)

ĉina fikforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj respektive de 7,5,7,5 / 3,3,5,7,5 silaboj kun kontinua rimo

Eto

Flut-Melodi' en Nebulo

aŭdiĝas flut-melodi'
kiel idili'
tra nebula iluzi'
kun melankoli'

am-pasi'
emoci'
lasita sen sci'
en pasinta histori'
ree nostalgi'

Hendrik Adamson (1891-1946)

Rava Hor'

Ho,ĉi tiu rava hor',
de volupt',ador',
kun senlima ĝoj', dolor'
gaja rid' kaj plor'.

kaj verva
amfervor'
ĝis ekkrev' de kor'
kaj sekve post ĝi langvor'
dolĉa rememor'.

adaptita de Guozhu laŭ Esperanta Antologio p.258/259.

Lily

Brakumo

brakumado l' unua
kun suko flua

per brula korpo skua
ŝmacado brua

firma ring'
korpglua
menso vakua
bola ekscito plua
al boro ĝua

Niuniu

Sopir' sur Altan'

solece mi sur altan'
en lunluma ban'
staris kun falanta man'
vange de malsan'

atendo
en la van'
nur larmkaravan'
jen en mia akompan'
sub alta bajan'

Sam

La Luno super Duno

lanterne super duno
altpendas luno
kverad' ĉe am-laguno
— arĝenta juno

fajrbrula
kunkuno
en am-aŭtuno
ĉu geiĝa fortune
aŭ dia puno

Zhuang Qixiong

Onderoj

Lirlas fonto kun esper'
en eta river'.

**Flirtas onderoj de kver'
pro roka sincer'.**

**Ĉu ama
karakter'
kaj senta ofer'
Ĉiam restas en leter'
kaj viva ĉiel'?**

Ne pavu

**Salikvata facilmor',
pro printempa glor'.
Somerflora bonodor',
kun varma amkor'.**

**Ne pavu
per ador'!
Por tempa valor',
restu honesta honor
en bela memor' !**

Rumengling (Kvazaŭsonge)

ĉina fiksforma poemo el 7 versoj de 6,6,56,2,2*,6 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa,a,A,a. La kvina kaj sesa versoj estas samaj. (x= senrima)

Ardo

Korŝiro adiaŭa

**Ĵus bankedo finis,
gastoj tuj foriris.
nur mi suspiris,
pli kaj pli korŝiris.
kial?
kial?
mi vin plisopiris**

Eto

Terskua Kantado*

Okaze de la 113-a naskiĝtago de Mao Zedong

**sonas voĉoj dek mil
jen por granda profil'
kune kun terskua**
kaj cunam' por jubil'
kun bril'
kun bril'
vi — ĉina granda fil'**

*Okaze de 113-a naskiĝtago de Mao Zedong, dekmil popolanoj de lia hejmloko estis organizitaj kanti "Ruĝas l' Oriento" por celebri lian naskiĝtagon.

** En la sama tage de la naskiĝtago de Mao Zedong okazis granda terskuo (sismo) proksime al Tajvan kaj cumano ĉe la marbordo de Filipino.

Guozhu

Al Kara Armand

1

**Kantas en Esperant'
pri am' al Patroland'**

eĉ en la prison'
de Kvarpersona Ban''.
Armand,
Armand,
nefleksebia gigant'!

2

Vin gloru versgirland',
ĉielarka ruband',
ring' el papavoj
ĉar, laŭ muza komand'
Armand,
Armand,
jam versos el felan''!

1990-09-30

Ringratulo

Marjo kaj Harpina:
Paro laŭdestina.
Sub la favoroj
de nupto fascina,
ĉina, ĉina,
feliĉo senfina!

Komencantino

Drinkanta Avo

kun pot' vinhava
en la mano ava
per unu glute
li eldrinkas brava
rava
rava
drinkanto nemava

Li Qingzhao (1084-1155)

Nokta Pluvo

Nokte pluveg' kun vent',
insistas ebri-sent'.
"Ki' ŝanĝis nokte?"
"Restas flaŭ' en ident'."
"Ident'?"
Ident'?
Pli verdas je l' moment'!"

esperantigis **Sam**

Lily

Stalagmito

en kav' stalagmito
pro tera incito
fortike staras
kun kaca imito
spito
spito
per bora merito

Lu Jixin

Vekite

Vekite kun impres'—
en nokto vent-ekscas',
mi: kiel korto?
Servisto: Floras des,
Ĉu jes?
Ĉu jes?
Pli verdas, ruĝ' en lez'!

Somer-nokte

River', lun', spalir,
Okulo, stel' lampir',
Kaj grila trilo,
Kaj mut-kariofil'.
Zefir',
Zefir',
El ter' leĝera spir'.

“SE”

En nebula pase'
Veadas kiom “se”,
Kiu nin ĝenas
Samkiel farize'.
Ŝose',
Ŝose'
Fariĝu voj' sen “se”!

Sur Li-Rivero*

Boato en progres'.
Ĝuad' kun interes',
Sur Li-rivero
Kaj sub nature-kares'.
Sen ĉes',
Sen ĉes',
Ravanta nin impres'.

*Li-rivero (La Bela Rivero) fluas ĉe urbo Guilin.

Santaici (Tri Terasoj)

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 66, 66 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa (x=senrima)

Komencantino

Nur Unu, Sed...

**Vulpo al leono
diris kun mokrido,
“Al vi ja naskiĝas
nur po unu ido.”**

**La leon’ respondis
firme kun decido,
“Pravas vi. Nur unu,
sed leon’ kun fido!”**

(adaptita el Ezopa Saĝo de Kalocsay)

Miĉino

Gardanĝelo

**Kara, se vi estus
mia gardabĝelo;
estos plej feliĉa
mi sub la ĉielo.**

Shanhuazi (Monta Floro)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 7,7,73 / 77,73 silaboj, laŭ rimarango a,a,xa / xa,xa (x=senrima)

Guozhu

Ruĝa Umefloro

**La ruĝa umefloro
spite al frostrigoro
disfloris frue en la
vintrhor.**

**Ĉar al malfruiĝinto
jam neniam adoro
premieroj. Atendos nur
ignoro.**

Komputilo en Fatalaĵo

**En kuranta monato
neatendita Fato
al mia komputilo---
sortbato!**

**Fruktojn ĝi ruinigis.
Sed kun spit-animstato
mi luktu brave, save
el mato !**

(2007-02-28)

Komencantino

Vintra Epizodo

**en la ĉambro sen ornamo
varma kiel forn-flamo**

**babilas anoj ronde
ĝoj-gamo**

**en eksterdoma mondo
ĉio en blanka skvamo
duno sub neĝkovrilo
— etmamo**

La Instruo de la Cervino

**Cervin' instruis al l' id',
“Estu kuraĝa kun fid'
je via fort' de kornoj.
Sen timid',**

**je hunda boj', ne timu!”
Sed cervin' mem kun perfid'
ĉe boj' proksima fuĝis
en rapid'.**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

La Akuŝanta Monto

**La mont' akuŝis lite
ĝemegis intermite.
Atenta muto peza,
ekscita**

**atend' kaj mirkonfuzo.
Ho, alvenis subite
informo: mus' naskiĝas
elglite.**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Mandio

Pin' Surmonta

**sur monto staras pino
rekte sen trunka klino
spite al vent' kaj pluv' kun**

obstino

**plenplena je vivforto
ĝi verdas ĝis vivfino
sen plendi pri rigora
destino**

Xi Murong

Kial?

**la plumon ŝlosi plene
mi povas. kial ene
ĉagrenon, amon povas
mi pene**

**ne povas? kial ĝojo
efemeris fal-svene
kaj bona temp' foriras
senĝene**

tradukis **Sam**

Shaonianyou (Vojaĝo en Juneco)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 7,5,4,4,5 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xxa / xa,xxa
(x= senrima)

Eto

Vilaĝ' en Neĝo

**kovras neĝo en vilaĝ'
ĉion en sovaĝ'
videblas nur
senvivejo
nebula miraĝ'**

**en blanko sen animo
purpura pejzaĝ'
pacience
ni sopiras
al printemp-aĝ'**

Neĝhomo

**terkovriga neĝfalo
blanka vualo
staras homo
sen moveto
en neĝkristalo**

**lia frida vizaĝo
el neĝmetalo
senviveca
nemire pro
neĝa instalo**

Mi Vin Amas Enkore

**mi dronas en arda am'
tamen mi ne jam
esprimis nek
al vi diris**

se pasia flam'

bruligos min ĝis cindro
mi restos en sam'
kun sincero
kaj dediĉo
sen brava proklam'

Komencantino

La Tornistro

1.

migris metiist'en jak'
kun plena dorssak'
je viando
lard' kaj pano
en bonorda pak'

subite venis lupo
sonis arbed-krak'
kun teruro
li forfuĝis
de lupa atak'

2.

arbon surgrimpis kun tim'
kiel hom-kutim'
sed la tornistr'
restis tere
je lia deprim'

lupo festenis el sak'
ŝmace sen estim'
senrimede
li atendis
finon de lup-krim'

3.

subrampis li finfine
timo-inkline
li trovis, ke
mankas en sak'
viand' ruine

**nur pan' ankoraŭ restas
ne-elimine
li vojiri
volas daŭre
ĝis sun-kline**

4.

**tiam bruo subite
sonis ekscite
ĉu rab-besto
returniĝis
do neinvite**

**terure li surrampis
re senhezite
sur arbon por
rifuĝi de
danĝer' evite**

5.

**dumtempe venis obskur'
en granda terur'
li atendis
ĝismatene
por plua vetur'**

**descendis li zorgeme
laca sen mezur'
tre malsata
kaj li trovis
ke pan' sen ajn spur'**

6.

**malaperis entute
kamp-musoj mute
formanĝis kaj
nun formikoj
voris tribute**

**senhelpe li veadis
"tre bonkondute
rabas fortul'
dum malfortul'**

ŝtelas pogute!”

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

La Mensogema Paŝtisto

1.

**Paŝtist' kun granda tedo
ĉe mont-piedo
paŝtis ŝafojn.
Foje kriis
li, “L' lup' por predo!”**

**Fakte neni' okazis.
Homoj en preto
bati lupon
kuris helpi,
pro l' ruz-ripeto**

2.

**indignis netolere
kaj maltenere.
Iutage
feroca lup'
atakis vere.**

**L kriis helpon laŭte,
sed neprefere
oni venis.
Li suferis
perdon mizere**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Lily

Amvojaĝo

**en vagonar' rapida
en pozo sida
egalritme
dormokule**

kun tors' rigida

**jen sonas ŝrika voĉ' el
serpent' insida
diboĉeme
amorĝue
en tru' perfida**

Sensukcesa Amoro

**enlite senprudenta
ludo silenta
maltrankvile
fuŝlabore
kore turmenta**

**brula pasi' kaj vervo
bolo momenta
ne rigida
kac' malforta
ve, impotenta**

Shengshengman (Lanta Sontreniĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 10 versoj respektive de 4,46,64,634,336 / 6,36,46,634,37 silaboj, laŭ rimarangô a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xa (x = senrima)

Eto

Elegio al Mia Patro

(ĉe lia tombo)

**karmemora
patro mia
jam ĉielen-sora
mi silente staris
antaŭ via tombo
prikantas
per voĉ' plora
mi vian
meriton
pro penad' labora**

**dum tempdaŭr' rigora
vi strebis
por vivten' monvora
fortostreĉe
sen humor' rankora
ordinaran vivon
vi havis
vi ĉiame
vivadas
en mia fundo kora**

Guozhu

Morna Poetino

**Sibla vento
silka pluvo
ĉagrena momento.
La sun' jam falis al
okcidento.
En aŭtunan korton
invadas
frostetendo.
Solece**

**rigardas
al la firmamento.**

**en vana atendo,
sidante
ŝi kun sentimento
de izolo
sub obskura tendo.
Morna poedinon
subpremas
korturmento
ke daŭras
sufoke trist-silento.**

Lily

Donu al Mi Sinceran Kison, Kara

**mia kara
en litludo
freneze senbara
mi min ĉiam sentis
senerara
pri perfido via
via kac'
velke stara
min igis
suferi
de falo amara**

**dum geiĝ' ĉijara
mi sentis
per instinkto flara
vian kison
frivole ludfara
ĉu alian inon
vi havas
mi pensklara
konceptas
pro via boro ŝpara**

Plendoj de Konkubino

en karcero
mi enue
trenas en sufero
de forlasiteco
sen am-kvero
soife sopira
kvazaŭe
mi vin atendas
korp-tikle
aspire
kun kora prefero

en rava somero
lastjara
kun vera sincero
mi obeis
sub via konkero
sed por la edzin' vi
forĵetis min
en foron
sen via am-ofero

Impreso pri Ĝigolo

I
mi en solo
teda, splena
revas en petolo
al mi proksimiĝas
jen ĝigolo
min invitas loge
al ĉambro
kun ĝu-volo
surprise
volonte
kun volupta folo

kun softa parolo

**incita
mi en amor-molo
jam nun dronas
kiel ŝton-idolo
tutnuda en lito
kolapse
kun humoro
sorĉita
soifa al amoro**

II

**nun deĵoro
luda lia
por organa bolo
ekas karesad' kaj
tikla horo
sekvas lang-lekado
tuŝe de
mam' ĝis kolo
mi ĝemas
voĉe en
avida angoro**

**lia man-esploro
iras ĝis
mia seks-trezoro
kia tondro
fulm' ĝis mia koro
lia sanga glavo
jam enas
rava boro
erupta
— vere forta sinjoro**

Ni Geedziĝu, Kara

**mia kara
mi nun dronas
en penso amara
vi promesis fari
nin gepara
vi forlasis foren
kun intenc'**

sendeklara
mi sole
sen konsol'
falas en plor' mara

en kunviv' trijara
min trompis
vi per vort'nektara
voluptema
allog' amor-fara
kvankam vi forfuĝis
mi petas
kun kor' klara
ankoraŭ:
ni geedziĝu, kara

Sopiro en Ferio

dum ferio
ne revenis
li kun ĝoja krio
kial? mi demandis
min pri tio
ĉu alia ino
allogas
kun defio
eĉ kun ŝi
li kuŝas
mi sen ajna scio

plenis je envio
ba! kara
al l' am-ebrio
en geiĝo
mi kun fantazio
jen soifis tree
ne iru
mia dio
en ŝian
truon kun emocio

Shengzhazi (Monta Kratago)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po kvar versoj de 55,55 silaboj laŭ rimarango de duona rimo.

Eto

Pejzaĝ' Glacia

blanka paronam'
en kloŝo dura
ŝlosita firme
ĉio natura

brilas kristale
glato plezura
en vintraj sunlum'
kaj varmo nura

Komencantino

La Hundo en la Stalo

1.

Jen antaŭ l' trogo
la hundo ĝena
gvateme kuŝis.
El fojn' avena

ĉevaloj manĝis,
kun voĉ' malbena
ĝi bojis dume
per forto pena.

2.

Ĉevalo unu
diris plend-ŝute
"Ne volas grenon
ĝi manĝi tute,

nek ĝi permesas
jen absolute
al ni ĝumanĝi
eĉ unuglute."

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Marjorie Boulton (1924-)

Veni Bilde

Sur gramofono
muzik' banala.
Sezono vintra,
malvarme pala.

Vi venis bilde
en hor' banala,
milde ridetis
ĉiam lojala.

adaptita de Guozhu

Zhuang Qixiong

Espero

Nebule pluvas.
Venteto mildas.
Herboj freŝverdas.
Salikoj flirtas.

Rava naturo
antaŭ mi bildas?
Paca espero
al vi pli virtas!

Gajo

Ni kune vivas
en gaja horo.
Provas mielon
mi kiel floro.

Ni ĝoje krias
kun profunda sent'.
Mi laŭte kantu
per barda talent'!

Mia Amo

1

Arka novluno
kaj dolĉa klar-font'
ebriigas min
kiel kora pont'.

La luna brovo
kaj fonta okul'
persekutas min
kiel hel-spegul'.

2

Sentema luno
kaj plena font'
ambicias min
kun senlima hont'.

La tajda amo
kaj mara sentem'
emocias min
kun karesa trem'.

Novluno

Arka nov-luno,
kiel boato.
Mi veturos kun
hejm-landa flato.

Ruĝa flor', varm-nokt',
printempa dato.
Mi albordiĝos
en sonĝa ŝato.

Perlofonto

Blanka nubaro,
ĉiel' lazura.
En klara fonto,
kun bobel' pura.

Kiel la perlo,

**superen kura.
Tre enviinda,
al vi, plezura!**

Rozo

**La punca rozo,
kun brulanta flam’;
La ĉarma rozo,
per dolĉ-fonta fam’.**

**La ruĝa rozo,
en velkanta temp’;
La tarda rozo,
por ama printemp’!**

Shiliuziling (Dekses-Silabo)

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1,7,35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima).

Eto

Triope

ŝi
vent-pelata arbfoli'
mizere
kun melankoli'

li
movata de ambici'
fiere
kun ĉion-defi'

mi
ŝirita de emoci'
sincera
nur kun simpati'

Surmara Savado

I.

ek!
la maro tangas kun blek'
tondr-brua
kaj onda bordlek'

II.

sav-
helikopter' kun forthav'
alurĝas
por vivo de av'

III.

ĵet'
de ŝnurŝtupar' laŭ la pet'
el ĉiel'
kun granda diskret'

IV.

mir'
kria kun ĝoja suspir'
el ŝipo
por viva akir'

V.

laŭ
ŝtupar' l' av' grimpas malgraŭ
vento kaj
ondego ankaŭ

VI.

per
pen' surgrimpas kun sufer'
lante li
el mara danĝer'

VII.

hoj!
li jam sekuras, la ĝoj'
rapidas
tra tuta konvoj'

Plendoj de Arboj

I.

ve
en vintro frosta tre
senŝele
ĝis viva pere'

II.

frid'
mordas en venta perfid'
mi tremas
kun sibla malrid'

III.

kor'
mia kun pika dolor'
pro homa
detrua rigor'

Ascend' al Luno

Okaze de pafado de l' ĉina lunsatelito

nun
la ĉinoj per forta kun'
raketon
pafas al la lun'

por
pac' kaj scienca esplor'
ekflugas
la satelit' sor

en
kosmospac' kun esperplen'
ĝi strebas
al luna ĝarden'

ĝi
ja la prosperon de Ĉini'
kunportas
al feina ŝi*

ĝoj'
nin ebriigas en larm-roj'
kaj flugas
laŭ alluna voj'

* aludas Chang'e, feino vivanta sur la luno laŭ la ĉina legendo.

Naĝ' en Maro

ond'
min puŝlevas por renkont'
al ĉiel'
de lazura rond'

vent'
min subpremas ĝis tegment'
verdblua
de la mara gent'

sun'

min kolorigas per brun'
malhela
sub bakada pun'

mi
libere kun eta kri'
drivadas
en akva medi'

vel'
min akompanas sen cel'
pasante
spektaklojn de bel'

mev'
min rondflugas ĉe ondlev'
mi plenas
je ekstaza rev'

Bezonata Akvo

en
Saharo akva malplen'
sufokas
onin kun ĉagren'

sur
insul' kun bela natur'
aŭdiĝas
ne roja susur'

al
malriĉa loko kanal'
troviĝas
seka sen akvfal'

hom'
soifa kuŝe en dom'
eĉ ĝojas
ne je florarom'

brut'
kolapsas sen akva gut'
ne penas

por kampa servut'

ni
per ŝparad' de energi'
bonfaru
por viva soci'

Sub Lunarko Kurba

sub
lunarko en svelta kurb'
drivadas
vagabonda nub'

mi
senhelpe ĉe lunradi'
vagadas
ja en agoni'

por
serĉi ŝin kun ŝira kor'
sencele
mi drivas en plor'

ve
mi kisis vizaĝon de
knabino
nur je flirta ide'

pro
ti' foriri indas do
mi ĝemis
deprimite tro

Velkinta Rozo

roz'
jam nun en dorma ripoz'
malviglas
je falanta poz'

ros'
ĝin vivigi per patos'
ne povas

plu je freŝa ŝos'

ve

ĝi velkis ĝis viv-pere'

mizere

pro poluci-kre'

Nun Neĝas

Neĝ'

fliras sur la monta eĝ'

minace

per dika sieĝ'.

Flok'

post flok' tavolas sur rok'

pezpreme

ŝlose kun sufok'.

Pli

kaj pli da neĝ' kun magi'

kompakte

formos en glaci'.

Ter'

puras per blanka aper'

samkiel

plumoj de anser'.

Mond'

arĝenta el alta font'

sterniĝas

ĝis la horizont'

Plag' de Polucio

ve

homa mondo ĝis pere'

aliros

sen ajna ide'

jam

difektis natur-dinam'

pro homa

deflankiĝa am’

en

aer’ kaj akv’ venen’
plenplenas
je homa ĉagren’

per

fabrika fum’ en aer’
suferas
homaro sur ter’

flu’

akva puras ja ne plu
por brutoj
homoj por trink-ĝu’

viv’

homa dronas jam en triv’
ĝislima
sen ajn perspektiv’

plag’

devas seniĝi per ag’
aktiva
sen naiva blag’

Even Chen (1963—)

Donacu al Lu Jixin (Aĉjo)

(akrostike)

Vok’

Olda tra l’ moderna mok’
Kaptu nin
Al la novepok’.

Kor’

Ora dum la pi-esplor’
Restu por
Orient-aŭror’.

Am'
Ĉasta ĉiam sen ornam'
Junas kun
Oferema flam'.
1990-10-24

Lily

Trista Am'

am'
min turmentadis per flam'
mi perdis
freŝan junon jam

am'
senigas tute ĉiam
terure
min je ĝoja gam'

am'
l' epiteto de fifam'
allogas
nure mia mam'

Ĝisĝua Kontenteco

fik'
por rava amor-muzik'
diboĉe
per bora teknik'

fik'
por geedza ama lig'
plezure
ĝis reva efik'

fik'
por laŭplaĉa in-amik'
freneze
en spila mistik'

fik'
por karnoĝua praktik'
ekstaze
je bruliga pik'

fik'
por engrota erotik'
konfide
al vira fortik'

Trilogio de Litludo

ĝu'
per langmordet' kaj korpglu'
karese
ĝis sukplenas tru'

ĝem'
lin ekscitas kun sent-trem'
al bor-mov'
ĝoja al ekstrem'

kri'
pro forta piŝtad' en ŝi
diboĉe
rava iluzi'

Funebre pri s-ro Gu Cunhua

ve
batalis por nobla ide'
vi kara
falis en pere'

je
tutvivo por verda kre'
vi ĉiam
penis streĉe tre

he
la esperanta arme'
senhalte
strebas ĝis trofe'

Alies Novedzo

ĉi
viraĉ' kun vizaĝa pi'
min trompis
jam sen emoci'

per
dolĉaj vortoj de malver'
li diris
sen ajn konsider'

“sen
vi, mia kara azen'
mi ne plu
vivas kun ben'

“vin
bezonas mi ĝis viv-fin'
mi ardas
je amor-inklin'”

sed
al li mia blinda kred'
ne iras
kun obea ced'

ĉar
li tion dum amorfar'
deliris
per vorta malŝpar'

nun
eĉ min perfidas sen pun'
li faras
tion sub la sun'

in'
koketa rave logas lin
invite
al ŝia vagin'

ĉu

ne mi povas en amĝu'
lin kaptas
per dolĉ-suka flu'

ne
li lin faros novedz' de
l' fraŭlin' tuj
morgaŭ kun obe'

Lu Jixin (1953—)

Responde al S-ro Even Chen

(akrostike)

Kor'
Obsedita de dolor',
Restu kun
Am' por la esplor'!

Vok'
Ondas kun ĉineska log'.
Kreu ni
Ofte dum l' epok'!

1990-10-25

Rememore

(1)

Sur
fot' prenita el broŝur'
aŭdiĝas
jen via murmur'.

(2)

Sur
seĝ' sidita de vi, nur
kaŭradas
vespera obskur'.

(3)

Sur
kurba pad' kun via spur',

leĝeras
salika susur'.

(4)

Sur
lag', vin seĉas onda kur':
Kiel la
ebura figur'?

(5)

Sur
forŝvebanta uvertur'
flagretas
antaŭa plezur'.

Songô

Jen
ŝvebas ĉe la kapkusen'
songô kun
dolĉo kaj bel-scen'.

Ben'
for a de mi en maten',
sed sub lun'
iĝas mia pren'.

Rem'
sur ĝoj-lago sub seren'
songô nun
kiel en eden'.

** **

Jen
falas al la kapkusen'
songô kun
peza prem' kaj plen'.

Ĝem'
tage dorma sub festen',
sed sub lun'
viglas kun keten'.

Sen ĉarma kanto nur ĉagren',
songô nun

kiel en gehen’.

** **

En
ĉiu nokta dorm-teren’
pens’ de jun’
flugas kun poem’.

Jen songo iras jam al sven’,
sub nov-sun’
kri’ el mi: Reven’!

Sentitole

Jun’
revas tro pri onta sun’,
perdas jam
multon: ora nun!

Kant’
kun ju pli da elegant’,
al ĝi des
mankas jam sekvant’.

Sentitole

Kor’
dorse kuŝas sur memor’,
maĉas nun:
tempa la odor’.

*

El
kor’ la hontema esper’—
sur fenestr’
timema paser’.

*

Viv’—
rozaj songoj kun naiv’
ĵetas sin
al reala klif’.

*

Ombr’
ruina ne estu tomb’

de nia
elkora kolomb'

*

Ŝild'
portita dorse — la bild'
de saĝa
persono kun virt'.

*

Voj'
de okuloj sub sekoj'
zigzaga
al sonĝa levkoj'.

*

Mut'--
erupcia la prelud'.
Kovras ĝi:
tondro, muĝ' kaj flut'.

*

Ho, Li-rivero, ĉu kordo
kantanta
el tera kor' do?

*

Kat':
Bone! se jam multas rat',
al mi do
plias homa ŝat'.

Sentitole

1.

Viv'--
rozaj sonĝoj kun naiv'
ĵetas sin al reala klif'.

2.

Fort'
mema estas lasta pord'
antaŭ la
fivivaĉa mord'.

3.

Spur'
venta lasas sin jam sur
bamboo

per foli-susur'.

4.

Ĝild'
portita dorse -- la bild'
de saĝa
persono kun virt'.

5.

Kat':
Bone! se jam multas rat',
al mi, do,
plias homa ŝat'.

6.

Stel'
elkovitas el malhel';
kora kant'
el silenta gel'.

Vino

Vin'
likva flamo jen en sin'
pelas vin
al kulmin'ravin'

Mandio

Gut' da akvo

Gut'
da akvo en liliput'
similas
al lago en tut'.

Gut'
da akv' en buŝa mamut'
sufiĉas
ne por unu sput'

Gut'
da akvo estas salut'
al sekaj

plantaĵo kaj brut'.

Gut'
da akvo en absolut'
saviĝas
en bona kondut'

Preleg' de Profesoro

Sur
podio granda figur'
prelegas
kun blufa mezur'.

En
aŭskultantoj dorma sven'
paŝadas
per ĝoja promen'.

Ĉe
angulo sonas ĉen' de
ronkado
laŭtiĝante tre.

De
aliflanke re kaj re
babilo
zumas sen obe'

Ĉar
la prelego sen prepar'
sengustas
je tempa malŝpar'.

Ho
aŭskultantoj plendas pro
enuo
de la orator'.

Mao Zifu (1963--)

Amon Fordrinkis

El
la orgia mar' de el'
mi rampis.
Ne vidiĝis stel'.

Al
mi ventumis pluma al'
de supre;
pluvo jam en pal'.

Por
vinelflua arda por'
la akvo
venis en ĝustahor'.

Sur
la kolapse febla sur'
sentiĝis
pez' de Ejfeltur'.

Tuj
mi apogis min al tuj':
-- Kien nun
paŝas la rubuj'?

-- Sed...
Nigra blanka vaz' kun sed'
turniĝis
sur mantel' el led'.

Kaj
ĝi ekiras al la kaj'
post longa
staro en malgaj'.

En
ŝia poŝo eĉ sen en'?'
Kial ŝi
tranoktis kun pen'?

Sen
pago de eĉ unu sen',
vi dormu
do ĉe mi, sen ĝen'!

Pensea Konfeso

— al s-ano Shi dum la alveno de la 50a n-ro de nia revueto Penseo

temp'
flugas for el pen-kontempl'
ne! ĉe vi
restas ben-printemp'

re
freŝas velka mi kaj tre
viglas nun
spite al bore'

se
mankus flego de vi, ve,
nu, jam mi
dronus en pere'

temp'
flugas for el ben-kontempl'
ne! ĉe vi
regas bluprintemp'

1994-06, Changde

Niuniu

Inter Domegoj

vent'
ne venas tra dom' cement'
solida
je mia kontent'

lum'
ne filtras inter brakum'
de muroj
je eta volum'

bru'
laŭtas pro densa konstru'
sufoke
kun viva enu'

jam
mi ne plu per laŭd-aklam'
por alta
konstruaĵa gam'

for
mi volas tuj ĉe ĉi hor'
min loki
de l' granda dolor'

Stulta Hokfiŝisto

Jen
li ekĵetis per faden'
logaĵon
ĉe bord' de haven'.

Li
atendis kun fatazi'
akiri
fiŝegojn dek tri.

Kun
korbrulo li sidas nun
sub arde
la bakanta sun'.

De
temp' al temp' li ĉesis ne
trinketi
el la kruĉ' de te'.

Ĉi
momente fulmis radi'
sur akvo
kun ŝajna premi'.

Bu'

**faletis laŭ akvoflu'
iome
kun vezika bru'.**

**Li
ektiris kun energi'
la stangon
kun mallaŭta kri'.**

**Ba
li elhokis bulon da
retaĵo
de fiŝisto ja.**

**Por
la dua fojo pli for
li ĵetis
kun sama fervor'.**

**Dek
minutojn poste bu' ek
moviĝis
re kun akvovek'.**

**Li
pensis, se moviĝos ĝi
refoje
nu ektiros mi.**

**Ja
vere li resentis tra
fadeno
removiĝon, ha!**

**Per
fortostreĉ' li kun esper'
ektiris
ĝin al la ter'.**

**Fi
kia granda ironi'
ĝi estis
nova tragedi'.**

Hom’
starante ĉe gardodom’
ekkriis
per kara pronom’.

“Hej
ci amiko, ĉirkaŭej’
jam estas
polucita plej.

Vid’
al la tabulo en sid’!
Ĝi diras
‘Instanca decid’:

Ĉi
loke pro akv-poluci’
ne licas
fiŝada meti’.”

S. Asta (svedio)

Ĉi

Ĉi
arda ĉirkaŭbrako de vi,
ja por mi
estas poezi’.

Sam

Vortludo de Unusilabaj Prepozicioj

ĉe
la tablo taso da te’
sidas por
sengi je ole’

de
naskiĝo de viva kre’
destinas
oni por pere’

**dum
vivdaŭro hela taglum'
uziĝas
por viva konsum'**

**el
la rivero mielo
ne fluas
sed akva belo**

**en
avida cerbo ĉagren'
restadas
ĝis lia poŝplen'**

**ĝis
tagiĝo ilia kis'
daŭris en
sekreta makis'**

**je
frumateno orkide'
ekfloras
apud la ŝose'**

**krom
bieno granda la hom'
famiĝas
pro bona renom'**

**kun
ĝojego oni en jun'
ne venos
al granda fortun'**

**laŭ
la diro unu vivdaŭr'
valoras
pli ol mortoj naŭ**

**per
mallumo homojn vesper'
lulas en
dorma malliber'**

**por
homa atento la flor'
ornamas
ĝin per bunt-kolor'**

**post
la malvarma vintra vost'
troviĝas
ne rigida frost'**

**pri
veraj faktoj histori'
mensogas
ne sen ajn raci'**

**pro
fiask' neniuj hero'
deprimas
kaj malĝojas tro**

**sen
malluma nokto maten'
aperas
ne je esperplen'**

**sub
la suno nenia dub'
ekzistas
kun mistera nub'**

**sur
la maro ŝipa vetur'
similas
al helika kur'**

Sero

Solena Hor'

**kor'
vibris je solena hor'
raketo
sin lokis en glor'**

paf'!
ekflugis sor ĝi kun brav'
laŭplane
al orbita traf'

ĝoj'
ekbolis en dom', sur voj'
tra lando
kvaz' lirlanta roj'

rid'
trakuris jen en rapid'
tra vangoj
de l' popol' kun fid'

Aŭtuna Pejzaĝo

flor'
flavas brune kiel or'
alloga
kun dolĉa odor'

ter'
ondadas kiel river'
orflave
plena je esper'

arb'
skuas en ruĝa farb'
leĝere
kun brila lumgarb'

vent'
alblovas kun ĝojkontent'
mesaĝon
de rikolt- moment'

hom'
okupiĝas pri nova dom'
ĝojplene
kiel rida pom'

Jasmeno

en
tagoj de mia ĉagren'
sopiras
mi al vi jasmen'

flor'
freŝa en blanka kolor'
impresas
per pura valor'

de
fetoj ag' kaj ide'
vi staras
sen ajna obe'

vi
tiel modestas kun pi'
silente
en brua medi'

nur
vi aromon al natur'
restigas
sen plenda murmur'

Grimpado al Monto

de
komence ni kredis, ke
grimpado
'stas facila tre

sed
tuj ĉe montega pied'
ni pensis
pri taŭga rimed'

en
unua tempo ĉagren'
nin premis
per vojmaleben'

post
horo doloras ĝis ost'
talio
je fortstreĉa kost'

ŝvit'
fluetis sen ajn hezit'
tutkorpe
je nia irit'

spir'
nia pezis por dezir'
ripozi
en monta zefir'

jam
senfortis kun krura lam'
je ascend'
ve, nia team'

Vejdo

Krakas Petardoj

bum!
fajraĵo soras kun fum'
eksplodas
en blindiga lum'

Ĉevalo kaj Azeno

sen
ŝarĝo ĉeval' en promen'
fiere
iradis sen pen'

ve
post ĝi azen' trenis ne
senpene
ŝarĝon gaje tre

“min
helpu, vi ul' en sangvin'!”
li petis

ĝeme sen obstin’

“prem’
de ŝarĝo pelas min mem
kruele
al tutkorpa trem’

vi
portus la duonon pli
ludeme
transprenu de mi

ke
mi ne svenu preme de
pezego
ĝismorte, ho ve!”

sed
ridis ĉevalo sen kred’
la azen’
vokis sen rimed’

per
moko ĉeval’ en liber’
rikanis
akre kun fier’

plu
ne elportis ŝarĝon, nu
azeno
pene kun ŝvitflu’

blek!
“damne!” kriis per voĉ-sek’
li falis
kaj mortis sen pek’

nun
ĉevalo kun misfortun’
nevole
malĝoje sub pun’

jen
portis korpon de azen’

**kaj ŝarĝon
lian en tutplen'**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Ŝtorma Nokto

**vent'
alblovas el okcident'
luphurle
dum longa moment'**

**pluv'
tamburas sur ligna kuv'
pit pit pat
frapas sur herbtuf'**

**arb'
balancas per fronda barb'
pentrita
en peĉ-nigra farb'**

**flor'
jame cedas en ĉi hor'
petaloj
ade falas for**

**roj'
ŝvelas alte super voj'
minace
je homa malĝoj'**

**bru'
tondra rulas kun tersku'
obtuze
por tuta detru'**

**kri'
homa laŭtas pli kaj pli
ja kontaŭ
onta tragedi'**

**ĉe
la moment' urĝe l' arme'**

alhas
por sav' el pere'

storm'
tuj forigos laŭ inform'
logantoj
restados sen dorm'

Murmur' de Pinoj

vent'
sible blovas tra pin-gent'
karese
kun amema sent'

nur
aŭdiĝas pina murmur'
skuate
post venta trakur'

ĉu
vi frustras en venta bru'
la ĝojon
de babila ĝu'

ĉu
vi lamentas pri enu'
ĉiama
kune kun tempflu'

sur
apikaj montoj susur'
pinara
ŝajnas en plezur'

vent'
pinojn skuas per frekvent'
murmuri
sen ajna silent'

Flava Rozo

flor'
mia, vi kun flava glor'

**radias
per oreca kolor'**

**vi
la plej bela el flor-naci'
elstaras
en bunta medi'**

**sed
ne singultu pro obsed'
de amperd'
per larma banked'**

**ne
deprimiĝu morne je
senĉesa
pluvo tiom tre**

**sun'
baldaŭ venos per fortun'
vin beni
kaj per freŝa jun'**

**vin
mi vere kun korinklin'
admiras
sekvas kun obstin'**

**hej
restu en via sidej'
memoru
mi vin amas plej**

Spektado al Maro

**Vent'
blovetas ĉe ĉi moment'
leĝere
kvazaŭ kun lament'.**

**Ond'
petolas en mara mond'
verŝajne
kiel vagabond'.**

Sur
akvo ŝipoj en vetur'
skuiĝas
je onda plezur'.

Mev'
je ondaj mallev' kaj lev'
rondflugas
super ŝaŭma krev'.

Sun'
bakanta arde per brun'
koloras
naĝantojn de jun'.

Jen
intensiĝas venta pen'
subite
el mara eben'.

Nun
kvieto formortas kun
trankvilo
sub ondega pun'.

For
naĝantoj kun morna kor'
sin kaŝas
el mara rankor'.

Vel'
blanka ankaŭ en ventpel'
senspuras
el brua pelmel'.

Nub'
griza kvaz' malpura rub'
ŝutiĝas
de petola bub'.

Jam
la sun' kun malforta flam'
elfadas

el bilda ornam'.

Ĝu'
el spektad' nin je enu'
senigas.
Kun rava sent', ĉu?

Yanke

Nostalgio

sent'
trista ronĝas per turment'
min pike
ja kiel serpent'

mi
ŝajne vidas en vizi'
gepatrojn
kun olda larmstri'

fil'
du-jara en malfacil'
paŝadas
stumble sen stabil'

ŝi
l' edzino je emoci'
plenplena
jam ridas ne pli

lun'
disverŝas malhelan nun
lumstriojn
de friska aŭtun'

des
pli mi sub frida kares'
tremetas
je sopir-impres'

Milda Kiso

Sent'
pasia ĉe ĉi moment'

nin ligas
jen per malprudent'.

Glu'
korpa invitas al ĝu'
de amo
en la rendevu'.

Ŝi
sin proksimigas al mi
kun varmaj
lipoj de pasi'.

Nun
ektuŝas lipoj de jun'
leĝere
en ĝoja komun'.

Viv'
nia fandiĝas en saliv'
miela
kun koroj en driv'.

Zhuang Qixiong

Meditado

Sent'
esprimita de turment'
forflugu
kun aŭtuna vent'!

Ment'
splena, ofte en silent'.
Ne ploru
pro gaja moment'!

Pent'
profunda kaj neprudent'
kunfluu.
Ja denton pro dent'!

Gent'

**malsama,amo ident'!
Tra mondon
homara konsent'!**

Floro en Nokto

**Jen
dormegas la tutgarden'.
Petal' al
luno sonĝa scen'!**

**Sen
vento kaj nubo kun ben'.
Nur foli'
pensas ne katen'!**

**Splen'
izola iĝas stamen'.
Sed sub lun'
pase' kiel pren'!**

**En
kvieta nokt' per boben'
bela flor'
ploras pri viv-plen'?**

Amo Nobla

**Vok'
granda super pika mok'
gvidu min
al poet-epok'.**

**Kor'
patriota kun ador'
floru pro
belega kolor'.**

**Am'
nobla ĉiam sen ornam'
restos por
optimista flam'.**

Mia Edzino

1

Bel'
milda kaj spirita el
kor',kiel
serena ciel'.

2

Mens'
pura kaj favora pens',
kiel popl',
salik' de flirt-dens'.

3

Ruĝ'
vizaĝa de hont',por fuĝ'
de flustro,
per lerta rifuĝ'.

4

En
kvieta ale',mien'
gaja kun
mi nokta promen'.

5

Rid'
ĉarma,feliĉa avid'
vivos pro
senlima konfid'!

Shuidiaogetou (Preludo de Akva Melodio)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 9 kaj 10 versoj respektive de 55, 65, 665, 55 / 333, 47, 665, 55 silaboj laŭ rimaranĝo de xa, xa, xxa, xa /xxa, xa, xxa, xa (x=senrima)

Eto

Kanto de Aglo

**alte rondflugas
super neĝmonto
per fortaj flugiloj
por okul-sondo
al okazaĵoj kaj
eventoj, mi, de la
homara mondo
ĉu en milita
aŭ paca rondo**

**malalte
mi ŝvebas
laŭ ondo
de rivero
al akvflua renkonto
ŝipoj kaj boatoj
navetas ĉi kaj re
per akva tondo
mi kontentas pri
homa respondo**

Melodio de Aŭtuna Vento

**el la ĉielo
ŝvebas muziko
tra natura harpo
kun frida piko
la vento susuras
kelkfoje murmuras
kun basa diko
kvazaŭ flustre al
kora amiko**

**kun hurle
muĝanta**

**metriko
ĝi la gamon
de sona mozaiko
ludas furioze
kun kant-akompano
ĉu l' romantiko
estas aŭtuna
vera indiko**

Guozhu

Je Mia Ora Jubileo

**Post pen' senlaca
kaj diligenta,
post hardado neĝa,
pluva kaj venta,
venas jubileo
de esperantistec'
duonjarcenta---
tag' memorinda,
horo eventa.**

**Temppaso
ŝajnas nur
momenta;
sed har-nigro
nun jam iĝis arĝenta.
Kun nova fervor' mi
marŝu kun kolegar'
sur voj' kunsenta,
en koro tajdas
ĝojo torenta!**

(2006-04-15)

Al Hosemo

**Nacia Tago.
Aŭtuno ora.
El Hosemo venas
kanto fervora.**

**Kun preĝo sincera,
pri Esperantismo
pie adora.
Profundan dankon!
amiko fora!
Ĉinesko
bel-sona,
sonora.
Min kortuŝas
paseo kar-memora.
Fidele laboru
ni samideane
kun ĵur' verdkora.
Marŝu antaŭen!
sub flago glora!**

Hosemo

Al Hu Guozhu

**Aŭtuno venas,
Blovas zefiro.
Kiam luno plenas,
Restas suspiro.
Vi kiel fakiro
Senlace ja penas
Kun la aspiro.
Ĉineskon tenas
Vi pioniro.
Al Viro
Mi benas
Per liro.
Vin ĉagrenas
Vi por bela inspiro.
Kiu vin komprenas?
Ho, via rapiro,
Bela satiro!
Mi sole splenas,
Pro la sopiro.**

Knabino Vilaĝa

kun ama sopir'
knabin' vilaĝa
kovas korinklinon
al fraŭl' junaĝa
honteme ŝi montri
ne povas la amon
sen kor' kuraĝa
kvazaŭ idiot'
kun kap' malsaĝa

ravita
esprimo
vizaĝa
kaŝiĝas en
vasta kampo sovaĝa
la ŝlosita koro
nur vane batadas
kun spir' domaĝa
kie via cel'
vivo-vojaĝa

Grilo kaj Formiko

en tempo vintra
satmanĝas formik'
el grasa gren-stoko
de seka tritik'
grilo treme pro frid'
sin turnas al najbar'
"Da greno, amik',
iome donu!"
per voĉa tragik'

la najbar'
mokdiras
per kritik'
"Kion manĝas
vi el somer-grafitik'?"

**“Neniom, en somer’
mi violonis per
belsona muzik’.”
“Do, ludu. Mortu
jen de malsat-pik’.”**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de K. Kalocsay)

Laŭ Ĉies Plaĉo

1.

**Azenon gvidis
al la foiro
patro rajdis ĝoje
kaj juna filo
piediris pene.
Venis hom’ renkonte
kun jena diro:
“Tre honte estas!
Kun malfacilo**

**infano
malforta
per iro
vin sekvas
kaj vi fortika viro
rajdas jen komforte.”
Je l’ indigna voĉo
per tuja ŝiro
descendis patro
kun peze spiro**

2.

**de l’ azenselo.
Metis rapide
filon li sur beston.
Sed vidalvide
ree venis homo,
kaj indignis: “Honte!
Komforte ride
surajdas knabo
kaj deprimate**

promenas
aĝulo
falglite.”
Je l’indigno,
desaltis fil’ decide
de l’azen’, kaj ambaŭ
marŝis kun trankvilo.
Dum ili ŝvite
antaŭen iris,
jen koincide

3.

veturanto venis.
“Stultege vere!”
Li ekkriis mire.
“Lacaj ansere
homoj marŝas stulte
dum la best’ sensarĝe
tretas libere.”
Do, kion fari?
Ili prefere

decidis
kunrajdi
ŝancele
sur l’ azenon.
Renkonte jen leĝere
venis hom’, kaj ege
miris je la sceno.
Diris kolere
li: “Honte! Honte!
La best’ mizere

4.

duoblan pezon
portas labore!
Vere kruela hom’!”
Ili angore
ligis beston per ŝnur’
je l’ kruroj, ĝin portis
ŝultrodolore
per stang’ ŝovita
tra kruroj bore.

**Ŝvitplene
marŝadis
fervore
ili porte.
Jen venis hom' sinjore,
kaj ĝis la eksceso
li ridante kriis:
"Kiel favore!
Kiel manie
kaj best-adore!**

5.

**Vivan azenon
oni kun pio
portas prizorgeme!
Kun simpatio
aŭ ne, mi ne scias.
Ho ve, prekaŭ mortas,
ho, mia Dio,
mi de ridego!"
Kun apatio,**

**la patro,
preskaŭ sen
racio,
al la filo
diris: "Mia konscio
for de mi seniĝas.
Do, ĉu ĝin mortigi
sen emocio,
aŭ nin pendumi
ĉe l' kol' sen scio?"**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Lily

En Uter' Patrina

Okaze de Patrina Tago

**mi suĉis, suĉis
el l' umbiliko
dolĉan nutran sukon**

**ĉu komuniko
kun patrino mia
mi piedfrapadis
kun bonefiko
ha, senparola
kara metriko**

**kelktempe
laŭ ritma
apliko
de skuado
kun ĝemkria muziko
mi scias, ke paĉjo
ŝerce ludas kun panj'
per bora piko
elen kaj enen
kia uniko**

Niuniu

Granda Amo

Okaze de Patrino Tago 2007

**dum multaj jaroj
suferojn dekmil
vi karega spertis
sed kun kor-trankvil'
ĉiam vi forridis
la malagrabraĵojn
en ĝoja babil'
kaj min edifas
per bona konsil'**

**amema
sindona
kun humil'
al via edz'
kaj esperoplena fil'
por hejma bonstato
kaj ilia onto
la ama profil'
eterne
ĉiele lumas en bril'**

Zhuang Qixiong

Gratulon al Estimata Sinjoro Guozhu

----por lia jubilea 50a esperantistiĝo

Sema printempo,

sezono flora.

Kun rideto venas

Jubile' ora.

Vi laboras pene

por Esperantismo

ankoraŭ glora.

Mi salutas Vin!

Simbol' verd-kora!

Metriko

Sopira,

Valora.

Min intigas

kopio kar-memora.

Vi tenas ĉineskon

senlace kaj firme.

Kiel honora!

Ni lernu de Vi!

Viv' bon-odora!

2006-3-27

Shuilongyin (Akva Drako)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 12 versoj de 67,444,444,5433 / 6,34,444,444,544 silaboj,
laŭ rimarangô xa,xxa,xxa,xxxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x= senrima)

Komencantino

Vulpo kaj Kapro

1.

Falis vulp' en puton,
pro manko de energi',
ĝi ne povis
elsalti jam.
Tra lumradi'
ĝi subite
vidis kapron
kun kora pi'
paŝi kaj halti
ĉe l' puta rand'.
Kun bonfara
ekkonsci',

sen ajna apati',
tuj tiu
kun simpati'
pridemandis:
"Kial resti
tie? Do, ki'
okazis jam?"
Vulp' emfazis:
"Ne, ne, neni'
okazis al mi.
Jen estas lok'
de iluzi'.

2.

Ĉi tie, ho, l' fresaj
aero kaj akvoflu'
donas al mi
la plezuron
de granda ĝu'.
Dum vi ŝvitas
kaj soifas
sufere, ĉu?

**Ensaltu! Kore
mi invitas.”
La kapro
laŭ instru’**

**saltis tra l’ puta tru’
tujtuje.
Kun korpa sku’
vulp’ sin svingis
per saltego
sen granda bru’
sur la dorson
de la kapro.
Kun peno plu
elgimpis elen
ĝi sen ajna
tempa malfru’.**

3.

**En obskuro puta
troviĝis kapr’ en panik’.
Senrimede
ĝi ne povas
per korna pik’
frapi vulpon.
Tiu trompis
per artifik’
la povran kapron.
La ruzulo
de supre
per eksplik’**

**diris: “Mia amik’,
cerbumu
sen ajn instig’:
ĉe la enir’
al iu lok’
de hermetik’,
havu certon
pri la elir’
al la trafik’.
Restu trankvila,
nu, adiaŭ
vi stulta brik’.”**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Silueto de Mia Patrino

**ĉiam diligenta
kaj senplendema patrin'
dum vivdaŭro
por cent jaroj
ho, glora in'
kun gefiloj
multenombraj
sen ajn forklin'
ŝi penlaboris
por vivteni
ofere
ĝis vivfin'**

**kiel surmonta pin'
ŝi estas
jen kun obstin'
per bonkondukt'
en vivado
kun korinklin'
al la edzo
kaj gefiloj
ĝis am-kulmin'
mi kun sincero
respektas kaj
adoras ŝin**

Lily

Tordiĝo en Sofo

**furioza dramo
okazas de am-horo
koketiĝo
karesado
por amoro
senvestado
brakumado**

**en ĝoj-horo
birdo ekduras
truo cedas
alloga
odoro**

**ekas klak-sonoro
de sofo
kun fervoro
mammordeti
man-esplori
sen doloro
ĝemkriadi
brue spiri
pro enboro
tordiĝ' en sofo
por geĝui
jen el koro**

Vira Odro

**ofte ravigas min
vira korpa odoro
kaj magia
kaj alloga
ĝis la koro
ĉe ekflaro
mi kolapsas
en angoro
avida je la
karesado
kisado
kaj boro**

**permana esploro
kaj kaco
kun fervoro
jam profunde
delogas min
al amoro
delikata
mia truo**

**je la horo
de suka fluo
damne damne
vir-vaporo**

Siyuanren (Sopiro al For a Homo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvin versoj kun 75,445 / 7,5,545 silaboj respektive, laŭ rimaranĝo xa,xxa / a,a,xxa (x=senrima).

Eto

Eterna Sopiro

**mia patro foriris
trans la markolo
antŭlonge
ĉiujare
pliiĝas volo**

**mia kun sanga bolo
por kor-konsolo
renkontiĝi kun
la karul' eĉ
sen ajn parolo**

Guozhu

Honfan pasis for

**Fulmotondra informo!
ŝokas min ĝis plor'
Mi ne povas
kredi, ke vi
Honfan pasis for!**

**Restas en mia memor'
Vi ĉiam Mentor'
Via EĈV
kaj EPĈ
kronas vin per glor'!**

Sumuzhe (Virina ĉapo)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 7 versoj de 33,45,7,45 silaboj, laŭ rimarangô xa,xa,a,xa (x=senrima)

Eto

Vivado en Polucio

**Ĉirkaŭ ni
la noci'
sufokiga
regas per magi'.
En atmosfera medi',
en akvfluo
fi-epidemi'**

**plenplenas —
poluci'.
Ĉu ni povas
jen kun apati'
hunde vivi sen defi'?
Ni nin savu
per rezista kri'!**

Komencantino

Primaver' en Vintro

**en vintro
vetero
peze plumba
sen ajn espero
sed venas primavero
en mallarĝa
mia karcero**

**amat' kun
sincero
verŝis koron
pri amafero**

**nia eĉ ĝis vespero
jen hurae
en am-libero**

Mulo kaj Di-Statuo

1.

**La mulo
kun peno
di-statuon
portis en beno.
Multaj pro respekt-teno
riverencis.
Kun miskompreno**

**pri glor' de
amemo,
plu la besto
ne en promeno
prancadis sen kateno
dance skue
kaj bum! L' ŝarĝpleno**

2.

**defalis
mizere
sur la teron.
La mastro vere
bastonis ĝin kolere
kaj admonis,
“Vi ja sufero**

**ricevu
tolere
bastonbatojn!
Dion prefere
oni kultas sincere,
sed ignoras
vin, ba, pretere!”**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Miĉino

Aŭtune

Nubiĝa
ĉielo.
Sub senĉesa
ventblova pelo,
folioj en pelmelo
falas. Flave
kovrita tero.

Aŭtun' sur
rivero
kunfandiĝas
kun ondŝancelo.
En form' de V-litero
flugas grup' de
sovaĝansero.

Sero

Unua Kiso

vangruĝe
plezure
knabina kor'
batas tambure
ĉe rendevuo nure
kun amato
amaventure

soife
murmure
pri geĝuo
sentakumule
korpkuniĝ' bonaŭgure
lip' kun lipo
okulobrule

Suzhongqing (Kora Sento)

ĉina fikforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 6 versoj respektive de 7,5,65 / 33,3,444, laŭ rimaranĝo a,a,xa / xa,a,xxa (x=senrima)

Eto

Sciuro en Kaĝo

post koŝmara vojaĝo
ekvivas en kaĝo
mi sub ama zorg'
kaj hom-domaĝo

arbaraj
pejzaĝo
sovaĝo
restas mia
sopirata
viv-miraĝo

Komencantino

Frida Koro

fridas jam mia koro
kun am-doloro
li eĉ forlasis min
en pens-angoro

ĝojindaj
ĝu-horo
memoro
jam seniĝis
senrevne
en vapore

Amo en Neĝo

sub blanka kovro l' amo
plenas je gamo
diafane lakta
ĉu el la mamo?

**tra minca
piĵamo
ornamo
de nudkorpo
ja videblas
svaga brilo
de am-flamo**

Danko

1.

**Vipur' mizere pro frid'
kuŝis en rigid'.
Baldaŭ ĝi kaptiĝis
de migrula vid'.**

**La migrul'
kun decid'
kaj plenfid'
tuj ĝin prenis
en sinon por
varma rezid'.**

2.

**Post reviviĝ', ĝi per dent'
lin je malatent'
mordis fatale
ĝis morta moment'.**

**Antaŭ mort'
kun lament'
kaj koment'
li diris, "Mi
stulte mortos
de la serpent'."**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Lily

Duŝo

**nuda korpo sub duŝo
kun ruĝa buŝo
mi lavas min zorge
kun mana tuŝo**

**lavitas
kulp-guŝo
pens-fuŝo
ĝis la haŭto
kaj senspure
per akv-puŝo**

Sero

Mia Fil' en Foro

**mi kun sopira dolor'
rigardas al for'
ĉu vi fartas bone
la kara trezor'?**

**lernadu
kun fervor'
en labor'
hejmeniru
vi fiere
en brila glor'**

Taichangyin

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 5 kaj 6 versoj rŝpektive de 7,5,5,34 / 445,5,34 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,a,xa / xxa,a,xa (x = senrima)

Eto

Migrado Suden

migradas surĉiele
birdaro cele
suden pelmele
glisante
altnivele

en ordema
formacio
ili cirkele
flugas ventpele
antaŭen
senŝancele

Komencantino

Paŝtisto kaj Leono

1.

Forrabis ŝafojn rabbest'.
Paŝtist' de honest',
je dia ĉeest',
ekplendis
jen kun protest':

“Ho granda Zeŭs,
se mi vere
ĝin prenos en arest',
mi je oferfest'
bovidon
el mia nest'

2.

elmetos pro via bon'.”
Kaj venis leon'
de besta reĝkron'

**deklaris
en laŭta ton’:**

**“Ĝin forigu.
Grandan bovon
mi laŭ la ordon’
oferos je don’
volonta,
al Zeŭs-patron’!”**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Lily

Amatina Vizaĝo

**amatina vizaĝo
kiel miraĝo
kolor-pejzaĝo
varias
pro am-saĝo**

**jen freneza
jen koketa
pro bor-vojaĝo
pasi’ en kaĝo
ekspodas
kun sovaĝo**

Tasuoxing (Paŝo sur Herbo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 44,7,77 silaboj, laŭ rimarangô xa,a,a,xa
(x=senrima)

Eto

Jasmeno

**delikata
vi jasmeno
aroma en ĝardeno
superbelas cent florojn
sen ioma ĉagreno**

**homaj laŭdoj
en bonveno
iradas kvazaŭ ĉeno
al vi jen sen troigo
— la sincera kompreno**

Komencantino

Flugemo

**1.
“Kiel rave
flugi sore!”
krias testud’ adore.
aŭdinte tion aglo
ĝin levprenas favore,**

**flugas alten.
Kelkahore
rondflugas agl’ explore
kaj trovas rokon sube
ĝin faligas ignore.**

**2.
Ve, okazis
forta frakas’!
Testudaj membroj, kiras’
frapiĝas kontraŭ roko,
ĝis ŝel- kaj-karna amas’.**

**Ĝi lamentis
pri la delas':
"Kia vera embaras'
flugi en aero alte
por la glite-rampa ras'!"**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

La Lango kaj la Mano

1.

**Vulp' rifuĝis
en paniko,
ĉar ĝia malamiko —
ĉasisto ĝin ĉaspelis.
Per ruza artifiko,**

**ĝi sukcesis
en herb-diko
al tend' ĉe arbradiko
de lign-hakisto fuĝis
kaj petis per ekspliko**

2.

**dolĉmilda lin
pri azilo.
Li kaŝis kun trankvilo
ĝin en la tendo. Poste
ĉasisto kun pafilo**

**jen alrapidis.
Kun kri-trilo
li ĉuis, "Sen babilo!
Ĉu vi ne vulpon vidis?"
La homo kun ĝentilo**

3.

**buŝe negis,
per mangesto
li montris kie l' besto
sin kaŝis. La ĉasisto
lin kredis kun honesto,**

sed pri lia
man-sugesto
li eĉ ne kun digesto
komprenis ĝin ververe,
kaj for por vulp-aresto

4.

li rapidis.
Vulp' elvenis
nun kaj foriri penis
silente. "Ej!" la homo
riproĉis, "Vi ĉagrenis

pri la vivo
kaj min benis
per dolĉaj vortoj, ĝenis
min per ofend' al ĉasist',
k' mi vian vivon tenis.

5.

Tre tre strange!
Foriras vi
sen dankesprimo al mi!"
Respondis vulpo tiam:
"Mi kore dankus kun pi',

se samlingve
en harmoni'
parolus kun simpati'
al mi mem viaj mano
kaj lang' de via konsci'."

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Niuniu

Sur la Sama Vojo

komence sur
vojo sama
homoj kun koro flama
iradas energie
je la penso vant-ama

post vojpeco

**makadama
per preteksto ornama
eĉ iuj retirigās
kun decidemo lama**

Taoyuan Yiguren (Sopiro pri Malnova Amiko)

unu el Ĉinaj fiksfarmaj poemoj el du strofoj po kvar versoj de 7,6,6,5 silaboj kun kontinua rimo

Eto

Floron al vi

funebre pri s-ro Gu Cunhua

**mane kun blanka floro
antaŭ vi sinjoro
mi kun trista koro
sen ĝena ploro**

**riverencu je gloro
via por laboro
kaj via fervoro
al verd-koloro**

Even

Al F-ino WU

**Vintre mankis ĉarm-kolor'.
Kreskas mute l' ador'.
Juno glitis jam for,
ĉe mi nur memor'.**

**Printempe repompos flor',
kaj rekantos kukol'.
Sed kiom plor' kaj sol'
pliiĝos en kor'?**

Tianjinsha (Pura Sablo)

ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 6,6,6,4,6 silaboj kun kontinua rimo

Ardo

Tianjinsha

**sur dezert' serpenta
paŝis vir' lamenta
frido, trist' turmenta
nokt' silenta
eĥas voĉ' lamentaj**

Lu Jixin (1953 -)

Sopirĝemo en Aŭtuno

**Montet' Arbar' Nubbrul'
Pontet' sinu' soltur',
Floset', friskbriz', ondlul',
Suben sunspur',
Vadant' en ĉi obskur'.**

1995-03

Tianxianzi (Fea Kanto)

ĉina fiksforma poemo de 6 versoj de 7,7,7,3,3,7 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa,a,a (x=senrima)

Eto

Falantaj Folioj

**en aŭtuna ventregal'
venas natura vandal'
deŝiritaj folioj
en rulfal'
al montval'
al tero kiel vual'**

Yanke

Revizit' al Mont' Feina

**vi kun talio klina
pozas kvazaŭ knabina
sidant' kombanta harojn
fascina
Feina
la Monto bondestina**

Tiaoxiaoling (Flirta Kanto)

ĉina fiksforma poemo al ok versoj de 2,2*,6,6;6,2**2*,6 silaboj, laŭ rimarango aAabbCcc. La 2-silabaj versoj devas esti la samaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono' roso-soro.

Eto

Fuma Polucio

fumo
fumo
nigra karb-konsumo
kvazaŭ viva ĉapo
super nia kapo
poka
poka
spaco helpo-voka

En Fumo Malaperi

fumo
fumo
el la brula zumo
de tabak-furaĝo
trakorpa vojaĝo
ĝoja
ĝoja
en veneno roja

fumo
fumo
kun morta mallumo
igas vin diskrevi
rabas ĉion de vi
vide
vide
al la mort' malride

Nacia Festo

floron
floron

ankaŭ nian koron
al la land' sincere
kaj respekte vere
reve
reve
alten flugu meve

Avida je Promocio

kien, kien
vi rampas kun ĉagren'
sub konkura frapo
ĝis rompita kapo
poka, poka
gajno reciproka

Even Chen (1963—)

En Vintro

Velkis,
velkis
roz', min kiel verges.
Se mankas vivo-flam',
mi zorgas vin en am'?'
Amen!
Am' en
ni iru romanen...

Guozhu

Ĉineske

I

Kara, kara
amatin' florjara!
Lip' ĉe lip' intimi,
dum kor' ĉe kor' rimi.
Miri, miri,
kio pli inspiri?

II

**Granda, granda
pekin-anas' frandan;
al gasto honora
invito plej mora.
Arom', arom'
veka al gastronom'!**

III

**Fia, fia
negoc'' sensacia.
Korupto al homo,
skandalo al nomo.
Mono, mono,
fonto de malbono!**

Sentitole

**Fia, fia
diboĉ' senracia,
volupto furora,
epidemi' mora,
amor', amor'
kanibala devor'!**

Hosemo

Sopiro al s-ro Dai Liming

**Foren,
Foren...
Vi kaŝis memoren.
Kiu restos krome
kun mi sola dome?
Medo,
Medo
Kaj velka bukedo.**

Komencantino

Vulpo kaj Vinbero

Vinber'
vinber'
pendas alte de ter'.
Saltas vulp' espere
sed vane prenis vere.
Reve
reve
damne nericeve!

Lace,
lace
diris vulp' sagace
"Ĝin ignoru deve!
"Eh, acida kreve!"
Vere
Vere
vinberaĉ' surtere!

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Amperdo

triste
triste
tordas kor' insiste
tutkorpe dolore
ĉiame langvore
revo
revo
pri ama ricevo

Vundo en Koro

I.
vundo
vundo
en kora profundo

kun sent' sufoka
kun konsolo poka
kapo
kapo
plena je mensfrapo

II.

dolor'
dolor'
pro perdita trezor'
amat' en amĉaso
eterna forlaso
sola
sola
mi jam senkonsola

Kris Long

Polucio

— post l' UK en Brajtono, 1989

Ŝtona, ŝtona
strand' Brajton-betona:
rubo, ne marstelo,
ladskatol', botelo
... lote, lote
glutas gorĝ' pilote

vastan, vastan
marsurfacon plastan!
Polietilena
sako, pako ĝena;
naĝe, naĝe
sen kuraĝ', enkaĝe.

Lily

Persistemo de Virino

peno
peno
al virin' ne ĝeno
jen daŭre klopodu

ne fervor-erodu
duro
duro
je ina plezuro

Svinganta Pugo

pugo
pugo
svingas en flugo
seksalloga movo
dezir-veka provo
voro
voro
de kac' en amoro

Memkonsolo

I.

bole
bole
mi mizeras sole
la stang' en man-preno
por orgasma veno
nove
nove
memkontent' denove

II.

fole
fole
por ĝui konsole
sen virkarna glavo
fingrumi en kavo
voka
voka
al rava sufoka

Duonjara Bebo

same
same

en kreskado flame
de balbuta knabo
ĝis fortika trabo
bora
bora
por estonto flora

Kampa Geiĝo

rava, rava
junulino brava
kuŝas por amoro
sur herbej' kun floro
oro, oro
de ama angoro

Amĝojo

brule, brule
ĝis la hor' korp-lula
jam rigidas glavo
komforte en kavo
voka, voka
al amĝoj' sufoka

Li Weilun (1936—)

Primavero

Salik,
salik!
primavera amik'.
Ondas verda maro.
Flirtas birda aro.
Ora, ora,
nia lando flora.

Lu Jixin (1953—)

Vagabondo

Vi, pro
vibro

**luma al krur-kriplo,
tiras vin el mas' da
hejmen-songô gasta.
Tagas!
Tag' 'as
bela, sed vi vagas.**

Roj-flanke

**Tange,
tanke,
premi min roj-flanke.
Flore, urse ĝemi.
Sinki, flosi, remi.
Mire,
Min re-
ravu, kara, vire!**

Dum la Vojaĝo

1

**Flama, flama,
vi en hor' romana.
Fore, el mia mut'
al vi okul-salut'
Tulas, tulas,
distanc' dum mi spuras.**

2

**Table, table,
sidas ni afable.
Verdaj koroj flutos
eĉ se l' sort' atutos.
Tostu, tostu,
por amika ŝos' nu!**

3

**Ha, Voss,
havos
bel-memoron. Gravos!
por nia hero' nu,
morgaŭ noble tronu,
nutro,
nutro.
Velu eta kutro!**

Dum la Vojaĝo

**Korte,
kor' de
vi jam trilas korde.
Vortoj verve farbas.
Suno pentre artas.
Tasar'
tasar'
jam plenas de nektar'.**

**Rida, rida,
okular' avida.
grupo familia.
Verd-ario trila.
La tri, la tri,
kore vervas flagri.**

**Verda, verda
parko. Vivo verva.
Movaj elsorĉitaj.
Korpoj jam forĝitaj.
Tajĝi, tajĝi
ĉina arto tajdi!**

**Suno.
Luno
brilas en okulo.
La juneco brulas,
kun sincer' gratulas.
Salut',
salut'
aŭdiĝas kora flut'.**

Dum Vojaĝo

**Arom' arom'
jen ĉirkaŭ via dom'
verda not' ĉapitra,
tra fenestro vitra.
Ravit' ravit',
ekfloras sub la vit'.**

Stumble,grumble

vi foriras sombre,
ĉar mi pan-avaris,
kvankam vi ja karis.
Riska,riska!
For de homo triska!

Tempo

Tempo, tempo,
kiel mita tembro!
povos ĝojon raspi
ankaŭ triston rasti,
tiras,diras
ison,osen iras.

Borde

Borde,
bor' de
ard' kaj korpotorde.
Varm-torento de vi,
lukti, ĝemi, revii.
Vire,
vi re-
delektu enire!

Vilaĝano Vendanta Lignkarbon

“Karbo,
karbo!”
Vintre, li kun garboj
tremas enmusline:
“Al vi plaĉus ĝi?” “Ne.”
“Ne ĝi?...
Neĝi!”
Nur kapleve preĝi.

Ĉineske

Ambaŭ,
ambaŭ
vi en ditirambon.
Ŝosoj el-markotaj.

**Vortoj anekdotoj.
Tajdo,
tajdo --
ĉesu fenda stato.**

* dum la 76a UK mi vidis, ke s-ano Liu kaj s-ino Wang, la ĉinaj espeantistoj el ambaŭ bordoj de l' markolo intime babilas.

Meva Maron

Blankaj Buloj

**Perloj! Perloj:
neĝborulaj ferloj.
Jam galantĵargone,
dafodiburĝone:
neĝo, neĝo
for post ĝlorsieĝo.**

Miĉino(1938-)

Vokoj

1999-05-08, informiĝinte ke kvin misiloj de NATO atakis la ĉinan ambasadorejon en Jugoslavio.

1

**Paco, paco
Sub bomba minaco !
Nun buĉas mortdona
Misil' Vaŝintona.
NATO, NATO,
Venigant' de fato !**

2

**Aĉe, aĉe
Bombadi sovaĝe !
Event' katastrofa,
Sanga ŝuldo nova.
Vano, vano -
Murdoj far Satano !**

Shi Chengtai

Meditado

**Suno, suno,
ardas en aŭtuno.
Senrikolte l' moko
al mi mem: jen rook!
Koro, koro,
kie — viv-valoro?**

**Ŝvebas, ŝvebas
jeto; l' raso strebas.
Dum tempa galopo
restas mond' en lopo.
Polo, polo,
Ĉu vi — nova rolo?**

1990 / 09

Vejdo

Ĝojan Printempan Feston!

**ĝoje
ĝoje
ĉiujare foje
kun novjara beno
al sukcesa veno
nove
nove
ekmarŝu denove**

Zepto

Ĉiam Verda

--Omaĝe al la 2-a Ĉina Esperanto-Kongreso
(1991-12-29/1992-01-03)

**Pino, pino,
kun fera obstino.
Jen ter', kvazaŭ krepo,
semas vi sur stepo.**

**Poste, poste,
sindonas senkoste.**

**Vivu, vivu,
antaŭen ne drivu.
Espero racia,
la pasio mia.
Ami, ami,
je elkore flami.**

(1991-12 Huhehot)

Zhuang Qixiong

Idealo

**Nova, nova
vila' ĉiopova!
Al tempon pilgrimi
por anim' pli rimi.
Miri miri,
neniam suspiri?**

**Granda, granda
Ideal' ne franda!
Respekto al homo;
ignoro al nomo.
Mono, mono,
kial plej bezono?**

Vivo

**Febla, febla
viv' plej ebri-eblo!
Veki en kaoso
per miela roso.
Soro, soro,
kun eterna gloro?**

**Paca, paca
homar' sen pli spaca!
Por ole-avidi,
tutmond' ne plu ridi.**

**Diri, diri:
Kien Uson' iri?**

Temple

**Fasta, fasta
bonz' kun edin' gasta.
Ĉu kiel atomo
flosas ekster domo?
Modo, modo--
per rido eksplodo!**

**Sava, sava
Buda' vere rava!
Ĉu la feliĉa viv'
ja tiel primitiv'?
Viti, viti--
Kial vi militi?**

Lumbriko

**Sente,
sente,
labori silente.
Teren loĝi sole
por sulki memvole.
Levo,
levo
kun riĉ-riza revo!**

Naiveco

I.

**Fora, fora
muzik', kun sonora!
Mi solece sidas
kaj mia kor' fridas.
Sadi', Sadi',
vi neniam radi?**

II.

**Gloro, gloro
kanto, sen fervora!
Kiam feliĉa viv'**

venos kun knab-naiv'?
Vina, vina
bonodor', obstina!

Rimo

I

Trista, trista
amo, sen rezista?
Jen sovaĝa floro—
kun milda memoro.
Romo, romo:
eterna aromo!

II.

Miro, miro—
el kora sopiro.
Per ĉiujn amuzi;
por poetojn muzi.
Zimu, zimu,
Mi vivojn rimu!

Montvilaĝo

I.

Sola, sola
vilaĝ', ĉu simbola?
Ĝi as ĉirkaŭ montar'
kaj ter' sen solidar'.
Radi, radi,
kiam vi invadi?

II.

Aspra, aspra
vojo: granda as pra-
patroj? kun firma vol';
tra natura izol'.
Lozi, lozi,
viv' ne por almozi!

Nova Sento

I.

Flava, flava

kajt'—model' tre rava.
Ĝi flirtas en ĉiel'
kaj kantas kun miel'.
El mi,el mi
ide' jam ekĝermi!

II.

Nova,nova
sent'—lingv' ĉiopova.
Verda flag' en koro;
Kun paca trezoro.
Rozo,rozo:
por amika pozo!

Sindono

I

Ĉarma,ĉarma
ridet',kun vort' varma?
Ŝi floras en naiv'
pura,plena de viv'.
Vive,vive,
ne fotu fiktive!

II

Vera, vera
amik', ĉu sincera?
Pro ama bezono,
senduba sindono.
Nodo, nodo,
por nobla klopodo!

Volo

I

Nova, nova
penso, ĉiopova?
Efika praktiko,
plej bona prediko.
Kodi, kodi—
per rido eksplodi!

II

Kvera, kvera

parolado,klera?
La granda korfavor'
as pli grava ol or'.
Rolo, rolo—
harmonia volo!

Vorto

I

Frida, frida
vort', kial konfida?
Ĉar ĝi utilas al
agado kaj batal'.
Alta, alta,
kun koro ekzalta!

II

Bona, bona
drog', ĉu ne bezona?
Kun amara gusto;
por korpo sen rusto.
Storu, storu,
ni pene laboru!

Al Mia Filo Zhuang Rui

Filo, filo,
ĉu ĉe komputilo?
Ekplodas per moko
el via dorm-loko.
Kolo,kolo,
kiel bona rolo!

Penus, penus.
vi;premio venus.
tra l' mondo klar-vidi,
ĉiam en kor' ridi.
Diri, diri,
kio pli sopiri?

Vintre

Neĝo, neĝo

flirtas ekster preĝo;
pli densiĝas vola
kiel knab' petola.
Alto,alto
kun feina salto?

Ĉarma,ĉanma
knabin' en kor' varma
neĝhomon formis jam;
ŝi gaja por ĉiam.
Maĉi, maĉi,
printemp' al vi plaĉi!
Neĝas en Nankino.

2006.2.5

Ŝi

I

Muta,muta,
Knabin' kun larm' guta.
Ŝi ne povas lerni
kaj sin bonguvernĉi.
Nivel',nivel',
jen plej riĉa rivel'?

II

Blinda,blinda,
patrin', tre glorinda!
Ŝi kantadas sur strat'
por kora surogat'.
Tago,tago,
pli tima ol vago?

Vivo pri Esperanto

I

Bela,bela
lingvo, ja anĝela ?
Kun pacista flago
por feliĉa tago!
Gota,gota
mondo, ne despota !

II

**Pala,pala
vivo, ideala ?
Ne povu eksplodi
de dolĉa melodi' !
Dilo, dilo,
kun hom-ama brilo !**

Animo

I

**Granda,granda
animo, ĉiam branda ?
Ridegu en krizo
ne pro sen ĉemizo !
Zomi,zomi,
ĝis ĉiel' aromi !**

II

**Moka moka
animo,sufoka ?
Kriegu por liber'
apud Jangzi-river' !
Revi, revu,
kapo preskaŭ krevi!**

Umefloro

I.

**Frosta, frosta,
umeflor',fer-osta!Al mi bon-odora;
al vi tre honora.
Rano, rano,
per puta ĉikano?**

II.

**Blanka,blanka,
umeflor',senmanka?
Ĝi disfloras sole
kaj odoras vole.
Levo, levo,
kun printempa devo!**

Mondo

I.

Bardo,bardo,
en koro kun ardo?
Nur vivo mizera;
laboro mistera.
Rate,rate,
ĉio iru glate!

II.

Mondo, mondo,
se sen vagabondo,
fariĝos pli bela;
amik' pli fidela.
Lade, lade,
ni paŝu ne pade!

2006-8-23

Jubilo pri Esperanto

I.

Bela, bela,
lingvo kun modela--
Lerni diligente;
prosperi torente.
Teren,teren,
disŝutu verda gren'!

II

Spaco, spaco,
Por feliĉ' kaj paco.
Sonegu jubilo
kun aminda filo!
Lofi,lofi,
pli granda ol strofi?

Wanghaichao (Rigardo al Martajdo)

ĉina fikforma poemo el du strofoj po 14 versoj de 446,446,5,54,47 / 6,54,446,5,54,47 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa,xxa,a,xa,xa / a,xa,xxa,a,xa,xa (x = senrima)

Guozhu kaj Lu Jixin :

Rigardante Martajdon

— Leginte la novlibron "Trans Maro..." de Lidia

八载苦闷
一言难尽
决意换种活法
纵有艰辛
义无反顾
下岗暂离中华
独自闯天涯
怀崇高理想
人类一家
凭世界语，绿踪
行遍，欧罗巴

Decidinte:
per luktado
tra viva rikan' do.
Senlabore
vi eliris
de la hejmolando.
Sola vadanto
kun idealo.
Verdaj plandoj
spuris tra Eŭropo
per Esperanto.

游记结集堪夸
写荷兰风情
危楼倾斜
波兰授拳
捷克盛会
国际家庭考查
并巴哈欧拉
凯旋门情思
德国租车
莉迪亚《海那边.....》
文坛绽奇葩—

Not' kun eleganto:
Vent' muelil' en
Nederlando,
kaj internacia
familio
en Pollando,
Bahaism grando,
Germana aŭto,
Franca frando...
Lidia Trans Maro
rara girlando !

En junio 1998, kadre de la 3^a Somera Seminario de HEA/ILEI/EVA, okazis la inaŭgura distribuado de la libro "Trans Maro..." de Lidia. Guozhu versis poemon en la ĉina kaj Lu Jixin tuj esperantigis ĝin. Do, pri la sama enhavo samtempe kreiĝis dulingvaj versioj ambaŭ en la sama fikforma ĉinesko Wanghaichao. Nun ni aperigis ilin paralele, por ke niaj karaj legantoj aprecu la raran specimenon. Ordinare la nomo de la ĉinesko ne aludas pri la enhavo. Tamen oni ankaŭ ne malpermesas ke ĝi iel aŭ iom aludas.

Azena Ruzo

1.

**Salon portis
laŭ rivero
pene la azeno.
Pro peza ŝarĝ'
ĝi enfalis
stumble kun ŝarĝpleno
akven kun ĝeno.
Kiam ĝi rampis
al tereno
seka borda,
eksenton de depreno**

**je peza ŝarĝteno
ĝi havis (ĉar sal'
je akv-veno
tuj solviĝis).
Do, de tiam,
en porta promeno,
kun granda peno
ĝi ĉiam saltis
sen ajn spleno
en riveron
por malpli peza premo.**

2.

**Alifoje
ne la salon
ĝi sammaniere
transportadis
sed la spongon.
Marŝis vol-libere
ĝi jen surtere
laŭ riverbordo.
Ĝi mizere
sub pezŝarĝo
iradis netolere.**

**Do, ĝi tuj prefere
en akvon saltis**

sendanĝere
por malpli
da ŝarĝpezo.
Spong' ja sorbis vere
akvon senpere.
Ho ve la pezo
malleĝere
prekaŭ premis
ĝin ĝisteren severe.

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Lily

Ludo en Kinejo

en mallumo
de l' kinejo
sidis en la loĝi'
mi kaj edzo
kia tedo!
ekpalpis fole mi
por petola ĝi
tra kalsonfendo
ja eta kri'
el li flugis
mi klinis kvazaŭ kun pi'

kapon por kis-seri'
kaj dolĉa suĉad'
ekstazis li
jam ĉi-hore
buŝe pistis
mi ja kun energi'
malgraŭ la medi'
li tordis, tordis
en agoni'
li ekŝprucis
ĉuron jam sen ajn konsci'

Lu Jixin (1953-) :

Kiel Ĉarmas La Momento

**kiel ĉarmas
rigardate
de vi, la momento !
ĉu tra nokto
stela kuro—
la brila torento ?
ĉu praa tento
el densa nuboj
luna plendo ?
tra nebulo
sun' el oriento ?**

**sorĉega evento ?
matena ruĝ' de
firmamento ?
hele trilo
de printempo
tra longa atendo ?
eble prudento :
viv' en eterna
la momento
sublime ekflami
kiel monumento !**

Vejdo

Spektado al Martajdo

**alrulas de
malproksime
sur blua kamparo
blankaj ondoj
egalritme
spite al ajn baro
kvazaŭ el maro
naskiĝas ĉen' de
neĝ-montaro
interpuŝa
kun forta senkomparo

verve mar-fanfaro**

**ekas ludi ĉe
estuaro
bravan marŝon
en ondpompo
muĝas sen eraro
batalĉevaloj
en preparo
por konkeri
en intensa batalo**

Zhuang Qixiong

Gratulon al la eLibro “Ĉineske”

**Kun tre longa
historio—
kara patrolando!
Ni fieras
pro brila kaj
poezia lando.
Ĉineska frando,
riĉa trezoro.
Propagando
estas la plej grava
per Esperanto.**

**Vorta eleganto,
senta eksplodo,
ama kanto,
pitoreska
pejzaĝo kaj
la petola dando.
Ĉineska fando
ĉiam restos en
bona brando!
Ha!nia “Ĉineske”
--rara girlando!**

Wuyeti (Nokta Krio de Korvo)

ĉina fikforma poemo el sep versoj de 6,3,9; / 3,3;3,9 silaboj, laŭ rim-arango de aaabbaa.

Guozhu

Funebre al Kara Jariĉ

**Forpas' pionira.
Ĉes' spira.
Nin vundis nekrolog' rapira.**

**Tenebro.
Funebro
Korŝira.
Eternas memor' vin sopira !**

Li Yu (937-978)

Sentitole

**Sen vort'. Tur-ascendo.
Krescento.
Aŭtun' ŝlosiĝas per silento**

**enkorta.
Senorda
turmento --
disiĝbedaŭra violento!**

trad. Guozhu

Xiangjianhuan (Ĝojo de intervidiĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj de tri kaj kvar versoj respektive kun 6,3,9;/3,3;3,9 silaboj, laŭ rimaranĝo aaa bb aa

Miĉino

Disiĝbedaŭro

Sen vort'. Tur-ascendo.
Krescento.
Aŭtun' ŝlosiĝas per silento.

Enkorta
senvorta
turmento —
disiĝbedaŭra violento!

Niuniu

Renkontiĝo kun Mia Filino

sen ajna parolo
sen ploro
ni kuniĝas koron ĉe koro
intime
proksime
memoro
kunfandas nin en ĝoja horo

Zhuang Qixiong

Jarfina Vespero

Kun rideto,frando
kaj kanto
ni celebris feston per brando.

Pro barda
petarda
sonfando

ĉiuj brilaj kiel girlando!

“Feliĉan Pritempan Feston!”

**Jen plej bela beno!
Kompreno
estas pli grava ol festeno.**

**En klara,
novjara
mateno
ĉiuj komplezas por bonveno.**

Xiaochongshan (Malgranda Montvico)

ĉina fiksforna poemo el du strofoj po 6 versoj de 7,54,7,35 / 5,53,7,35 silaboj, laŭ rimarango
a,xa,a,xa (x=senrima)

Eto

Urbo Brua

tra stratoj regas bruo
de aŭtoj, voĉa
homfluo
ĉio en vibra skuo
flosadas
samkiel buo.

individuo
homa vivas kun
detruo
cerbĉela kaj enuo
amare
sen viva ĝuo

Komencantino

La Ovoj

1.

Tagtage ovis kokin'.
Tre nekontentis
la mastrin'.
Ŝi provis je l' korinklin'
du ovojn
havi je tag-fin'.

Nutris laŭ rutin'
ŝi ĝin abunde.
Laŭ destin'
grasiĝa bird' de sangvin'
ne ovis
plu kiel ruin'.

2.

Jen similaĵ' al l' afer':
vivadis homo
en mizer',

preĝis pie kun sincer'
al Hermes
ĝis kun malesper'.

Fine per anser'
lin dotis Hermes
en aer'
patrone kun konsider'.
Ĝi oran
ovon ĉe vesper'

3.

metis tage kun favor'.
Pli kaj pli riĉis
je valor'
la hom'. Li antaŭ l' trezor'
kontentis
ne kun ĝoja kor'.

Daŭris la labor'
ansera lante.
Por pli or'
li volis sen kordolor'
mortigi
ĝin por esplor'

4.

funda interne de ĝi.
En lia kapo
fantazi'
konkeris super raci'.
En ĝia
ventra spacmedi'

troviĝis neni'
krom intestaĵoj.
Ĉe hor' ĉi
li priploris kun konsci'
la perdon
de ora magi'.

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Aglo kaj Sago

la aglon trafis piko
de sag' plumita
“amiko,
ha, stranga la logiko,”
li diris
sen ajn paniko

“jen per apliko
de plumoj niaj
k' efiko
de la armiltekniko
mi eĉ min
vundas sen fliko.”

(adaptita el Ezopa Saĝo de Kalocsay)

Niuniu

Montoj en Sudo

malhel-verdaj trajare
la sudaj montoj
kompare
malapikaj, ondare
etendaj
foren senbare

vento elmare
leĝere blovas
malklare
verda vidaĵ' malŝpare
varias
ondet-muare

Yanke

Ora Rikolto

surkampe steniĝas or'
ondanta ĉe blovo

**de venthor’
kun granda ĝojo en kor’
kampuloj
falças kun fervor’**

**en bona humor’
ili ekkantas
en gaj-ĥor’
pri la ĉiela favor’
kune kun
mema penlabor’**

Xiaomeihua (Malgranda Umefloro)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 11 versoj de 3,3,7;3,3,9;/7,7;3,3,9 silaboj, laŭ rimaranĝo aaa bbb cc ddd

Guozhu

Admire

**Ho, surpriz'!
Versa briz',
ĉarmas via improviz'.
Verda gem',
arta krem',
al mi tre plaĉas via poem'!
"Transformigu ni per sprit'
skem-katenon rekvizit'."
Asertprav'!
Rim', enhav'
plus form' kondukas al plena rav'.**

**Sanktpromes'
por sukces',
ni kultivu ĝin sen ĉes'.
Freŝa frond',
nova ond',
facila vento tra l' tuta mond'!
Kun prudenta devkonsci'
nian sulkon fusu ni!
Kontribu'--
granda ĝu'.
Ni do ĉinesku ankoraŭ plu!**

Xiaoxiangshen (Feino de Hunan)

ĉina fiksforna poemo el kvin versoj de 3,3*,7,77, laŭ rimarango de aAaxa (x=senrima).

Ardo

Amĵuro

I

Susure
Susure
Arbkrono jam purpure
vi diris plu amĵure
kortuŝis mi plezure

II

amĵure
amĵure
mi spertis amtorture
la jaroj pasis kure
perfidis min vi pure

Invit' al Ĉinesko

I

alvenu
alvenu
nun guozhu, ni kunpenu
por la ĉinesk-festeno
novicoj partoprenu

II

revenu
revenu
al la ĝardeno trenu
Vadant', scet', vejd' kaj plurajn
al Ĉinesk' plumon prenu

Guozhu (1938—)

Centjara Duopo

Duopo,
Duopo,

**glor' ne nur de Eŭropo,
sed ankaŭ de l' tutmondo,
malgraŭ tempa galopo.**

Komencantino

Amdeklaro

I

**ĉiame
ĉiame
vi deklaras fajrflame
per intima konduto
kaj per vortoj orname**

II

**tutsame
tutsame
vi nur parolas ame
kontraŭe vi plenumas
perfide al mi jame**

Xiechichun (Printempo ĉe Lago)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 8 versoj de 46,34,45,34 silaboj kun duona rimo

Eto

Lageto

primavero
falas ĉe lageto
kun fiŝoj
en saltĵeto
verd-salikoj
kun ŝosgravedo
skuadas
por poz-meto

kelkaj veloj
kiel driv-naveto
rapidas
kun flugpreto
gejunuloj
en fid-sekreto
kveras por
am-ripeto

Xi Jiangyue (Luno super Okcidenta Rivero)

unu el ĉinaj fikformaj poemoj el du strofoj po 4 versoj de 66,7,6 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a
(x=senrima)

Ardo

Responde al Nekonata S-rino

**Frida la lunarko
ritme plu promenas.
ĝi fiksdite lunplenas
Kiam vi revenas?**

**povraj rememoroj
korsopirojn trenas,
Ho, nun vere lunplenas,
Mi ĉinokte splenas**

Guozhu

Agrabla Vespero

**Riz-aroma ruo.
Riĉ-rikolta belo.
Kvakbruo ĉe orelo.
Agrabla vespero.**

**Du aŭ tri bolidoj
strekis tra l' ĉielo.
Post arbar' ekrivelo:
Pont' super rivero.**

Rimgratulo

al la 2-a Nordokcident-Ĉina Kongreso de Esperanto

**Okazas ĉijare
en ĉefurb' somera,
Dua Nordokcidenta
Kunveno espera.**

Kun tem' kuraĝiga.

**Per forto federa
kunstrui harmonian
socion prospera!**

(2007-06-30)

Komencantino

Hejmsopiro

**Elvokas plenluno
mian hejmsopiron
jen igas pens-eltiron
jen povran suspiron**

**Am', gepatroj, hejmo
kaŭzas ja korŝiron
sinkas en sonĝdeliron
en senhelpan spiron.**

Vulpo kaj Gruo

1.

**invitis gruon vulp'
al granda festeno
kaj promesis sen ĝeno
pri manĝaĵa pleno**

**gruo lin vizitis
per ĝusttempa veno
surtable pretas sceno
de telera ĉeno**

2.

**ja bongustaj manĝoj
supoj delikataj
jen en teleroj plataj
de gruo ŝatataj**

**sed kiel per beko
gru' per vortoj flataj
suĉmanĝas por palataj
ĝuoj ventrogrataj**

3.

por revenĝ' invitis
vulpon ĉe si gruo
al regala manĝ-gĝuo
de viand-menuo

lia ambrozio
metiĝis sen skuo
en botelon kun truo
por beka konstruo

4.

komforte la gruo
manĝis jen laŭplane
la vulpo provis vane
por ŝovi fazane

la gruo satmanĝis
senzorge tirane
la vulp' kolervulkane
foriris ŝvit-bane

(adaptita el Ezopa Saĝo de Kalocsay)

Xuexun

Vespero en Qingdao*

Malfermita urbo.
Vigl-prospera belo.
Fajfil-vok' ĉe orelo.
Bolanta vespero.

Arĝenta avio
flugis tra ĉielo.
Post domeg' ekriverelo:
Ŝipoj sur rivero.

*Qingdao (ĉingdaŭ): bela urbo ĉe bordo de Bohai-mar, prov. Shandong, Ĉinio.

Zhuang Qixiong

Vespero en Fuzimiao

**Prospera bazaro.
Lamp-flagrada belo.
Ĉarm-kantoj ĉe orelo.
Ebria vespero.**

**Ruĝ-brilaj lanternoj
Lumis tra l' ĉielo.
Sub rem-voĉ' ekrivelo:
Luno en rivero.**

Yanermei (Ĉarma Okulumo)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 5 versoj de 7,5,444 silaboj, laŭ rimarangô a,a,xxa / xa,xxa
(x= senrima)

Komencantino

Belaj Okuloj

rulas glima ondaro
en okulparo
granda, ronda
kaj profunda
kiel maro

amo saltas ĝojplene
sen ajn amaro
en okuloj
ŝiaj belaj
de purklaro

Miĉino

Ĉarma Okulumo

Ĉe ŝia sinturniĝo---
vera ĉarmriĉo.
Ameme ŝi
okulumas
pro feliĉo.

Ho, mi preskaŭ svenis ĝis
rava vertiĝo.
Mi tagnokte
ŝin aprecas
sen sufiĉo.

Niuniu

Vojo al Mont' Feina

vojo al Mont' Feina
kun vidaĵ' pina

**etendiĝas
zigzagforma
kaj senfina**

**al montsupro kulmina
en nubo sina
ĝoja kriad'
post grimpad' kun
vol' obstina**

Sero

Ĉarma Okulparo

**Per ĉarma okulparo
min al eraro
vi ja pelas.
Mi perpleksas
sen preparo.**

**Ĉu vi min amas vere?
Sed en malklaro
vi silentas.
Mi troviĝas
en amaro.**

Yejinmen (Vizito al Ora Pordo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 3,6,7,5 / 6,6,7,5 silaboj respektive kun kontinua rimo

Eto

Lasta Preĝado

**en blua
river' rapidflua
homoj sur floso skua
al for' vakua**

**preĝad' surgenua
por viv' la unua
kvankam foje enua
ĝis fin' detrua**

Yexingchuan (Nokta Ŝipvojaĝo)

ĉina fiksforna poemo el du strofoj po 6 versoj de 7,34,446 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa (x = senrima)

Ardo

Respondo al S-rino K

**galopis vagonaro
en pluvo
larmvualo
nebuligis
du okulojn
ĉe mi nur amaro**

**ĉielo, sur altaro
vi bontenu
karan paron
ne disiĝu
tempo pasis
sopir' en pensklaro**

Komencantino

En Vagonaro

**en vagonara lulo
samritma
kun okulo
nebuleca
duondorma
en sonĝa insulo**

**je perfingra kalkulo
vagonar'
per rad-rulo
proksimiĝos
unu tagon
al hejm' kun gratulo**

La Avida Hundo

1.

**Kun ekstazo ekscita
la hundo
plene ŝvita
kun viandpec'
la riveron
transnaĝis per glita**

**mov'. Je kapklin' subita
sin vidis
spegulita
li en l' akvo.
"Alia hund',
ho, kun bonkvalita**

2.

**viandpeco granda pli!"
imagis
enkore ĝi.
Je avideg'
ĝi atakis
puŝe kiel furi'**

**la akvbildon sen raci'.
Pum! falis
kun l' iluzi'
viandpeco
drone funden.
Por pli, fine neni'.**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Miĉino

Nokta Veturo

**Ventas. Nokta tenero.
Soleca
ŝip' kun velo.
Dum lunlumo
fluas onde**

en granda rivero.

Super la vasta tero
pendas mil
brilaj steloj.
Mi similas
al mev' inter
tero kaj ĉielo.

Xi Murong

Hejmveo

hejmlanda mia kanto —
jen fluto
de ŝveb-lanto
ĉiam ludas
en lun-nokto
vizi' de hejmlando

verŝajne svagas hanto
nebula
en konstanto
adiaŭa
hejmve' — ĉiam
juniĝa arb-planto

tradukis **Sam**

Yanke

Luna Nokto

en malhela lunbrilo
sub arbo
la profilo
de junulo
riveligas
stare en trankvilo

li en nokt' de aprilo
murmuras

**je bird-trilo
okaza jen
kio estas
en la kor-azilo**

Yijiangnan (Sopir-al-Sudo)

ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarango de xa,xa,a (x=senrima).

Ardo

Guto da paseoj

Neĝeroj
tremante flosas,
ventetoj fridaj blovas,
Ho, kion mi elfosas?
memoroj ja ĥaosas.

Kruela Disiĝo

Printempo
ankoraŭ frida
vi diris, ke vi iros
kun adiaŭ' perfida
Ĵaluzo rida

Ĉu vere?
vi ne diris foriri
dum lasta amrenkonto
vi hastas ja foriri?
mi jam kapgiris.

Jam palas
vizaĝo via
Kapkline mi amsopiras
vin kun amkoro pia
jam tre ebria.

Matene
mi vokis ne vin
neniu diris al mi
al kie mi vidus vin
Mi vokas plu vin

Sendanke
kaj senkompate

**Vi trafas mian koron
per glavo sangobata
Sen spur' korbata.**

Primaveraj Elegioj

**vi jesis
ke vi foriros
konfirmis onidiron
vi pri la hast-foriro
kun firma spiro**

**refoje
tre tre tremante
mi premas vian manon
senvorte rigardante
vin ŝtoniĝanta**

**ne diru
korŝirajn vortojn
ankoraŭ ne la tempo
por tranĉi la aorton
difini l'sorton.**

.....

**ne haltis
susura pluvo
ĉijare ne ŝanĝiĝis
la rivereta fluvo
korŝira pluvo.**

**zefiro
kun flirta pluvo
en frida primavero
mi vidis vin en rufo
kun pasi-fluo**

Al Lily

**ensorĉaj
ĉinesk' lirikaj
ne nur pri seksa temo**

**sed en aŭdaco pika
kun pens' tragika.**

Eto

Neĝa Vespero

**neĝflokaj
kuŝas sur tero
mi dronas en medito
kie troviĝas vero?
en la sufero.**

Lanc' kaj Ŝildo

(ĉina antikva fablo)

**Antaŭe
en la bazaro
persono estis, kiu
ofertis per komparo
de sama varo**

**la lancon
kun akra piko
kaj la ŝildon solidan.
Li blagis al publiko:
“Kia efiko!**

**Jen lanco
mia ja povas
trapiki ajnan ŝildon,
kiun oni ja trovas
kaj vere provas**

**enmonde!”
Kaj post momento,
li laŭdis fanfarone:
“Sen ajna ostento,
sen komplimento,**

jen ŝildo

**mia solida
plej estas sub la suno!
Kia ajn lanc' insida,
akre rapida**

**ne povas
trapenetri ĝin!"
Apudstaranto ĉuis:
"Ki' okazos en la fin',
se, jen kun obstin',**

**fortulo
pikos senpere
per via propra lanco
al via ŝild' severe?"
Stupora vere**

**vendanto
jen kiel ŝtono
sin tenis senrimede,
sen klariga rezono
sen respond-dono.**

Stela Nokto

**malklare
para siluet'
en brakumada ringo
ame kveras en sekret'
kun verva impet'**

Kuir-Fumo

**la fumo
sor malrapide
tag-post-tage egale
panj' kuiras memfide
kaj mienride**

**la fumo
— patrina poem'**

**pri ŝia kulturad' de
bone selektita sem'
kun elkreska em'**

**la fumo
— mia rekordo
ekde knabec' al juno
de naiva viv-tordo
al sukces-pordo**

Knabeco

Okaze de Infana Tago

**knabeco
la suno ora
prilumas mian koron
kristalan kun favora
la lumo glora**

**knabeco
ondanta maro
alportas al mi larmojn
pri pasintaj koŝmaro
kaj petol-faro**

**knabeco
floro aroma
beligas l' ordinaran
vivon kun ĝojo doma
kaj simpla noma**

**knabeco
numero blanka
jen min al firmamento
profunda kaj blu-planka
ĉagren-senmanka**

**knabeco
gajplena roĵo
forfluis malproksimen
kun mia plend-malĝojo
fojon post fojo**

Guozhu (1938-)

Prov' primitiva, prov' kreiva

— La unuaj 17 ĉineskoj Yijiangnan(Sopir-al-Sudo)

Arkivo

**pri prov' kultiva
antaŭ tridek kvar jaroj.
Ĉu iom primitiva?
Jes, kaj kreiva.**

1.

**Petaloj
falas senbrue
en ĝarden'. Trans kurteno
pluvadas kontinue
kaj silke blue.
(1973-01-03)**

2.

**Ĉu fajro
sovaĝa povas
forleki herbojn? Ho ne!
Jen vent' printempa blovas,
kaj herb' jam novas!
(1973-01-03)**

3.

**Suferis
ĉiam turmente
patriot'. Dum filistroj
vivon ĝuis kontente,
indiferente.**

4.

**Post pluvo
ĉu begonio
restas la sama? Sciu!
nun grasas nur folio,
krome nenio.**

5.

**Kamparon
kisas ĉielo,
kaj ĉarma luno tentas
boaton en rivero
per sorĉa belo.**

6.

**En kolzojn
kaŝe evitas**

kaj onden lekas.

11.

Se vi sur
Lushan vin trovas,
certe vi l' monton, kies
pejzaĝ' senĉese novas,
koni ne povas.

12.

Al dandoj
malsat' ne ĝenas
dum al viv' de kleruloj
ĉiam suferoj venas,
mizeroj plenas.

13.

En pluvet'
dorse sur azen'
veturante la poet'
lulis sin per rava tem'
taŭga por poem'.
(1973-01-10)

14.

Suferis
ja preskaŭ ĉiam
de amsopir' turmentojn.
Sed ĉu mi havus iam
penton? Neniam!

15.

Kiam vent'
taŭze flirtas kun
nuboj, super Fen-river'
ĉiampli forflugas nun
ostard' en aŭtun'.
(1973-01-12)

16.

Dancas jen
kirkle ĉe Yanshan
mate grandaj la neĝflok'
tumulte en ocean'
de frosturagan'.

17.

Ĉielo
kiel volb' pendas
super step'. El herbondoj
ŝafaro ekprezantas
sin, kiam ventas.

(1973-01-19)

Triope Berilas

Triope
jubileuloj
sur paĝo de Penseo
berilas kun stimuloj
benate de gratuloj

Fierinda Rekordo

Penseo
nun en kompleto
de cent kvardek numeroj
aperas en la reto—
venk' de stafeto.

(2003-07-09)

En Du Monatoj

I.

Disfloras
du cent poemoj
en ĝardeno ĉineska.
Dank' al verdaj agemoj
fruktas la gemoj.

II.

**Alies
nesamaj ŝatoj:
diskutoj kaj disputoj,
same en du monatoj —
nul rezultatoj!**

Rava Kunvojaĝo

**Nin ravas
sorĉa pejzaĝo
de Kokos-urb', Xinglong, kaj
blanksabla Yalong-plaĝo
dum kunvojaĝo!**

**Hainan en harmonio,
sorĉe belas la pejzaĝo:
Kokos-urbo, Xinglong, kaj
Yalong-plaĝo.
Nin ravas Ĉielranda
kunvojaĝo.
Rekordas seminario !**

2007-02-13

Sekve post Mesaĝoj de Komencantino

**Fabloj el
Ezopa Saĝo
jen aperas ĉineske
dank' al via kuraĝo,
lerto, kaj saĝo.**

**Mi legas
en vera ĝuo.
Kaj la originalon
nun aldonas per gluo
kun asiduo.**

**Kompara
lego konstatas,
ke vi bone adaptis,**

**la versoj delikatas,
kaj ni tre ŝatas!
(2007-03-06)**

Aplaŭde

**Mirinda
nova rekordo!
Tridek Sopir-al-Sudoj
de Lily en agordo
el sorĉa kordo.
(2007-03-05)**

Haicjo

Al la Kunsido Por la Aŭtunmeza Festo, 1985

**Kunsidu,
Karaj kolegoj
Je l' Aŭtumeza Festo!
Nin ravu la prelegoj
Kun la ardegoj.**

**Memoru:
Irita vojo
Zigzaga kaj peniga.
Finfina foj' post fojo
Alvenas ĝojo**

**Antaŭen!
nia afero
dank' al nia klopodo,
ni benu kun fireo,
al la prospero!**

1985-08-26

Lily

Valenteno sen Amato

**sengusta
morna valenten'**

pro malesto de amat'
kun donac' de ama ben'
mi en splen', ĉagren'

brulege
kun juk-maltrankvil'
kore kaj korpe flame
soifas mia subtil'
al forta boril'

nek rozon
nek ĉokoladon
mi volas, sed de amat'
violentan invadon
kacan nomadon

Rememoro pri Seksatenciteco

iunokte
je juna aĝo
revene el lernejo
kun naiva kuraĝo
al la vilaĝo

malkaŝe
fortika viro
baris al mi la vojon
preta per mana tiro
por vesta ŝiro

panike
en granda ŝoko
senforte en lia sin'
mi kolapsis sen voko
kiel neĝfloko

malklare
en mia kapo
alnaĝas panjaj vortoj
“por sukcesa eskapo
per piedfrapo!”

mi vikle

**baraktis pene
el firma brakumado
piedfrapis fortplene
ho ve, azene!**

**senforte
mi cedis vole
al volupta kisado
mi sentis min korpmole
senhelpe sole**

**dumvive
unuafoje
mi sub vira perforto
kuŝis tere ĉevoje
kiel malĝoje!**

**krima man'
senvestigis min
tutnuda sen ajn ĉifon'
mi falis kvaz' en ravin'
cede al destin'**

**diboĉe
li ludis fuŝe
mian korpon laŭvole
kisadis min pluvduŝe
forte perbuŝe**

**damninde
li suĉis mamon
mian tire kaj puŝe
mi sentis kaj balzamon
kaj brulan flamon**

**kia pik'
korpon trakuris
mi kuŝis obeeme
ĉu ĝi min aŭ torturis
aŭ min plezuris**

**alsuben
li palpis glite
al mia hara kavo**

**fulmo venis subite
fremde vizite**

**korpkline
per sia lango
li lekis mian truon
ambaŭ sur trema tango
de sent-lavango**

**konscie
mi sentis vere
malsekiĝi subaĵon
tikl' estiĝis pretere
kaj netolere**

**ankaŭ li
ne eltenis plu
sin rektigis abrupte
el de voluptema sku'
por sekvanta ĝu'**

**rapide
li jam deŝiris
siajn vestojn entute
neiun vorton diris
anhele spiris**

**kiele
figuro bela
li aspektas sangvine
kun konturo fabela
sed vol' kruela**

**rigidis
jam lia kolbas'
fortika, longa, fera
jen preta por predo-ĉas'
sen ajn embaras'**

**min kovris
li korpe glue
kaj murmuris karese
ĉeorele unue
kaj frotis due**

**glate
kac' jam sukcese
en min glitis senbare
profundiĝis senĉese
kaj neregrese**

**atako
de pika dolor'
trakuris tutan korpon
tamen la mava sinjor'
daŭris en labor'**

**akutvoĉe
mi kriis spite
kaj fortege baraktis
sub lia prem' ĝisŝvite
brule irite**

**tuj poste
ekstazo rava
min konkeris sensone
ĉesis la movo sava
por cedo sklava**

**li boris
ĉiam rapide
kun aŭdebla ronrono
kaj puŝ-tire senbride
vere perfide**

**kiel agl'
li laŭte kriĉis
kun kap' falanta sur mi
jam forton li dediĉis
klare feliĉis**

**mi sentis
varmegan fluon
erupciiĝi enen
alporti ravan ĝuon
en mian truon**

ni ambaŭ

kuŝis langvore
senparole enpense
ĉu indas ti' favore
aŭ malhonore

stariĝis
li kun kontento
sin vestis kaj sin zonis
post lascivaj atento
kaj diligento

ignore
li tuj foriris
kvazaŭe en koŝmaro
mi mizere deliris
peze suspiris

herbŝosoj
karexis mian
vizaĝon kosoleme
ĉielo! ĉu en plorban'
aŭ por viv-elan'

Mao Zifu (1963—)

Neforgeseblaj Tagoj de Studento

1. Pikniko

Somere,
la verda plaĝo.
Manĝi propran kuiron,
trinki ekster studkaĝo.
Ondad flor-aĝo.

2. Strando

Ridas sun',
kuŝas knabino
en bikino sen timid'.
Paŝas knab' kun rektspino
al riversino.

3. Bivakfajro

Stelaron

**fajro nuances.
Kisas teron per lumo
luno. Anĝeloj dancas,
ĉu nun romancas?**

Miĉino (1938-)

Ĉinoj Revenas

**Sendube
rekordon tenas
la Uhana Kolokvo.
Aŭdu : aklam' gojplenas :
" Ĉinoj revenas !"**

Dum la jardeko de Kultura Revolucio ĉina EM fariĝis neaŭdebla. Tial, la raporto pri la Uhana Kolokvo, kiu okazis, samdate kiel la 63-a UK, en 1978 07 30 , en urbo Wuhan, alportis veran surprizojon. UEA publikigis la koncernajn fotojn sur kovrilo de sia organo esperanto (n-ro 2/1979) kun aklama titolo : ĉinoj revenas !

Akrostiko

**Anoncas
Grupo Kantona
Al ni novan prosperon.
Debuto verde sprona,
Uvo — fruktdona !**

En junio 1998 venis el suda Ĉinio ĝoja novaĵo: la esperantistoj de Kantono decidis regule okazigi la "Agadan Tagon", por kune altigi la lingvan nivelon kaj por vigligi la lokan E movadon. Surbaze de tiu aktivado, ili eldonis novan revueton nomatan "AGADU".

Soelca Knabino

**knabino
en povra izol'
sen amikoj en amuz'
sen ludado en petol'
vivas nur en sol'**

Niuniu

Estonta Vivo

I

**patrino
jam al akuŝo
proksimiĝas mature
kiel krevanta guŝo
sen ajna puŝo**

II

**patrino
en longa kuŝo
spiras kun trema buŝo
bebon monden sen fuŝo
venas per tuŝo**

Sam

Knabino Linda

**knabino
kun figura bel'
altiras al si aron
da viroj de juna hel'
kun amĉasa cel'**

Ĝis Maljuna Aĝ'

**vian manon
prenas kun kuraĝ'
mi sincere fidele
dum geedziĝa vojaĝ'
ĝis maljuna aĝ'**

Ŝi Alvenis

I.

**iame
ŝi kun fervoro
eniris mian sinon**

**kiel ĉarma aŭroro
kun vivfavoro**

II.

**sed nune
ŝi sen kompato
foriris foren de mi
por virĉasanta ŝato
ve, mia fato**

Boato de Vivo

**flosante
en tanga maro
mia boat' de vivo
balancas en amaro
— senhelpa faro**

Dimanĉe

**mia mens'
en movema vag'
pri tio kaj alio
ĉu estas ripoza tag'
nur per pensa pag'**

Sunfloro

**sunfloro
ĉiam al suno
turnas sin per vizaĝo
ĉu flati por fortuno
sen brula puno**

Densa Nebulo

**malklara
densa nebulo
kovras ĉion per gaza
laktblanka minca tulo
mondo en lulo**

Kakto kaj Lacerto

**vivadas
kakto en dezert'
iutage alvenas
svelta rampanta lacert'
sen sona avert'**

**al kakto
ĉuas en inert'
li, "Kial tie vivas?"
la respondo en asert'
"Ripozo en cert'!"**

*ĉineske adaptita el "Kakto kaj Lacerto" poeme verkita de S. Urban

Renkontiĝo de S-anoj

**saluton!
la verda vorto
ŝvebas ĉe renkontiĝ' de
esperanta kohorto
kun vigla forto**

**manpremad'
senta esprimo
varmigas ĉies korojn
kun samcela intimo
de malproksimo**

**brakumad'
kara alligo
revekas rememorojn
kun kuraĝa instigo
al plu-navigo**

**vin-tostad'
ĉe la koktelo
levas verdan fervoron
por samklopoda celo
kun brila helo**

**parolad'
pri granda plano
altiras manklakadon
je la granda elano
de verda klano**

Limigita Homvivo

**homvivo
rulas destina
dum ĉasado al scioj
kun fervoro obstina
daŭras senfina**

Nokta Penso

**plenluno
prujneske brilas
kapleve mi ĝin spektas
mi al hejmlok' sopiras
vagpenso iras**

Suda Pejzaĝ'

**suda pejzaĝ'
famas en naci'
sub sun' fajr-ruĝas floroj
roj' printempe verdas pli
ĉarmas vido ĉi**

(adaptita el poemo de Bai Juyi, poeto de Tang-dinastio, Ĉinio)

Edz-Sopira

**matene
mi edz-sopira
ne trovas lian velon
ĝis en sunlum' subira**

kun sent' korŝira

(adaptita el poemo de Wen Tingjun, poeto de Tang-dinastio, Ĉinio)

Vejdo

Eta Pluvo

**pluveto
frapas pogute
en venta kirla hurlo
son-muzikas liute
kvazaŭ salute**

Valora Paŝo

— **la unuaj 17 ĉineskoj Yijiangnan**

**naiva
komenca paŝo
tamen bazo masiva
por belo perspektiva
k' ĉinesko viva**

Libero

**liberon
ĝuis ĉevalo
povas laŭplaĉe troti
en kampo kaj tra valo
eĉ tra ĝangalo**

**alvenis
cervo malbona
malpurigis fontakvon
tretis herbojn fripona
kun moko sona**

**ofendis
li per fiago
ĉevalon ĝis indigno
tiu volis pro l' plago**

venĝi por pago

**sed cervo
lertis en kuro
ĉeval' lin vane kaptis
kun granda malplezuro
sen ajn mezuro**

**ĉevalo
sin turnis al vir'
por helpe mortigi lin
je sia venĝa dezir'
de ronĝa korŝir'**

**la homo
promesis jese
kun postulo almeti
bridon, selon necese
certe permese**

**ĉasisto
rajdis fine
surĉevale por ĉasi
kaj lanctrafis obstine
cervon ruine**

**de tiam
vole ne vole
fariĝis sklav' de l' homo
kun bridŝnuro surkole
en stal' izole**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Taŭro kaj Kulo

**Flugfalis
malgranda kulo
sur la kornon de taŭro.
Post ioma temprulo,
la eta ulo**

**kompleze
diris al taŭro,
“Se mi tro pezas por vi,
do diru sen bedaŭro,
tiel ke kaŭro**

**mia sur
vi tuj rapide
ĉesiĝu per forflugo.”
La taŭro diris fride,
“Ba! laŭdecide**

**alflugu,
kaŭru kaj foren,
ho giganta, mi fakte
ne prenas vin enkoren
nek vin ignoren.”**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Leporoj kaj Vulpoj

**Leporoj
batali pretas
kun agloj pri tereno.
De vulpoj ili petas
helpon, kaj ĵetas**

**parolon
la jenan tiuj:
“Volonte, se ni scius,
batali kontraŭ kiuj
kun kiuj ĉiuj.”**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Ezopo

**Ezopo!
Ĉu estis vere,
aŭ li ne estis tute?
Rakontas oni klere**

sed svag-aere.

**Li tamen
vivadas ĝis nun
eĉ se li ne jam vivis.
Se Hellas naskis lin kun
anim' sub la sun'**

**ĝi fakte
lin kreis vive.
Laŭdire kiel sklavo
en Friga, efektive,
kore naive,**

**li estis
platnaza, lama
malalta, ŝveloventra
knabo sen vervo flama,
mutulo fama.**

**La mastro
al kamp-laboro
lin sendis, ĉar li taŭgis
nenie. Per rigoro
de pikdoloro**

**kunuloj
lin mokis aĉe
pri liaj malbeleco,
muteco vorte kraĉe,
ĉiam laŭplaĉe.**

**Kaj krome,
je lia muto,
akiris ili multon.
Ekzemple, per imputo
de mav-konduto**

**de l' ŝtelo
de mastraj figoj,
akuzis ili, ĉar li
per vorta senkulpigo
kontraŭ l' intrigo**

ne povis
ekskuzi vorte.
Ezopo trinkis akvon
varman kaj langon forte
premis elporte,

vomis, kaj
signis permane
al mastro, ke li ĉiujn
devigu fari same.
Oni senvane

eltrovis
ŝtelistojn vere.
Li do sin savis, liaj
kunuloj jen kolere
kaj netolere

kontraŭ li
kraĉis lamente
antaŭ la mastro. Foje
arbare li renkonte
eltrovis, senatente,

Artemis-
pastrinojn dense
de l' arbaro perdintajn
vojon, kaj li senpense,
kaj senintence

al ili
la vojon ĝustan.
Ensonge li pro tio
akiris pagon justan—
ili igis rustan

la langon
parole pova,
kaj eĉ ne ordinare.
Li tamen ne per nova
lango saĝkova

li bone
ja sin defendis

**kontraŭ la kamlunio.
La mastro lin forsendis
kaj lin forvendis.**

**La mastro
nova lin lokis
por varto de l' infanoj,
sed hejme li elvokis
kaj eĉ provokis**

**konsternon
jen pro malbela
sia. Post baldaŭ l' mastro
lin portis sub vip-pelo
al foir-celo**

**kune kun
la karavano.
Ĉe ekiro permesis
oni al la infano
en mava sano**

**elekti
ŝarĝon laŭvole.
Je ĉies mir', li portis
plej pezan ŝarĝon fole
kaj senparole**

**jen sur sin.
Sub la pan-korbo,
la plej peza, li prekaŭ
falas pro febla korpo,
sed post manĝsorbo**

**fojfoja,
la korb' fascine
fariĝis jen malplena,
atinginte sunkline
foiron fine.**

**Ĉi tie
pri li marĉandis
la filozofa Xanthos.
Komence arogantis**

kaj pridemandis

**ridaĉe
disĉiploj liaj,
sed kiam li respondis
per vortoj kaj raciaj
kaj saĝ-konsciaj,**

**ili mem
al majstro donis
monon por aĉeti lin.
Ili l' sklavon bezonis,
kaj bone konis.**

**La majstro
al sia bela
edzin' donacis sklavon
la novan, sed l' anĝela
ino malhela**

**fariĝis,
ĉar ŝi atendis
belan kaj junan sklavon.
La milito etendis
kaj pli kresĉendis**

**intere
de l' saĝa sklavo
kaj bela majstredzino.
Laŭdire, l' majstr' per savo
el brua kavo**

**kvelera
lin tiris pene,
ĉar tiu eble servis
kaj helpis pli utile
ĉe tiu brile.**

**Tiame
majstro promesis
al sklavo liberigon,
sed neniam kapjesis,
ti' ne sukcesis.**

**La sklavo
lin ĉikanetis
la filozofon kaj per
pika ag' lin raketis:
jen foje petis**

**la majstro
por manĝon lenton,
kuiris li nur grajnon;
Foje kaŭzis lamenton,
Li, naŭzan senton:**

**la majstro
de la festeno
frandaĵon sendis per li
hejmen kun vorta ĉeno:
“Ĉe hejmeveno,**

**donu al
la delikata
delikataĵon.” Kaj li
ĝin donis al malsata
hundo ŝatata.**

**L' edzino
indignis vere
tiel ke ŝi ne volis
lin vidi plu espere,
sakris severe.**

**La majstro
jen malespere
Ezopon riproĉegis.
Repondis li tolere
kaj senfiere:**

**“Mi agis
ja laŭ ordono
precize. delikata
plej estas en salono
ne la persono**

**sed hundo.
Ĝi ĉiam kuras**

**al vi ĉe hejmeveno
via, kaj vi plezuras
kaj bonhumuras.**

**Kaj kiel
ajn vi rigore
ĝin traktas, ĝi ne volas
forlasi domon ignore
kaj malfavore.**

**La vero
l' edzinon povis
ne teni hejme, fuĝis
ŝi al la patro, kovis
haton, forŝovis**

**la hejmon.
Flat' aŭ donaco
aŭ promes' ŝin ne povis
tiri al hejma paco.
Jen kun sagaco**

**Ezopo
al li promesis
reporti la virinon.
Siajn planojn li pesis,
fine sukcesis**

**elpensi
rimedon bonan:
li iris al foiro
kaj faris fanfaronan,
superbezonan**

**aĉeton
por la festeno
granda, kaj famigis, ke
Xanthos, en teda ĝeno
de senreveno**

**de sia
edzino kara,
intencas reedziĝi.
Nu, post tio blondhara**

ino erara

**revenis
hejmen rapide.
Laŭdire, l' filozofa
petis al li decide
juĝi klarvide,**

**kio plej
estas utila.
Ezopo diris jene,
"La lango estas brila
plej en subtila**

**hommondo,
ĉar vi ja devas
per ĝi preĝi kaj danki
al Dio, kaj ricevas
benojn, kaj levas**

**animon
ni altspirita.
La lang' al saĝo vortojn
donas, kaj per ĝi,
senhezita
kaj neevita**

**ni veron
parolas tute,
kaj ĉiu ĝojo fontas
jen el ĝi absolute."
Kaj ŝajn-diskute**

**la majstro
demandon donis
pri plej nociva aĵo,
ankaŭ Ezop' admonis
kaj plu rezonis**

**per lango:
"Lango nature
estas la plej nociva.
Ĝi flatas senmezure
al rango nure**

senviva
kaj senmerita,
al kalumni' , delogo
kaj mensogo irita
kaj ĉion spita.

Ĝi diras
la argumentojn
malverajn kaj subfosas
familiojn kaj gentojn
kaj homajn sentojn.”

Laŭdire
deziris banon
la filozofo foje
kaj sendis la helpmanon,
la sklavan nanon

iri al
la bana domo
por rigardi, ĉu tie
troviĝas tro da homoj
kun ŝvit-aromo.

Ezopo
iris kaj staris
ĉe la pordo. Survoje
la vojon ŝtono baris
kaj vere faris

venanton
stumbli sufere.
Sed ĉiuj lasis resti
ĝin tie jen surtere.
Iu kolere

postlonge
flankĵetis vole
ĝin. Li revenis hejmen,
raportis: homo sola
troviĝas fole

en banej’.

**Alia rakont'
diras, ke l' filozofa
atendis por la renkont'
de sia fak-rond'**

**amikojn
kaj ĉe la pordo
Ezopon li starigis
por teni bonan ordon.
Li, kiel lordo,**

**ordonis,
ke lasu sole
li enen filozofojn,
por ke tedu laŭvole
ne aĉparole**

**vulgaraj
homoj. Alvenis
filozofoj kaj ĉiun
li ofendis aŭ ĝenis,
aŭ bari penis.**

**Nu, ĉiu
iris kolere.
Kaj postan tagon Xanthos
riproĉis lin severe,
malbenis vere.**

**Ezopo
respondis jene:
lia devo je estas
enlasi memkomprene
ilin senĝene,**

**sed kiuj
vere facile
ekkoleras, forkuris,
tiuj ne laŭkonsile
kaj ne simile**

**ja estas
en senco vera
filozofoj, sed povra**

popol' kun malsupera
aspekt' malklera.

Rakontas
oni tre klare,
ke l' filozofa trovis
trezoron senerare
kaj malavare

helpe de
Ezop' varmkora.
Li devus la duonon
donis al penlabora
Ezop' fervora,

sed li ne
divide volis
kun li l' riĉaĵon grandan,
nek pri liber' parolis,
kaj eĉ strangolis

promesojn
siajn kruele.
Por teni la sekreton
Ezopon li karcere
fermis senpere.

Sed kiam
en l' urb-agoro
la Samosanoj svarmis
torente je fest-horo
kun ĝoja koro,

el l' alto
plonĝis subite
aglo, kaj kaptis l' urban
blazonringon senspice,
forflugis glite,

kaj ĵetis
ĝin senatende
en la sinon de sklavo
kaj pafiĝis nubfende,
alten ascende.

Ekkrio
“Mesaĝo dia!”
Popolo sin al Xanthos
turnis kun koro pia
kaj iluzia

por vere
deĉifri certe
ĉielan la mesaĝon.
Li en mediton sperte
falis, sed lerte

ne povis
li en dilemo
respondon trovis, kaj li
konfuzis pri l’ problemo
de l’ urb-emblemo.

Troviĝis
en la danĝero
nun lia tuta famo.
Nevole la espero
pri solva vero

metiĝis
al cerba saĝo
de Ezopo, kiu ja
fojfoje kun kuraĝo
al liber-naĝo

petadis.
“Solvos l’ aŭguron
mi, sed nur, se ĝin mi mem
rakontos kun plezuro,
per rond-veturo,

al plebo
en urb-agoro,”
li diris, “Vidu, el ti’
vi profitos kun gloro
kaj la favoro

de l’ plebo:

**Estas fiero
de l' mastro l' saĝa sklavo."
Do, Xanthos kun sincero
kaj per prefero**

**kunvokis
konsilantaron
kaj popolon en placon.
Kiam en homan maron
sian amaron**

**de malbel'
aperigis li,
eksonis murmuro de
seniluziiĝ' kaj kri'
de antipati'**

**kaj mokoĵ.
Sed per parolo
nobla li sin defendis:
"Ni Samosa popolo
kun longa gloro!**

**Ne juĝu
ja laŭapere
personon. Jes, mi estas
malbela jen ekstere
eĉ netolere.**

**La pura
kor' kaj la belo
de l' animo devigas
je respekto ĉielon
de brila helo."**

**Korife'
la amason nun
admonis, kaj Ezopon
petis: "Ne koleru kun
maltrankvila pun'**

**pro l' bruo
de la senkleraj,
sed diru, se vi scias**

**ion por bonoj belaj
de l' urb' supera.”**

**Ezopo
tiam komence
diris, kiom da fojoj
li jam sendiference
helpis intence**

**la majstron
savis fervore,
kiomfoje promesis
tiu al li favore
kaj bonhumore**

**liberon,
sed ju pli multaj
liaj servoj, mizera
des pli ja senrezulta
kaj senkonsulta**

**fariĝas
la liberigo.
Postulis la popolo
al Zanthos, per instigo,
tujan malligon**

**de l' brava
kaj saĝa sklavo.
L' urbestro deklaris al
Xanthos: “Ezopa savo
el via havo**

**vizaĝas
jen elektojn du:
Aŭ vi lin liberigos
aŭ mi laŭ l' ofic-influ'
tion faros, nu,**

**ja kontraŭ
via deziro.”
La filozofo vole-
nevole sen ajn diro
pri la deiro**

**de Ezop’
kaj lin ĉeloke
liberigis. Nun Ezop’
ĉielsignon elvoke
klarigis ŝoke:**

**“La aglo,
estas bird-reĝo,
ĵetis aŭtonomian
simbolon per fortstreĉo,
laŭ ĉiel-leĝo,**

**al sklavo.
Tio kristale
signifas, ke ĝi jugos
la urbon, kaj fatale
la urbo fale**

**liberon
perdis rapide.”
Pli poste vere venis
senditoj maltimide
de l’ Lidja gvide**

**de l’ reĝo
Krezo postulis
submetiĝon, tributon.
Timiĝ’ tra l’ urbo rulis,
indigno brulis.**

**Ezopo
rifuzis fere
submetiĝon per vortoj
kaj deklaris fiere:
“Aŭdu parkere,**

**senditoj!
Antaŭ l’ popolo
du vojoj kuŝis klare:
unu voj’ per doloro
kaj sen konsolo**

ekiĝas

kaj finiĝas jen
je paco kaj libero.
L'alia, sen pen', sen ĝen',
sed kun katen'

komence
ŝajnas altira,
kaj finiĝas en amar'
ĝi al sklavec' korŝira
kaj ĝemsuspira

kondukas.
La Samosa gent'
naskiĝis ja libera,
volis kun libera sent'
je ĉiu moment'

vivadi,
ne kiel brute.
Por defendi, ajn forton
ni ja konkeros tute
kaj absolute!"

Nun Krezo
volis per arme'
ataki kontraŭ l' urbo
spitema. Li sciis, ke
l' instiganto de

rezisto
estas ververa
Ezop', do li postulis
de la urbo fiera
kun volo fera

elsendon
de Ezopo mem.
Tiu al Samosanoj
rakontis la fablon jen
kun simila tem'

pri ŝafoj
naivaj rare:
"Militis longan tempon

**jam ŝafgrego amare
kontraŭe are**

**spite al
la lupa hordo.
Lupoj venkis nature,
havante pli da forto.
Pendis la morto**

**sur ŝafoj.
Do ili fine
federis sin kun hunda
kohorto por obstine
kaj discipline**

**batali.
Kun helpo forta
de hundaro, forpelis
ili lupojn per orda
batad' ŝirmorda.**

**Post tempo
kelka, l' sendito
el lupa trup' aperis
ĉe ŝafoj sen invito.
Li kun ekscito**

**persvadis,
'Kial la batal'?'
La ŝaf' kaj l' lupo povas
kunvivi ja sen rival'
kvaz' en festival'.**

**Kaj ho ve,
tamen, sen sekur',
ni ĉiam tremas time.
Ni, lupoj, de mild-natur'
kaj bona kultur'**

**ja estas
kaj l' pacon amas.
Kaj, vi, ŝafoj pro via
obe' surtere famas.
Ni tute samas**

**rilate
al temperament'.
La hundoj ĉiam ĝene
kveleras kun malkontent',
bojas sen silent'.**

**Se hundojn
vi ja forpelas,
ni povas vivi pace.'
Tiuj vortoj tre belas
kaj vere celas**

**malpacon.
Sed ŝafoj krede
akceptis la konsilon,
ili ĉiurimede,
ankaŭ sencede,**

**forpelis
hundojn senspure.
La lupoj venĝsoife
atendis kaj terure
atakis kure**

**surkampe
ŝafojn, kruele
masakris ilin rabe
sen ajn rezist' ribela
kaj bar' forpela."**

**Ezopon
la Samosanoj
ne elliveris, sed li
volonte, jen kun plano,
iris al klano**

**de Krezo
kun granda gloro.
La reĝ' tre surpriziĝis,
l' impona oratoro
de la popolo**

ne estis

la venanto, sed
la kripla, nanstatura
sklavo kun nuda pied',
sen milit-kasked'.

Ezopo
diris sentime,
ke li venas memvole,
kaj petis plen-estime
kaj mild-esprime

de Krezo
indulgon kore.
Li nomis sin nur grilo
muzikanta fervore,
ne vund-dolore

pikante
iun nek ion.
Kaj tiam li elmontris
sian vastan fabl-scion
kaj la magion

persvadan.
Li fablon jenan
rakontis: "Dum akridojn
ekstermadis venenajn,
grilon ĝenplenan

li kaptis.
Ĝi ĉirpis peton:
Ne premu min ĝismorte,
al frukt' detruan treton,
al spik' mordeton

neniam
mi donis fuŝe.
Mi nur kreas muzikon.
Kiam trilas etpuŝe
mi balsam-tuŝe

ekgajas
iranto laca,
vi kaj filoj gajos. Min

lasu en vivo paca
kaj senminaca.

Mi nek vin
ja povas piki
nek endomaĝigi, nek
mordi, sed nur muziki
ĝoje muziki.”

Daŭrigis
Ezop’ sincere,
“Jes, reĝ’, mi estas tia,
la kantisto, ververe.
Servon prefere

mi donas
al la homaro,
trezoron mian tutan
ankaŭ. Kaj nur bonfaro,
oferpreparo

jen estas
mia aspiro
azen’ min provis vane
imiti sen akiro,
kaj per satiro

min mokas
formikoj cele
al sia gren-akumulo.”
Reĝ’ aŭskultis ĝojŝvele
lin plezurpele,

kaj fidon
metis bonvole
sur lin, kaj tiele do
sukcesis li laŭvole
akiri sole

la pacon
por la popolo,
kiu lin ja akceptis
venkmarŝe en ĝojbolo
kiel idolon.

**Rakontas
oni komplete,
ke el Samos-insulo
li iris for boate
kaj migris sate**

**de urbo
al urb' kaj ĉie,
vizitis Babilonon,
aventurojn havis tie
kaj spertojn plie.**

**Al Hellas
revenis fine
Ezop', al Delfoj trafis
kaj okazis fascine,
ŝajne destine,**

**konflikto
inter Ezopo
kaj sanktaj aŭguristoj.
Neniu en Eŭropo
aŭ sur ter globo**

**scias pri
kia obscedo
kroĉiĝis al konflikto,
ĉar nur postrestis pledo
jena laŭ kredo,**

**ĉar l' aktoj
de la proceso
jam perdiĝis senspure.
La pledo, sen eksceso,
kaj laŭ konfeso**

**priskribas
la kolizion:
“Ho pastroj, aŭdu. Iam
respektis viajn pion
mi kaj konscion,**

ĉar Delfoj

fama tuttere,
sed kiam mi alvenis,
mi ŝanĝis jen kolere
kaj konsidere

ideojn
miajn entute.
Klarigos tion jene
detale mi pogute.
Mi marapude

jen vidis,
ke sur marondo
naĝas tre fore io,
tiom ĉe horizonto,
laŭ imag-sondo

mia, ĝi
ja estas ŝipo.
Sed kiam ĝi alnaĝas
sub ondpuŝ' kaj ventvipo,
nur putra ŝtipo

aperas
antaŭ okuloj.”
La grilo, tamen, povis
ankaŭ piki pro brulo
kvaz' frenezulo.

La pikojn
tiajn ne ŝatis
la potenculoj. Seianus
akuzis, kaj lin batis
kaj malkompatis

I' unua
plaga fatalo.
Li certe lin defendis
sukcese kontr' rivalo
en leĝbatalo.

Pastroj, por
lia mortigo,
eĉ enŝovis en aĵojn

liajn, jen per intrigo,
sanktan kalikon

de templo
Apoll', pri ŝtelo
sakrilegia akuzis
lin, juĝis sen ŝancelo
kaj kun kruelo

mortpunon.
Al l' ekzekuto
survoje li ankoraŭ
provis per forta tuto,
saĝa elŝuto

rakontis
fablojn intence
por ilustru punon de
perforto alud-sence.
Li dekomence

ja citis
fablon pri rano
kaj mus', pri agl' kaj vulpo,
persvadis al mens-sano
de la just-amo,

kaj eble
li cignokante
fablis ankaŭ pri agl' kaj
alaŭdo aplom-lante
kaj instruante,

sed ĉio
'stis senutila.
Nun li diris laste, kun
"humuro pendumila"
per saĝo brila:

"Antaŭe
kampulo aĝa
estis, kiu jam manĝis
bulbojn en dom' vilaĝa,
sed urb'pejzaĝa

ankoraŭ
ne sin prezentis
antaŭ liaj okuloj.
Li malĝoja sin sentis,
do li lamentis,

petante:
'Multajn panojn jam
mi manĝis, sed forlasis
ĉi dometon neniam,
kun dezira flam'

mi volas
urben veturi.
Rajdbeston donu al mi.'
Por igi lin plezuri,
oni kunkuri

jen lasis
azenon kun li.
L' aĝulo ekvojaĝis
jen al la urbo per ĝi.
Li, kun fantazi',

surrajde
sidis ĝojplene,
kiam ŝtormo lin trafis.
L' azeno prancis pene
l' aĝulon ĝene

balancis,
sin levis fine
subite sur la postajn
krurojn, puŝis flankkline
lin jen ruine

en foston.
Tie vundite
morte li kuŝis vee,
sufere dolorfrite
plene frid-ŝvite.

Apenaŭ

li spiris vere.
‘De rajdĉeval’ bonrasa
aŭ de mulo prefere
kaj mortsufero

ol de la
stulta azeno!”
Post rakontad’ de l’ fablo,
lin depuŝis sen peno,
sen ajna beno,

de alta
montpinta roko
en profundon de valo.
Ezop’ kun siaj moko,
kaj fablostoko

falmortis.
Sed plagis pesto
post nelonge la urbon
Delfoj per mortinfesto
je vivekzisto.

Kaj ĝi nur
ĉesis subite,
kiam l’ urbo, kun pento,
starigis laŭmerite
templon rapide

kaj altan
memorkolonon
sur lia ekzekutej’,
jen por peti pardonon
kaj pacan donon

de l’ dio
tree kolera.
Ezopo tiel venkis
post la morto mizera.
Sed la fera

spirito
kaj la fam-gloro
de Ezopo brilas lume

**ĉiam en la memoro
de ni popolo.**

Adaptita el *Ezopa Saĝo* de K.Kalocsay

Zhuang Qixiong

Bona Tago

1

**En pritemp',
ter', en bela vest'.
Daŭrfolioj sur montoj,
lagakv' ondas sen
tempest'.
Jen tre bona fest'!**

2

**En printemp',
aromas ĝarden'.
Pir',persik',prun',abrokot'
disfloras kiel festen'.
Kun bona maten'!**

3

**En printemp',
ĉio,kun prosper'.
Tag' belas,herb' verdas,
hirund' flirtas en liber'.
Por bona esper'!**

Yijianmei (Branĉo da Umefloro)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de 7,44,744 silaboj, laŭ rimarango a,xa,xxa (x = senrima)

Eto

Patrino Rivero

**ĉe la Flava Rivero
l' avo vivis
en sufero
mankis al li ĉiaĵoj
akompanis
lin mizero
ĉe la Flava Rivero
nun mi vivas
en libero
la land' antaŭen marŝas
al riĉeco
al prospero**

Komencantino

Aglo kaj Alaŭdo

1.

**Aglo kaptis per impet'
Jen alaŭdon.
Je indulgpet'
la rabobirdo diris:
"Stulta birdo,
vi kantistet',**

**vin tenu tuj en kviet'.
Mi pli forta
sen intrepert'
ja estas ol vi. Kia
ajn belvortojn
en via pret'**

2.

**vi uzas, vi jam en man'
mia estas.**

**Sen ajn plan'
fuĝi, obeu al mi,
mi kun tiran',**

**portos kien ajn, sen van',
vin delasos
je ĵet-elan',
dismordos vin laŭplaĉe!
Jen rigardu!"
La huligan'**

3.

**birda sinpafis fiere
kun viktimo
enaere,
sed la rabobirdo jam
nun neniel
ja severe**

**elpensis, malespere,
kial l' etaj'
pezas vere,
ĝia flugilfrapado
jam nun lantis
efemere.**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Lily

Vir' Senpova

**kunvivanta ge-paro
en pasia
amorludo
nenia sent' ekscita
ne malmolec'
nur ĝu-baro**

**ho ve, kia najbaro
sen spirito**

**nek preparo
vi povra vir' senpova
malplena je
am-nektaro**

Yiqin'e (Memoro pri Palaca Knabino)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po kvin versoj de 3,7,3*,44 / 7,7,3*,44 silaboj laŭ rimarango de aaAxa /aaAxa (x = senrima).

Guozhu

Pino en Neĝo

**Neĝ' sen fin'
subpremas al verda pin'.
Verda pin'
staras rekte,
ne fleksis sin.**

**Kio plej imponas nin,
estas via pura sin',
pura sin'
kun spitema
nobla inklin'.**

Lily

Memĝuado

**en solo
okazas mem-konsolo
konsolo
fingro en tru'
jen bor-folo**

**karesado sur molo
pensado pri seksvolo
seksvolo
ĝis kulmino
de ĝu-bolo**

Yishaonian (Rememoro pri Junaĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvin versoj de 444,55/7,34,55 silaboj laŭ rimaranĝo de xxa,xa / a,xa,xa (x = senrima).

Eto

Ĉe l' Tombo de Amiko Verda

kun bukedo
da purblanka
krizantemflor'
mi riverencas
por lia memor'

neniam utilas plor'
sed strebo
al plia glor'
de verda afer'
kun plia fervor'

K. Kalocsay

Heliketo

Heliketo !
Venu, venu
el la domo !
Vin vokas eta
amika homo.

Mi venis kun bombono,
vinbero
kun aromo,
bongusta piro
kaj ruga pomo.

Adaptita de Guozhu laŭ *Streĉita Kordo* p.86.K. Kalocsay (1891-1976)

Zhuang Qixiong

Vin Salutu

Ĉiutage
ni vivas en

**simpla domo,
sed amon havos
honesto homo.**

**Salutu Vin en nomo
de Mi!Kun
roz-aromo,
al frukt-dona kaj
verda fantomo!**

Konfeso

**Mi al edzin'
ŝik-veston por
amo driva.
Ŝi ĝojis kiel
knabin' naiva.**

**Ĉu ja feliĉ' fiktiva
aŭ impuls'
primitiva?
Mi ĉiam pentu
pro liber' viva!**

Yiwangsun (Rememoro pri Princido)

ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 7,7,7,3,7 silaboj kun kontinua rimo

Miĉino

Umefloro

**La ruĝa umefloro
spite al frostrigoro
floris en la vintrhorro.
Ho gloro!
Premios ĝin adoro!**

Yongyuyue (Ĉiama Ĝojo de Rekontiĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 12 versoj de 444,445,446,346 / 446,445,446,344 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa,xxa,xxa,xxa (x=senrima)

Eto

Promenanta Geedziĝo

**Lugu-lago
por Mosuoj*
la edeno
ili sekvas
la kutimon —
gea promeno
sen promeso
sen bankedo
sen svatista ĝeno
se naskas
ama sento
geiĝu sen peno**

**ĉe vespero
junulino
pretas por bonveno
al amato
pordfrapado
kun ĝojmieno
li eniras
por solnokta
geiĝa festeno
matene
adiaŭad'
sen ĉagreno**

*Mosuoj, unu el ĉinaj naciminoritatoj, kiuj sekvas tradician kutimon de promenanta geedziĝo. Se junulino naskas amon al junulo, ŝi konsentas al la junulo veni en ŝian domon por ununokta kunvivado. Sekvan matenon, la junulo foriras kaj loĝas en sia propra domo. Okazas, ke la junulo ne revenos la duan fojon.

Momento Perversa

geamikoj
kundecidas
en harmoni'
pri okaza
eksperiment'
en amor-devi'
sur streta lit'
volupteme
per kuŝa pozici'
facila
brula paro
en geiĝ-idili'

varma lipmord'
arda kunglu'
por seksa melodi'
dura stango
akra piŝto
kiel rekta abi'
softa kavo
cedema fend'
kiel sorba gobi'
forta bor'
ĝema kriĉad'
ĝis ĝu-magi'

Ĝojo en Doloro

mi atendas
enlite por
nov-akuŝo
mia bebo
naskiĝos el
krevanta guŝo
kuracisto
ordonas min
al surdorsa kuŝo
malsupre
li laboras

per tiro kaj puŝo

pika dolor'
sentiĝas en
mia suba buŝo
fulmotondre!
mi ja dronas
en plora duŝo
jen aŭdiĝis
beba ploro
kun konsola tuŝo
dankegon
al lia pen'
sen ajn fuŝo

Neforgesebla Kiso

ardas korpoj
flamas lipoj
tenas li min
firme en brak'
mi komforte
jen en lia sin'
kuŝas supla
kun deziro
al la aga sangvin'
finfine
lipoj tuŝas
je lia korpa klin'

nun mi sentas
softan langon
en buŝo kun obstin'
kirlas ŝmace
kaj mordetas
mi jam en fascin'
dronas rave
la salivo
miksas per aminklin'
ekscita
sent' jam kuras
tra mia spin'

Yugezi (Fiŝista Kanto)

ĉina fikforma poemo el 5 versoj de 7,7,33,7, silaboj, laŭ rimarangŝo a,a,xa,a (x=senrima)

Eto

Hejmveo

vaganta vagabondo
sopiras al lun-rondo
hejmlokaj
renkonto
kaj letera respondo

Komencantino

La Spuroj

Maljunis la leono,
mallertis lia kuro
bestoj per
forkuro
eskapis por sekuro.

Turmentis lin malsato
sen ajna pred' en kavo,
li fine
por savo
de la malsata glavo,

elpensis ion mavan.
Ŝajnis sin malsana
li ĝemis
larm-bana
per ludo ĉarlantana.

Bestoj lin ekkompatis
kaj venadis por doni
helpadon
esplori
staton por lin favori.

Nature ili fariĝis

predoj de la leono
je lia
bezono
— donacoj de vivdono.

En la grot' atendis li
sur reĝtrono komforta
por ĉasaĵ'
mav-sorta
per rimedo saĝ-forta.

Nu, ruza vulp' vizitis,
saluton sendis al li
de fore
kun fals-pi',
“Kiel nune fartas vi?”

La leono respondis
“Bonvenon! Vi plej kara!
Min en stat'
amara
vi kun talento rara

konsolis. Multajn dankojn!
Sed venu proksimen pli,
kaj diru
do al mi
belajn vortojn tie ĉi.”

“Ho, reĝ', ripozu bone!
Resaniĝu rapide!”
diris vulp'
mokride.
“Mi preferas decide

foriri. Jen pardonu!
Ĉar eniraj spuroj nur
videblas
sed ne sur
la tero elira spur'!”

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Sam

Brila Oldulo

**kvankam mankis energi'
en oldaĝa pozici'
neniom
ĝismorte
velkas lia ambici'**

Yanke

Remado sur Lago

**glitas boat' libele
penas remant' abele
se remas
sencele
ni, kial tiel pele**

Yujia'ao (Fiŝista Fiero)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 7,7,7,3,7 silaboj, kun kontinua rimo

Niuniu

Hokfiŝisto Fiera

**hokfiŝisto fiero
kun intenco konkera
en ferio libera
somera
al fiŝejo rivera**

**kun hokstango infera
por fiŝaro prospera
sed en tempo vespera
mistera
restas rezult' papera**

Yujiexing (Promeno sur Palaca Strato)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po ok versoj de 7,33,76,445 silaboj, laŭ rimarango
a,xa,xa,xxa (x=senrima)

Miĉino

Nokta Vojaĝo en Perla Rivero

En la Perla Rivero.

Agrabla

vetero.

Vojaĝas ni ekskurse

en ĉarma vespero.

Ambaŭborde

sorĉe brilas

lampofedero.

Saturas en aero

sentebla

prospero.

Progresas tag' post tagoj

la sankta afero.

Diligente

ni fosu kun

verda espero.

Yulingling (Tintado en Pluvo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj respektive de 4,44,644,65,347 / 7,35,634,426,345 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa,xa,xxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x = senrima)

Eto

Dek Sunoj

(ĉina mito)

**en ĉielo
blua pendis
sen ŝancelo
dek ardegaj sunoj
fajre brulaj
de kruelo
proe akvo sekis
kamp' de avelo
sterilis
brutoj mortis
pro soifa anhelio**

**arkpafist' de fidelo
kuraĝe
por bruleg-pelo
pafadis naŭ sagojn
naŭ montroj
de la celo
bum! bum! falis
sola
suno en modero
radiis
mond' revivis
kun suna helo**

Guozhu

Tindado en Pluvo

**Ĉirpa plendo.
Eksterurba
okcidento.
Post drasta ekpluvo,**

malheliĝas
firmamento.
Vualas krepuska
nebul-etendo.
La ŝipo
ekveturos.
Bedaŭra karul-sendo.

Ĉiam, de prajarcento,
doloras
disiĝ-turmento.
Kion pliigas la
aŭtuna
trist-momento!
Mi vekigōs
kie?
En matena vento,
ĉe bordo
salika, sub
sinka krescento.

Komencantino

La Flatema Maro

1.

Antaŭ l' maro
la paŝtisto
pri akv-klaro,
ondo milda, glata
mire laŭdis.
Sen avaro
li elŝutis laŭdojn
pri l' senkomparo
de belo
de marmondo.
Eĉ laŭte per deklaro

li kriis kun brakparo
levita:
"Kia eraro
se mi ne veturas
surmare!"

**En bazaro
li forvendis
ŝafojn
por mona preparo
de ŝipo
kaj surmara
manĝota varo.**

2.

**Kun serena
kor' li velis
sur senĝena
mar' facile glite.
Jen subite
la ebena
mar' ribelis muĝe
jen per malbena
sovaĝa
ondegaro.
Rompiĝis ŝipo plena**

**je manĝvar' sub ondĉena
atako.**

**Kun forto pena
li sin savis riske.**

Poste

abomena

sento lia

fluis

je laŭdad' pri mildaj

marondoj:

“Ĝi eĉ flatas,

per fort' vivprena!”

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Lily

Konfeso de Virino

**mi virino
soifas al
vira sino
ne nur por amoro**

sed por kares'
por domino
de vira perforto
kaj korinklino
sincere
por fidelo
lia ĝis viva fino

ofte al disciplino
viroj ne
per kapa klino
obeas volonte
sed male
kun obstino
sin turnas al
varme
alia vagino
ba! iru
voluptuloj
al seks-ruino

Nuda Naĝado

I.

En lageto
por nuda naĝ'
laŭ la peto
de mia amiko
mi senvestis
min je preto
ŝoviĝi en akvon.
Post vest-demeto
mi saltis
ne naĝejon
per kapmalsupra ĵeto.

Mi naĝis kvaz' naveto
facile
en rond' ripeto.
Mi sentis komforton
kun mamoj
en skueto
flosetantaj

leve
softe en kvieto
kaj je pub'
tikletadon
sub akv-impeto.

II.

Nuda viro
alnaĝis min
kun aspiro
li brakumis min de
poste firme.
Kun deliro
li anhelis peze
por seks-akiro.
Korpglue
kun rigida
kaco per ir-reiro

li frotis kvaz' vampiro
sangvora.
Je granda miro
mi baraktis plenforte.
Feliĉe
per manŝiro
mi turniĝis
el li
ne kiel martiro.
Libere
mi fornaĝis
kun vesuspiro.

Yumeiren (Belulino Yu)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de 7,5;7,9; silaboj kun para rimo.

Even (1963—)

Disiĝo

**Kiomfoje venis mi
nur sonĝe al vi.
Vere ĵus ĉe vi, tuj dis—
Trajn' forportis min en frosta biz'.**

**Kien ajn mi foriros,
vin mi sopiros.
Lun' kun forta am-inklin'
en vojaĝ' la tuta lumas min.**

Kiomfoje

**Verdlage ni reestas,
lun-ĉarmo restas.
Sub lun' ni mute remas,
kaj kore-al-kore komprenas.**

**Ĉiam vizaĝo via,
en sonĝo ĉia.
Temp' pliigas sopiron,
mi soifas vian amtiron.**

Ĉu Vere Senrevide ?

**Ŝtona temp' disigas nin.
Vi forgesos min ?
Triste ni ambaŭ mutas,
kaj nur senĉese larmo gutas...**

**Al vi donis l' am-tuton,
sed ne sentludon.
Ĉio glitos fulme for,
eĉ la kortuŝa pase-memor'.**

Guozhu (1938—)

Al Shi Chengtai

— al Shi Chengtai, kiu esperantigis poemojn de Li He kaj Li Qingzhao tiam

**Babilis ni letere
vere libere.
Niaj ŝatataj temoj
estas poetoj kaj poemoj;**

**Pri Li He sur azeno,
pri Sudĝardeno;
Pri Li Qingzhao talenta,
la poetino eminenta...**

Ĉentono

— ties fonto el Esperanto Antologio, p. 257 k. 259

**Sur trista voj' pilgrima
kaj fund' anima,
mi vagas kun revemo
kaj min ektordas sufokpremo.**

**En posttagmez' fruhora
vi staris sola.
Langvore revas floroj
pri adiaŭ, disigaj horoj.**

Kalman Kalocsay (1891- 1976)

La Amo

**La am' ne estas ludo,
sed sorta trud.
Ĝi ŝvingas sian vipon
forte al lip' pelante lipon.**

**Ni timas ĝian baton,
kaj senkompaton.
Sub ĝia jug' ni svenas,
sed tamen ĝin ni kore benas.**

Komencantino

Morna Okulpar'

**via morna okulpar'
plena je amar'
disŝiras mian koron
ĵetas min en fortan doloron**

**ve, ĉu mi vin ĉagrenas
aŭ vi mem splenas
mi ja preferas morton
por krei al vi bonan sorton.**

Inter Du Malbonoj

1.

**buĉist', paŝtist' duope
pasis senstope
parole, ride ĝoje
ekvidis ŝafon vagi voje**

**ili alkuris vete
por kapti prete
kun ŝaf' en mano fine
ili ŝatis ĝin korinkline**

2.

**ili ekis diskuti
kaj eĉ disputi
kiu rajtas posedi
ĝin, sed neniu povis cedi**

**ili peti al besto
sen ajn protesto
por finfine decidi
al kiu ĝi iros por fidi**

3.

ŝafo petis unue
de ili ĉue
pri ilia metio
kaj akiris ĉhon de ĉio

al paŝtist' ĝi suspiris
kaj ĝeme diris
“mi iru kune kun vi
viv' ol lan' pli valoras ĉe mi!”

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Lily

Svinganta Pugo

koketa pug' en skuo
incita ĝuo
al penso voluptveka
kun vira sekshormono eka

ve, kompatinda homo
ĉu seksa pomo
vin tiras al inklino
aŭ ronda karno al vagino

Lu Jixin (1953—)

Nokta Kanto

Mi, kviete pura font'.
Vi, torent' el mond'.
Kuras vi al mia kor',
viv' trankvila iĝas do en bol'.

Mi, nigrega mut-ĉiel'.
Vi, sentplena stel'.
Vi per bril' karesas min,
ŝvebas revo do el mia sin'.

Ĉe Renkonto

Ĉe renkonto vi ĉarmas,

sed ĝoje larmas.
La guto estas roso
defala de la am-mimozo.

Ĉe renkonto mi mutas,
rigardon ŝutas.
L' okulo estas fonto
al via kor' kun arda ondo.

Ĉe Tablo

Ŝvebas kvazaŭ papili'
tablen ruĝ-foli'.
Ĉu send-endas ĉi-aŭtun'
al knabin' ĉe riverego nun?

Plum' verŝonte pri sincer'.
Ridas sur paper':
Jen flirtigas jam zeffir'
la folion kiel ŝia spir'.

Sola Vago

Stratoj dormas jam sub brum'
Fridas stela lum'.
Ĉie svenas taga paŝ,
Tamen tondras nur kulara klaĉ'.

Mornas mi en sola vag':
Kien mia trak'?'
Sub pal-lampoj de fatal',
Ombra mi jen longas kaj jen mal.

Ĉe Lago

Iam sub la verd-ombro
Kveris kolombo.
Sed ŝi ,malproksimiĝas.
La saliko akven kliniĝas.

Sonprenilas la branĉo
Per sia tango.
Do aŭdiĝas de l' lago,
Kant' sopira en ĉiu tago.

En la Nuba Tago

**Aŭ sun' dispelite brilu,
Aŭ pluv' subiru!
Tamen en la nuba tag'
Grize splenas la anima lag'.**

**Kiel grifelo, dolor'
Gravuras sur kor'.
Kiu atendas finon,
La ridan aŭ larman destinon.**

Ĉiam Verda

— **omaĝe al la 2a Ĉina Esp-Kongreso**
(1991.12.29.—1992.01.01, Tangshan)

**Pino, pino,
kun fera obstino.
Jen ter', kvazaŭ krepo,
semas vi sur stepo.
Poste, poste,
sindonas senkoste.**

**Vivu, vivu,
antaŭen ne drivu.
Espero racia,
la pasio mia.
Ami, ami,
jen, elkore flami.**

1919.12. Huhehot

Sentitole

(1)

**Mi estas nigra ŝtono,
Vi blank-burĝono.
Per ondoj mar' min ŝarĝas.
La spleno pli ol maro larĝas.**

(2)

Ĉu via plumo mola
Tuŝas min bola?
Sub dolĉe ruĝa lipo
Ekveturas l' anima ŝipo.

Kaj sub via flugiloj
Vibras la spiro.
Vi tra nebulo flugas.
Libere, krutajn ondojn plukas.

(3)

Kun pluvo vento pepas.
Sed penso ŝvebas
Jam splite tra la nuboj
Kaj alte super la salupo.

Kiam koro flugilas,
Haven' reiras,
Eĉ lage, logo vela
Jam svenas kiel sfemera.

(4)

Kiam lakteca nebul'
Regas sur insul',
Ĝojo ŝajnas pura font'.
Mia boato estu, kaj vi ond'!

Forveturo... song'... sublim'...
Vijunigas min.
El kuno de kor' kaj kor'
povas flui kristala aŭror'.

Miĉino (1938 -)

Renkonte al Nova Jarmilo

Venas nova jarmilo,
ĝojas jubilo !
en la novjara tago
ekstartu maratona ago —
Ascendu al la reto
traduk-kompleto !

**Ni, post longa laboro,
atingos la celon en gloro !**

Niuniu

Fraŭlino en Soleco

**Fraŭlino, kial sola
paŝas senfola
sur dezerta marplaĝo?
Ĉu vi la ŝtormon de sovaĝo**

**ne timas el la maro?
Ĉu vin koŝmaro
puŝas al faŭko vora
de mar-abismo malfavora?**

**Mi volus vin sentime
kaj sendeprime
alfronti ŝtormon maran
prenante vian manon karan.**

**Mi volus vin kunporti
por gloro morti
flugante kiel mevoj
super maro kun belaj revoj.**

Zhuang Qixiong

Mezaŭtuna Nokto

**Osmantojn rosi fride,
ne nur humide.
Ni festas sub klara lun'
abund-rikolton en Mezaŭtun'.**

**Jen kia hejmsopiro
kun bondeziro!
Kial fein' sur ĉiel'
aspiras vivon kiel miel'?**

Pluvo en vintro

**La vintra pluvo frostas,
ĝi min pik-ostas.
Lampoj flagras rigore
kaj la vojo ĝemas dolore.**

**Kie estas la amo
por brila flamo?
Pluvo flirtu en koron!
Mia bonsonĝo ĝis aŭroron!**

Printempo

1

**Radias la ruĝ-vesper'
en blua ĉiel'.
Nubaro flirtas en roz'
per ĉarma kaj kompatinda poz'.**

**Hirundoj flugas alte,
lace, sen halte.
La papilioj ŝvebas
kaj al pli bona vivo strebas.**

2

**Zefiro sentas plene,
kaj blovas pene
kun senlima ĉagreno
kaj neforgesebla kompreno.**

**Akvo en river' ondas,
al vent' respondas.
La ondoj plaŭdas vole
kaj mizeron rakontas sole.**

3

**Vent' branĉojn milde lulas,
kaj pluv-nebulas.
Lirlas la dolĉa fonto
kiel nektaro sur am-ponto.**

**Akvon tuŝetas libel'.
Lotus' en ĉiel,**

herbetoj jam elĝermis.
Birdetoj flugilon malfermis.

4

Ektondras en printempo.
Jen ora tempo!
Ĝi konsternis ĉielon
kaj surdige skuis la teron.

Fulmadas en pluv-tago.
Nova imago!
Ĝi lumis tristan vojon
kaj vekis feliĉan viv-ĝojon.

5

La ume-arboj hontas,
la floroj fontas.
Per ilia bonodor’;
Al mistera kaj sopira glor’!

La knabinoj ridetas
kaj florojn petas.
Kun ama printempo;
Al brila kaj jubila tempo!

Soleco

La plena luno brilas,
kaj griloj tritas.
Mi meditas kun ĉagren’,
kaj sidas solece en ĝarden’.

Jen plej granda lecion’—
Temp’ ja estas mon’.
Sed pri la hejmloka glor’
ĉiam restos en mia vagkor’!

Spegulo

Iluzia esprimo--
falsa animo?
Disigis rara spegul’
pecetojn kiel hela okul’.

Ne furiozigu por
fantoma ador'!
Pro kiom da friponoj,
nur scios tiom da demonoj?

Suno en Vintro

Mi amas sunon varman
en vintro.Svarman
popolon ĝi komfortas
kaj ankaŭ mian koron fortas.

Ardas mia hom-amo
sub suna flamo.
Ni ĝuu,kun plezuro,
kaj vivu en bela naturo!

Gratulon al 77-a Naskiĝtago de Mag. Edwin de Kock

Vi, kun "Bona Espero",
kriis en tero
per "Ĉinesko" unue,
fervore, korŝire kaj skue.

Feliĉan Naskiĝtagon!
Flirtigu flagon
de Esperanto en kor'
de plej elstara poet' kun glor'!

Mia Tomboskribo

Ĉi kuŝas batalanto
per Esperanto:
Li strebis al monda pac',
klopodis por harmonia spac'!

Li kantis aman drivon
kaj brilan vivon.
Li ja gajnis estimon,
lumigis poeman animon!

Zhegutian (Perdrika Ĉielo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 versoj kaj 5 versoj respektive de 7,7,77 / 33,7,77 silaboj,
laŭ rimarangô a,a,xa / xa,a,xa (x=senrima).

Komencantino

La Potenca Najbaro

en tre proksima sfero
fragila pot' el tero
kaj kupra kaldronego
jen drivis en rivero

la pot' kun
kolero
“alnaĝu, vi infero,
ne tuj ĉe mi, eble vi
frakasos min ĝis ero

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

La Oreloj de la Leporo

1.

Leonon vundis kornulo.
Li ordonis kun brulo:
“Ĉiuj bestoj kun kornoj
devige laŭ postulo

ekzilu!”

Regulo
pelas al fuĝa kuro
kornulojn kia cervo,
kapro en tima lulo.

2.

Ankaŭ migras leporo.
sciuro kun scivolo:
“Kial vi ekzilas do?”
“Pro kornoj ĉe la kolo.”

“Ho, ĉiel’!

Parolo

via 'tas sen valoro.
Orelojn vi havas, sed
ne kornojn de malmolo!"

3.

"Ĉu tiu pruva diro
plenumus laŭ deziro?"
respondas la leporo
mizere kun suspiro,

"Ne estas
utilo,
se nomas kun deliro
oni orelojn kornojn.
Mi maldormas sen spiro."

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

La Plej Granda Kulpulo

1.

Foje amasa morto
la bestojn jen per forto
falĉadis kiel plago.
Ne venis ajn raporto

al besta
kohorto
pri kaŭz' de fata sorto.
Ili dubis, ĉu iu
per ĝena malkomforto

2.

muĝon levis de dio.
Leono kun konscio
akra, kunvokis bestojn
por viva garantio.

Ĝi diris:

"Malpio
naskigas sen racio
la plagon, morto buĉas
bestaron kun apatio.

3.

**Mi certas, ke la plago
pro ies krima ago
fatale falas sur nin.
Ni serĉu por repago**

**al dia
atako
krimulon por dishako,
nin tiel di' indulgos.
Ni tial en ĉi-tago**

4.

**kunvenas, ke explore
ĉiu menson enbore
kontrolo kaj konfesu
sian kulpon elkore.**

**Ni bestoj
favore
nin bonigas ignore
al eraremo nia.
Jen mi komencas sole**

5.

**miajn kulpojn unue:
kelkfoje mi detruie
ŝafojn kaj eĉ paŝtiston
manĝis, kaj poste brue**

**mi muĝas
enue
kvankam regas plue
mi, eĉ se juste. Nun mi
vere senambigue**

6.

**konfesu ja senŝpare,
kion ankoraŭ klare
memoras mi enkore.
Muso venis erare**

kaj time

**hirt-hare
en kapton mian stare,
ĉar tiam mi plensatis,
mi lasis ĝin bonfare**

7.

**forkuri. Pro la pravo,
muso kuris al savo
de mi kaptita en ret'.
Ĝi tramaĉis kun bravo**

**jen kiel
tranĉglavo
la maŝojn ĉe kapt-kavo,
liberigis min el la
danĝero. Kia ravo!**

8.

**Volonte mi ofere
dediĉos al vi vere,
do decidu. Aŭ eble
ni laŭvice prefere**

**kontrolo
senpere
ĉies kulpojn severe,
kaj l' plej granda kulpinto
mortaĉu jen mizere!"**

9.

**Ekdiris vulpo flate:
"Ho, kiel diris frate
vi, nia reĝ"! Vi juste
regnas bone. Rilate**

**al ŝafoj,
plensate
blekadas orel-grate
ili, kaj ja meritas
devoron senkompate.**

10.

**Kaj la paŝtisto! Ho, ve!
tirane bestojn prove**

li regas. Ja neniu
protestas malĝoj-brove

pri l' morto.
Denove
la muset'! Kuraĝ-kove
kaj saĝe! Ĝi vin savis
el danĝero tutpove!"

11.

Tuj aplaŭdis sonore
la flatistoj fervore.
La reĝon oni laŭdis
pri nobleco elkore,

admiris
favore
pri elokvent' adore
de vulpo. La ruzulo
malaperis manovre

12.

tiel el la atento,
kaj en tiu momento,
forĝesis pri malico
liaj kaj peka centoj.

Pro ĝia
talento,
la vulpo kun prudento
sin kaŝis en la vicon
lastan sen ajn lamento.

13.

Nun l' urs' kun voĉo ĝema
diris: "Riproĉo mema
min ofte mordas vere.
Mi kun sento pacema

kaj ĝojo
senĝena
pasigis en ekstrema
harmonio kun homo
tag-tagojn je sentrema

14.

kunvivo. Foje iam
homo mia dormis jam
kaj sidis mi apude.
Mi vidis muŝ' de fifam'

altrude
per lud-dram'
fali sur lin kun kroĉ-am'.
Por gardi lian dormon,
kun kolera arda flam',

15.

mi ĝin per peco roka
murdis kun movo ŝoka,
sed ankaŭ kap' amika
frakasiĝis ĉe bloka

frapego.
Provoko
mia per prem' sufoka
amikon perdigis, min
igas ridaĵo moka.”

16.

La povra urso ploris,
ploris. Ĉiuj doloris
enkore, kaj aliajn
kulpojn ne plu esploris.

La urso
de foris
de atent' kaj traboris
tre glate tra kontrolo
kaj oni ĝin ignoris.

17.

La tigro sekvis, lekis
de l' lipojn sangon, ekis
kulp-konfeson (ĵus mangiŝis
ĝi beston) kaj eklekis:

“Akuzi?

Mi pekis?"
L' okuloj fosforeskis
verde kaj brilis dentoj
blankaj, kio ja vekis

18.

ĉies timon terure.
Jen muto regis pure.
Neniu respondis kaj
sin sentis malplezure.

Tuj poste
nature
aliaj bestoj ĵure
prezentis sin puraj kaj
senkulpaj senmezure.

19.

Bestoj kiaj pantero,
hieno kaj cetero
sin savis, pruviĝinte
kun verŝajna sincero

senkulpaj.
Danĝero
al l' azen' en mizero
alvenis, kiu jene
sin kontroli per vero:

20.

"Mi kulpis foje, pente
bedaŭras dolorsente
pri l' okazaĵo. Iam
preter Delfoj silente

mi pasis,
turmente
malsatis mi lamente.
La freŝa herbo tie
allogis min tre tente.

21.

Kaj kelkajn herbojn ĝue
mi manĝis jen senbrue.

**Por tio mi ne rajtas,
sed mi kulpis senskue.”**

**La lupo
pli frue
leviĝis, diris flue
kun indigna kriado:
“Ho, ĉu necesas plue**

22.

**klarigi per detalo?
Ĉu ekzistas brutalo
pli punenda ol tio?
Mangêgi per regalo**

**herbojn de
sekalo
fremdan por festivalo,
eĉ en Delfoj. Plejeble
herboj en aktuala**

23.

**alvenas sendikute
al sanktaj pastroj tute!
Jen, ĝuste pro tiaĵo,
la dio sendis mute**

**inter nin
alŝute
la plagon absolute.
Pro l' krimo, ĝin mortigu!”
Ĝi pendis sendispute.**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Zhuyingtaijin (Kanto pri Zhu Yingtai)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 9 versoj de 335,45,6434 / 3,65,45,6434 silaboj respektive,
laŭ rimarangô xxa,xa,xxxxa / a,xa,xa,xxxxa (x= senrima)

Lily

Soifo

**soifa
avida
kiel seka ter'
por eĉ gutoj
akvaj el river'
sola buduare
mi lin tikle
sopiras
kun kor-sincer'**

**sufero
ne konas tabuon
pri geiĝ-ofer'
ard-pasion
la sensuka ber'
volas kontentigi
eldomiĝu
por diboĉ'
en plen-liber'**

Frigida Virino

**mizere
amare
restas mucida
mia ĉiĉo
pro seks-frigida
inerto en lito
kontraŭ kaco
servpreta
kaj rigida**

**rapida
piŝtado fervora**

**rave senbrida
mia ĉiel'
mi nehumida
kvazaŭ perfida
kara vulvo mia
post vulkana
erupt' mi
sentas frida**

Knabino en Bikino

**sur plaĝo
marborda
kuŝas knabino
en korpplua
nigra bikino
voluptaj rigardoj
alpafas sur
la korpon
de la ino**

**fraŭlino
seksalloga ilin
kun dura pino
tre incitas
per bor-inklino
nereteneble plu
viro juna
sturm-kuras
al vagino**

Nokta Fraŭlino

**en nokta
mallumo
trotas libere
vi senĝene
kore espere
al klient' avida
je karna ĝu'
kaj ludo
gea vere**

**mizere
vi la monon lukras
ja malfiere
per via korp'
seksloga cele
de viro al viro
vi petegas
geiĝon
samprefere**

Xi Murong

Ekkompren'en Pluvo

**se pluvon
re pluvo
sekvas en seri'
se ĉagreno
ripetas jen pli
sen ĉes' sen lim' sen fin'
mi volonte
aplombe
kun ekkonsci'**

**kaj raci'
frontas foj-refoje
sen ajn emoci'
al disiĝoj
de sent-apati'
daŭre vin serĉadas
kun rideto
neeble
aperi mi**

tradukis Sam

Zhuzhici (Bambuoj)

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de sep silaboj laŭ rimarangŝo a,a,xa (x=senrima)

Komencantino

Ranoj Volas Reĝon

**sur marĉo la rana gent'
vivas kun feliĉa sent'
tamen pro manko de l' reĝ'
malĝojiĝis sen kontent'**

**Jupitron ili tede
petis ricevi krede
reĝon moral-firmigan
regi por ili plede**

**Jupitro ride ĵetis
ŝtipon kaj jen dekretis
ke ĝi estu kvaka reĝ'
ĝi enakven impetis**

**fale de la ĉielo
ĝi plaŭdis kun ŝancelo
hu! fuĝis time ranoj
sub la marĉa mantelo**

**unu el ranoj fine
trovis senhalucine
la ŝtipan reĝon vere
informis ilumine**

**ili vetnaĝis ale
surrampis ĝin totale
saltis, stampis insulte
kun malŝato vandale**

**Jupitron petis ree
por reĝo nova vee
anstataŭ la sentaŭga
senpova senidee**

**nu, venis reĝo nova
jen serpento naĝmova**

**kaj mord-ekstermis ilin
malbonis ĉiopova**

**ranoj, pere de Merkur',
petis pro granda terur'
Jupitron doni helpon
for de venena vipur'**

**Jupitro sen kompato
kaj acerba malŝato
diris, "Ne plaĉis bona,
plaĉu l' malbona stato!"**

(adaptita el *Ezopa Saĝo* de Kalocsay)

Miĉino

Memore

**Sidante antaŭ floroj,
mi dronas en memoroj.
Kiel tikle dolciĝas
la karaj verdaj horoj!**

Zuihuajian (Ebrío inter Floroj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj respektive de 3,3,5,55 / 5,5,5,5 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,a,xa / a,a,a,a (x= senrima)

Guozhu (1938-) :

Sensacia Venko

**Julio.
Francio.
Futbal-pasio
Ŝot'! Venk' finala.
Ho,sensacio !**

**Sekvas premio
kaj ovacio.
Ĉiuj dronas en
rava ebrío.**

Lily

Ebria en Florsino

**vizito
al lito
por amor-glito
en flora sino
ama milito**

**sen ajn medito
kun brava spito
ebrie ĝue
rava koito**

Mamsuĉado

**incita
ekscita
mamsuĉ' sorĉita
fajrbrul' eksploda**

ĝis tru' alglita

**ĉielĝu' mita
ekstaz' merita
dezir' soifa
al kac' vizita**

Am' al Floro

**sinjoro
kun koro
de ĝu-amoro
volas diboĉi
per kaca boro**

**je enir-horo
molas pro joro
ĉe ŝia truo
li en malgloro**

Zhuang Qixiong

Amĵuro

**Somero.
Vespero.
Ŝi kun letero
sole meditas
pri dolĉa kvero.**

**“Post senespero
sekvas mizero.
ĉu lia ĵuro
nur en papero?”**

Zuihuayin (Ebrio sub Ombro de Floroj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvin versoj de 7,5,545 silaboj, laŭ rimarango de a,a,x,x,a. (x= senrima)

Li Qingzhao (1084-1155)

Sopirado

**Minca nebul' ekstere,
tede ĉambr-sfere.
Je fest' Duobl-Naŭ*
litkovrilo
nokte fridas re.**

**Heĝe drinkad' vespere
en arom' aere
ravigas tree.
Ĉe aŭtunvent' mi
jam magris vere.**

* ĉina tradicia festo je la naŭa de la naŭa monato laŭ ĉina lunkalendaro, en kiu oni spektas krizantemojn aŭ ascendas montojn.

tradukis **Sero**

Shi Chengtai (1939 -)

Konfeso

**En aŭtuno profunda
tristo inunda
turmentis min:
disiĝis mi
for vi, korvunda.**

**Ĉagreno min ĝisfunda
lasas. Bru' grunta
iritas penton:
Mi revenu
al via nest' ambunta !**

1994-12

Mesaĝo de la Novjaro

Minciĝo kalendara—
forpas' de jara
temp' senkompate.
klopodado
repertuara:

Spit' al vidpunkt-vulgara,
aliĝ-korsara,
agad' pagana;
religia
ard' temerara.

Poŝmalpleno amara—
minackoŝmara;
sed, jen objekto
kun l' espero
en verd' duara.

Afero sendolara,
sed celo klara.
Raraj instigoj,
kunlaboro—
ben-avatara !

Zhuang Qixiong

Sorto

Pro mizero profunda
knabin' kor-vunda
ne povas lerni,
nur laboras
en vivo hunda.

Prez-altiĝo senfunda
el eduk' bunta
lacegigis ŝin.
Kiam ĉesos
la ŝim-sort' grunta?

Kombinitaj Ĉenoj de Ĉineskoj

Lily verkis 胡国柱 汉译

Adamo kaj Eva

I.

—laŭ ĉinesko Busuanzi

**en Edeno Di’
volas el kot-ter’
krei viron en eter’
por viva prosper’**

**komence vigla
vir’ en ĝoj-liber’
sen zorgemo, sen sufer’
nenia mizer’**

来到伊甸园
耶和华上帝
想用泥土造男人
太空添生气

就在人之初
男人多安逸
无牵无挂无烦忧
潇洒真惬意

* Busuanzi (Aŭguristo) : ĉina fikforma poemo el du strofoj el versoj de 55,75 silaboj kun duona rimo

II.

—laŭ ĉinesko Dielianhua

**en enorma Edeno
sola homo
dronas en ĝeno
kun malĝoja mieno
kaj kreskada ĉagreno**

**Dio en plen-kompreno
dormigis lin
sen granda peno
per vira rip', kotpreno
faris inon en pleno**

庞大伊甸园宽广
孑然一身
亚当陷愁网
面容憔悴精神恍
百端烦恼竞增长

上帝完全能体谅
不多费力
让他沉睡壤
男人肋骨卸一项
做成女人娇模样

* Dielianhua (Papilio super Floroj) : ĉina fiksforna poemo el du strofoj el versoj de 7,45,7,7 silaboj laŭ rimaranĝo de a,x,a,a,a (x = senrima).

III.

—laŭ ĉinesko Litingyan

**ili ludis en vent'
nudaj sen honta sent'
kunvivis malperverse
ĝis venis la serpent'
vere insida
el malica best-gent.**

**ĝi ŝin delogis for
al pekbara moment'
“manĝu saĝ-pomon ĝue,
Kreskas via prudent'!”
fideme jam ŝi
manĝis sen ajna pent'**

欢乐男女游伴
裸体毫无愧念
共同相处无邪思

直到毒蛇出现
阴险生物中
确实来者不善

蛇向夏娃开言
诱她把罪来犯
尝尝这个智慧果
它能让你开眼
夏娃轻信了
于是上当受骗

* Litingyan (Hirundo ĉe Kiosko): ĉina fiksforna poemo el du strofoj el versoj de 66,76,56 silaboj laŭ rimarangō de xa,xa,xa (x = senrima).

IV.

—laŭ ĉinesko Haoshijin

**viron ŝi petis
al pom-manĝa ĝuo
akceptis la vir' sub
ŝia influo**

**poste ti' ili scias
pri mala duo
korpnuda hontemo
seksa detruo**

夏娃求亚当
也把果子分享
亚当也就吃了
受夏娃影响

二人吃了智慧果
顿悟不一样
愧于赤身裸体
性亦无阻挡

* Haoshijin (Proksimiĝas Bona Afero): ĉina fiksforna poemo el du strofoj el du versoj de 56,65 / 75,65 silaboj kun duona rimarangō xa,xa / xa,xa

V.

—laŭ ĉinesko Fengrusong

**tagoj forpasis en ĉen'
ili en Eden'**

**kovris sin per figfoli’
protekte
por la ingven’
parto okulpika
malaperis el scen’**

**iutage en promen’
sen memvola pen’
korpo ektuŝis korpon
ekestis mirinda sent’
vira bird’ ekduris
ŝin kaptas glita ĝen’**

二人就在伊甸园
一天又一天
一片无花果树叶
被用来
私处遮严
那个丢脸部位
不再呈现眼前

某天散步去游玩
完全无意间
身体接触到身体
突发快感妙如仙
男人小头发硬
滑进夏娃里边

* Fengrusong (Vento inter Pinoj): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj el sep kaj ses versoj respektive de 7,5,734,66 / 7,5,77,66 silaboj laŭ rimarango de a,a,xxa,xa,/a,a,xa,xa (x = senrima).

VI.

—laŭ ĉinesko Dianjiangchun

**ili vole
algluis pro korpeto
kun brakĵeto
por lipmordeto**

**arde flama
sprona impeto
frotado
en ripeto
por karna preto**

情投意合
身体私处相贴紧
双臂伸近
朱唇轻轻吻

炽热激情
冲动实难忍
来回进
摩擦阵阵
肉体入仙境

* Dianjiangchun (Ruĝigitaj Lipoj): ĉina fiksforna poemo el du strofoj el kvar kaj kvin versoj respektive de 47,4,5 / 45,34,5 silaboj laŭ rimaranĝo de xa,a,a,/xa,xa,a (x = senrima).

VII.

—laŭ ĉinesko Shiliuziling

brul'
ardas amflam' en okul'
impulse
sens' en akumul'

bor'
stang' en tru' en ŝov-esplor'
freneze
por vera amor'

ĝu'
ekstaza tremo en sku'
plezure
rompiĝis tabu'

看
爱情火焰眼中燃
冲动也
快感积如山

钻
玉杵进穴把洞勘
疯狂也
云雨到巫山

欢
颤抖如电身贯穿
极乐也
禁忌全破完

* Shiliuziling (Dekses-Silabo): ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1,7,35 silaboj laŭ rimaranĝo a,a,xa (x = senrima).

VIII.

—laŭ ĉinesko Yexingchuan

ilin ravas amvojaĝ'
korplue
kun plen-kuraĝ'
sen hontemo
sen timemo
tute en fik-miraĝ'

eskapis el Dia saĝ'
nenio
en Eden-kaĝ'
je la ordon'
de Di' ili
iris al hom-sovaĝ'

爱河之旅真陶醉
体相粘
完全无畏
也无羞涩
也无恐惧
享交项鸳鸯会

逃出了上帝智慧
伊甸园
牢笼空位
按照上帝
严酷旨意
去向野蛮人界

* Yexingchuan (Nokta Ŝipvojaĝo): ĉina fiksforma poemo el du strofoj po ses versoj de 7,34,446 silaboj laŭ rimaranĝo de a,xa,xxa (x = senrima).

Bov-paŝtisto kaj Feino

(ĉina mito)

I.

—laŭ ĉinesko Qingyu'an*

antaŭ longe ĉe river'
vivadis
en liber'
junul' en granda mizer'
olda bovo
restis lia
amik' kun sincer'

iutage en vesper'
admonis
kun esper'
bov' al li pri amafer'
kun feino
el ĉielo
por nupta konker'

*ĉina fiksforma poemo el du strofoj po sep versoj de 7,33,7,445 silaboj, laŭ rimarangô a,xa,a,xxa (x=senrima)

II

—laŭ ĉinesko Renyueyuan*

feinoj el ĉielo
falas por bano
ĉe rivero
korpe nudaj
sen ekrano

ĝoje ludis
sin amuzis
kun jun-sano
sin forgesis
la feina
karavano

*ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun kvin kaj ses versoj respektive de 75,444 / 444,444 silaboj, laŭ rimarangô xa,xxa / xxa,xxa (x=senrima)

III

—laŭ ĉinesko Litingyan*

la junul' ne tardis
kaj ŝtele rigardis
tra herbtufoj ĉeborde
lia sango ardis
feajn vestaĵojn
ja neniu gardis

la ŝanco hazardis
li tuj sin hardis
rapide ilin kaŝis
kaj zorgeme vartis
post ban' feinoj
maltrankvili startis

*ĉina fiksforma poemo el du strofoj po ses versoj de 6,6,76,56 silaboj, laŭ rimarangô a,a,xa,xa (x=senrima)

IV

—laŭ ĉinesko Yujixing*

senvesta unu nure
senpove
korppure
ĉeborde staris ŝtone
aliaj veture
flugis supren
alĉielen
koler-purpure

li alpaŝis plezure
firmvorte
kaj ĵure
ŝian manon petadis
fojrefore plure
ŝi konsentis
senhezite
pri nupt' murmure

*ĉina fiksforma poemo el du strofoj po ok versoj respektive de 7,33,76,445 silaboj,

laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa (x=senrima)

V

—laŭ ĉinesko Yongyuyue*

la junulo
laborema
kaj bonkora
la feino
teksipova
kaj bonhumora
feliĉe kaj
ĝoje vivis
en amo laŭmora
baldaŭe
ŝi graveda
ĉe akuŝ' dolora

tempo flugis
du idoj
en medi' favora
kreskis sane
kaj senzorge
sen moment' plora
vilaĝanoj
intimiĝis
per laŭdado ĥora
sen pens' pri
tragedi'
la horora

*ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun kvin kaj ses versoj respektive de 75,444 / 444,444 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xxa / xxa,xxa (x=senrima)

VI

—laŭ ĉinesko Yulingling*

kun kolero
Reĝ' Ĉiela
pri l' afero
de junul' kaj fein'
ĝoj-vivantaj
en hom-sfero
li ordonis kapti

**ŝin sen tolero
soldatoj
teren falis
ligis per katenfero**

**ŝin ĝojan en libero
sorfluge
al la ĉielo
la reĝo ŝin punis
en mava
maniero
la junulo
idoj
dronis en mizero
sopire
al kuniĝo
sen ajn danĝero**

*ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj respektive de 4,44,644,65,347 / 7,35,634,426,345, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa,xa,xxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x=senrima)

VII

—laŭ ĉinesko Shengshengman*

**antaŭ morto
olda bovo
sen ioma forto
al li konsilis, ke
per surporto
de ĝia fel' flugu
ĉielen
por bonsorto
sincere
petadu
ĉe la reĝa korto**

**por viva komforto
la ulo
kun firma lipmordo
gvidis idojn
al palaca pordo
proksime pli kaj pli
sed ho ve**

**bela torto
foriĝis
kaj dezir' en aborto**

*ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 10 versoj respektive de 4,46,64,634,336 / 6,36,46,634,37 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xa (x=senrima)

VIII

—laŭ ĉinesko Niannujiao*

**reĝ-patrino
koleris
pri ilia veno
laktan vojjon
magie
faris sen ajn ĝeno
por eterne
bari l' iron
al reĝ-tereno
kompatinda
ve, mizera sceno**

**antaŭ larĝa river'
senhelpe l' junul'
kun ĉagreno
volis ĉerpi
la akvon
por river-malpleno
energie
ili senĉese
kun eg-peno
persistadis
en dren-entrepreno**

*ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 11 versoj de 436,436,445,46 / 654,436,454,46 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa,xxa,xxa,xa / xxa,xxa,xxa,xa (x=senrima)

IX

—laŭ ĉinesko Queqiaoxian*

**la kruelaj
reĝ' kaj la panj'
de l' granda plago**

**fine kortuŝiĝis
pro tia
ago**

**l' ul' kaj idoj
licis kuni
nur por tago
kun la feino jare
laŭ ponta
trako**

*ĉina fiksforma poemo el du strofoj po ses versoj de 446,734 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa,xxa (x=senrima)

X

—laŭ ĉinesko Shanhuazi*

**l' edikt' fulme rapide
cirkulis jen senbride
pigoj svarmis por helpi
envide**

**pavimi ponton korpe
famili' postdivide
finfine renkontiĝis
plor-ride**

*ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de 7,7,73 / 77,73 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa / xa,xa (x=senrima)

Zhuang Qixiong

Disfloru Cent Floroj

----Dek ling-ĉineskoj

Shiliuziling*

**Flor',
kiel nub' de brilkolor'.
Tre bela—
Ĉinio de glor'!**

*ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1,7,35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa
(x=senrima)

Fengdieling*

**Kiel ĉarmulin',
reĝa peoni':
Kolorbrila energi';
Inter cent floroj rava magi'.**

*ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 55,7,9 silaboj, laŭ rimaranĝo xaaa
(x=senrima)

Dujiaoling*

**Lotuso sur la river'
bonodoras je juvel'.
Gakas korŝira anser'
kun sincer'.
En pluv',nur lotusa kver'!**

*ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 7,7,7,3,7 silaboj kun kontinua rimo

Tiaoxiaoling*

**Persik',persik'
disfloras sen muzik'.
Hirund' kaj papili'
flirtas kun idili'.
Lidi,lidi,
ĉirkaŭ floroj ridi!**

* ĉina fiksforma poemo al ses versoj de 4,6;6,6;4,6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aabbcc.
La 4 silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso
devas esti el palindrome ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz.
rimi-miri; mora-arom; nomo-mono' roso-soro.

Rumengling*

**Duobla Naŭa cel'
sunbrilas en ĉiel'.
Miriga oro
ĉie kuŝas en ter'.
Juvel'?**

Juvel'?
Jen krizantema bel'!

ĉina fiksforma poemo el 7 versoj de 6,6,56,2,2,6 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa,a,A,a. La kvina kaj sesa versoj estas samaj. (x=senrima)

Mulanhualing

Kun vintra ŝpar'
bonanoncas Fest-Novjar':
Printemp' zomas;
Orkideoj aromas.

Freŝflora virt'
noblas pro turista flirt'.
Kia ravo!
Kia mirinda havo!

*ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de 4,7;47 / 4,8;4,6 silaboj, laŭ rimaranĝo aabb / ccdd

Qingpingyueling*

En Mezaŭtun'
fridis ros' kaj sun'.
Osmant' sentaromis,kun
Chang'e kuris al lun'.

Per dolĉosmanta vin'
Wugang regalis ŝin.
Ĉio en ĉielo
ĉiam restas destin'?

*ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de 4,5,7,6; / 6,6,66 silaboj, laŭ rimaranĝo aaaa / aaxa (x=senrima)

Jiangyueling*

Ruĝume' aromas
ĉie kun blankneĝer'.
Nobla vol',ŝtala toler;
Jen la unua sfer'!

**Umeoj disfloras,
Montoj tuj en prosper'.
Ĉiuj ridas kun suker'
kaj feliĉa esper'!**

*ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de 66,7,6 / 66,7,6 silaboj, laŭ rimaranĝo xaaa / xaaa (x=senrima)

Liuchunling*

**En printempo,
kukol' sonas,
azaleas.
Sur ruĝaj montoj birdoj
venas kaj
kantetas.**

**Ĉiuj kune navetas
kaj plezuregas.
En hejmland', jaroj pli kaj
Pli fortas
kaj helas.**

*ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun ses kaj kvin versoj respektive de 444,733 / 7,5,733 silaboj, laŭ rimaranĝo xxa,xxa / a,a,xxa (x=senrima)

Tanduoling*

**Jasmenbonodor':
La unua flor'
en Ĉini'
kun belhonor;
La plej blanka en floroj;
Dia kaj
Tera glor'.**

**Tea jasmenflor':
Bongusta favor';
Aromo,
longa valor';
Frue serĉu en montoj
kaj flegu
por trezor'!**

*ĉina fiksforma poemo el du strofoj po sep versoj de 5,5,44,733 / 5,5,34,733 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa,xxa / a,a,xa,xxa (x=senrima)

Kanto de Ĉinio

----Dek zi-ĉineskoj

Nangezi*

**Granda Yan-Huang
ekis Ĉinio:
Tre longa historio,
unua civilizacio.**

*ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 55,7,9 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,aa (x=senrima)

Nanxiangzi*

**Yao kaj Shun-
virtreĝoj de oportun',
gvidis popolon per ver'
Komun',
feliĉis en brila sun'.**

*ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de 5,7,72,7 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa,a (x=senrima)

Yugezi*

**Ĉin' eksterordinara,
scienco akapara:
Sudilo,
pulv' kara;
Paperpreso pli rara!**

*ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 7,7,33,7, silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa,a (x=senrima)

Daolianzi*

**Ĉineskon
scipovi;
Qin-Qi-Shu-Hua-n trovi;**

**En riĉa tradicio,
scion senĉese provi.**

*ĉina fiksforna poemo el 5 versoj de 33,7,77 silaboj, laŭ rimarangô xa, a, xa (x=senrima)

Ganzhouzi*

**Nacia familio,
socio,
Ĉinio
tigre kuras antaŭen
pro harmonio.
Tre granda—
kun ambicio!**

*ĉina fiksforna poemo el sep versoj de 7,3,3,75,35 silaboj, laŭ rimarangô aaax
axa (x=senrima)

Tianxianzi*

**Kontraŭ feud' kaj borokrat',
ĉinoj staris neplu flat',
kiel libera soldat'.
Jen la plej
bona dat'—
riĉa kaj potenca ŝtat'!**

* ĉina fiksforna poemo de 6 versoj de 7,7,73,3,7 silaboj, laŭ rimarangô a,a,xa,a,a (x=senrima)

Jiangchenzi*

**Centjara hont',kia van'!
Sen rikan'
kaj profan',
HongKong kaj Makao man' en man'
hejmis,revenos Tajvan'.
Ĉiuj, ĝoj'
kaj bonsan'!**

* ĉina fiksforna poemo el du strofoj po 8 versoj de 7,3,3,45,733 silaboj, laŭ rimarangô
a,a,a,xa,xxa (x = senrima)

Hemanzi*

Montoj, floroj, akvo—
pitoreska pejzaĝ'.
En serena ĉielo,
Steloj — brila vizaĝ'.
Ĉiuj ĝojas pro freŝ'
kaj pur' de urb',vilaĝ'.

*ĉina fiksforma poemo el 6 versoj de 66,76,66 silaboj, laŭ rimaranĝo xaxaxa
(x=senrima)

Caisangzi*

Talent' de Tajzong,Tajzu
iom lamis.
Ĝingis amis
vulturojn kaj tre flamis.

Nun,plej veraj herooj:
Post Sun famis,
Maŭ deklamis,
poezion ornamis.

* ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de 74, 4, 7 silaboj, laŭ rimaranĝo de
xa, a, a. (x=senrima)

Xingxiangzi*

Yangzi-River',
drako sur ter'.
Nankino,
Kia prosper'!
Granda Muro
restas mister'.
Nur steloj kaj
lun' brilas
en vesper'.

Ĉarma suno,
tra la eter'.
Bela bild',
kun karakter'.

**Bravaj ĉinoj
plenos esper':
Laboremo,
Saĝeco
kaj Sincer'!**

*ĉina fiksforma poemo el du strofoj po naŭ versoj de 4,4,34,44,433 / 44,34,44,
433 silaboj, laŭ rimarangô a,a,xa,xa,xxa / xa,xa,xa,xxa (x=senrima)